# ESPERANTOLOGIO
# ESPERANTO STUDIES

*EES*

**Kajero 3** **2005** **Issue No. 3**

*Redaktas* *Editor*

Christer Kiselman

*Redakta komitato* *Editorial Board*

Detlev Blanke
José Borges Neto
Probal Dasgupta
Michel Duc Goninaz
Gotoo Hitosi
Edmund Grimley Evans
Ilona Koutny
Erich-Dieter Krause
Sergej Kuznecov
Jouko Lindstedt
Liu Haitao
Ingrid Maier
Geraldo Mattos
Marc van Oostendorp
Sergio Pokrovskij
Humphrey Tonkin
John C. Wells
Yamasaki Seikô

KAVA-PECH Dobřichovice (Prago/Prague)

Upsala Universitato Uppsala University

ESPERANTOLOGIO / ESPERANTO STUDIES estas internacia revuo pri ĉiuj fenomenoj rilatantaj al esperanto. Ĝi aperigas artikolojn bazitajn sur originalaj studoj pri lingvosciencaj, historiaj, literaturscienca, psikologiaj, sociologiaj kaj politikaj aspektoj de esperanto.

La revuo estos publikigata en du formoj, tamen enhave identaj: presita sur papero kaj rete alirebla.

La paperan version publikigas la eldonejo KAVA-PECH, Anglická 878, CZ-25229 Dobřichovice (Prago), Ĉeĥio ⟨info@kava-pech.cz⟩.

La prezo inkludanta sendokostojn (surface) estas 10,00 EUR; sen sendokostoj 7,50 EUR. Vi povas pagi al la konto kape-p ĉe UEA; tiam informu KAVA-PECH ke vi pagis. (La unua kaj dua kajeroj estas ankoraŭ haveblaj ĉe UEA kaj ĉe Christer Kiselman.)

La komputilreta versio estas publikigata de Upsala Universitato sub la respondeco de profesoro Ingrid Maier. Ĝi estas alirebla ĉe la retadreso

http://www.math.uu.se/esperanto

Por konservi la eblecojn de referenco la artikoloj publikigitaj en la retversio ne estos ŝanĝitaj dum la tempo de la nuna redaktoro. Sed ĉiu aŭtoro rajtas verki aldonajn notojn al sia jam publikigita artikolo. Tiuj aldonoj povos enhavi korektojn, komentojn kaj novajn referencojn.

ESPERANTOLOGIO / ESPERANTO STUDIES is an international journal on all phenomena relating to Esperanto. It publishes articles based on original studies of the linguistic, historical, literary, psychological, sociological, and political aspects of Esperanto.

The journal is published in two versions, which are identical in content: a print version and an electronic version.

The print version is published by KAVA-PECH, Anglická 878, CZ-25229 Dobřichovice (Prague), Czech Republic ⟨info@kava-pech.cz⟩.

The price including surface postage is EUR 10,00; without postage EUR 7,50. Please contact info@kava-pech.cz for information on how to pay. (The first two issues are still available and can be obtained from UEA or Christer Kiselman.)

The electronic version is published by Uppsala University under the responsibility of Professor Ingrid Maier. It is available at the URL

http://www.math.uu.se/esperanto

In the interest of scholars, the articles published in the electronic version will not be changed during the present editor's tenure. But every author may add an appendix to her or his published paper. Such appendices may contain corrections, comments, and new references.

ISSN 1311-3496, ISBN 80-85853-83-3 (p); ISSN 1404-4749 (e)

# ESPERANTOLOGIO
# ESPERANTO STUDIES

*EES*

**Kajero 3** **2005** **Issue No. 3**


## Enhavo / Contents


**Christer Kiselman:** *Salutvorto de la redaktoro* . . . . . . . . . . 3

**Christer Kiselman:** *A word from the Editor* . . . . . . . . . . 4

**Hiroshi Nagata kaj Renato Corsetti:** *Influoj de gepatra lingvo sur la lernadon de esperanto: psikolingvistika esploro* . . . . . . . . . . 5

**Renato Corsetti:** *En Germanujo pli ol aliloke: esperantologia agado* . . . 40

**Marcus Sikosek:** *Dokumente zum „Weltspracheverein Nürnberg“* . . . . 45

**Bernhard Pabst:** *Lingva Kritiko (1932–1935): La unua esperantologia periodaĵo* . . . . . . . . . . 55



La paperan version publikigas | Print version published by
KAVA-PECH, Dobřichovice

La elektronikan version publikigas Upsala universitato | Electronic version published by Uppsala University

Redaktoro / Editor

Christer KISELMAN, Uppsala University, Department of Mathematics, P. O. Box 480, SE-751 06 Uppsala, Sweden. ⟨kiselman@math.uu.se⟩

Redakta komitato / Editorial Board

Detlev BLANKE, Otto-Nagel-Straße 110, DE-12683 Berlin, Germany. ⟨dblanke.gil@snafu.de⟩

José BORGES NETO, UFPR/Departamento de Lingüística, Rua Gen. Carneiro 460, BR-80060-150 Curitiba, PR, Brasil. ⟨borges@ufpr.br⟩

Probal DASGUPTA, University of Hyderabad, Centre for Applied Linguistics & Translation Studies, P. O. Central University, IN-500046 Hyderabad, India. ⟨pdgalts@uohyd.ernet.in⟩, ⟨probal53@yahoo.com⟩

Michel DUC GONINAZ, Val Saint-Georges, Chemin de l'Échelle, FR-13100 Aix-en-Provence, France. ⟨michelduc@tiscali.fr⟩

GOTOO Hitosi, Tohoku University, Faculty of Arts and Letters, Department of Linguistics, Sendai, JP-981 Japan. ⟨gothit@sal.tohoku.ac.jp⟩

Edmund T. GRIMLEY EVANS, St. John's College, Cambridge CB2 1TP, England. ⟨edmund@rano.org⟩

Ilona KOUTNY, Adam Mickiewicz Universitato, Lingvistika Instituto, Międzychodzka 5, PL-60-371 Poznań, Poland. ⟨ikoutny@amu.edu.pl⟩

Erich-Dieter KRAUSE, Universität Leipzig, Ostasiatisches Institut, Schillerstraße 6, DE-04109 Leipzig, Germany

Sergej KUZNECOV, Tverskaja 19-67, RU-103050 Moskva, Russian Federation. ⟨kuznecov@philol.msu.ru⟩

Jouko LINDSTEDT, Slavonic and Baltic Department, P. O. Box 4 (Vuorikatu 5 B), FI-00014 University of Helsinki, Finland. ⟨jouko.lindstedt@helsinki.fi⟩

LIU Haitao, Applied Linguistics Department, School of Presentation Art, Communication University of China, No. 1 Dingfuzhuang Dongjie, CN-100024, Beijing, P. R. China. ⟨byliuhaitao@cuc.edu.cn⟩

Ingrid MAIER, Uppsala University, Department of Modern Languages, P. O. Box 636, SE-751 26 Uppsala, Sweden. ⟨ingrid.maier@moderna.uu.se⟩

Geraldo MATTOS, Rua João Motter, 98, BR-81210-260 Curitiba, PR, Brazil. ⟨mattos@super.com.br⟩

Marc VAN OOSTENDORP, Meertens Instituut, Joan Muyskenweg 25, NL-1096 CJ Amsterdam, The Netherlands. ⟨marc@vanoostendorp.nl⟩

Sergio POKROVSKIJ, ul. Tereŝkova 28-32, RU-630090 Novosibirsk, Russian Federation. ⟨pokrov49@yahoo.com⟩

Humphrey TONKIN, University of Hartford, Office of the President Emeritus, Mortensen Library, West Hartford, CT 06117-1599, USA. ⟨tonkin@mail.hartford.edu⟩

John C. WELLS, University College of London, Dept. of Phonetics and Linguistics, Gower Street, London WC1E 6BT, England. ⟨wells@phonetics.ucl.ac.uk⟩

YAMASAKI Seikô, JP-185-0014 Tôkyô, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12, Japan. ⟨syama@qf6.so-net.ne.jp⟩

# Salutvorto de la redaktoro

Kara leganto

Estas ĝojo prezenti al vi la trian kajeron de *Esperantologio*! Ĝi enhavas tri originalajn studojn kaj unu recenzon. El la studoj du estas en esperanto kaj unu en la germana; la recenzo estas en esperanto.

⋆

Tute unikan psikolingvistikan studon prezentas Hiroshi Nagata kaj Renato Corsetti: temas pri influoj de la gepatra lingvo sur la lernadon de esperanto.

Renato Corsetti recenzas la viglan esperantologian agadon de la germana asocio GIL, *Gesellschaft für Interlinguistik.*

Marcus Sikosek prezentas kaj komentas dokumentojn el la jaroj 1885 ĝis 1910 pri lingva asocio en Nurenbergo, *Weltspracheverein.*

Pri la mallonga vivo de frua esperantologia revuo, *Lingva Kritiko,* Bernhard Pabst rakontas al ni en la tria studo.

⋆

Pri la aperiga politiko de la revuo bonvolu legi en la *Notico de la redaktoro* en kajero 1.

⋆

Mi esperas ke vi ĝuos dum legado de tiuj tekstoj same kiel mi faris!

*Christer Kiselman*

# A word from the Editor

Dear reader:
It is a pleasure to present to you the third issue of *Esperanto Studies*! It contains three original studies and one review. Of the studies, two are in Esperanto and one in German; the review is in Esperanto.

⋆

A unique psycholinguistic study by Hiroshi Nagata and Renato Corsetti inaugurates this issue: it shows the influence of the mother tongue on Esperanto-speakers' choice of words and construction of sentences.

Renato Corsetti reviews the linguistic activity of the German association GIL, *Gesellschaft für Interlinguistik.*

Marcus Sikosek presents and comments documents from 1885 to 1910 concerning a language society in Nuremberg, *Weltspracheverein.*

Bernhard Pabst, finally, reports to us on the short life of an early esperantology journal, *Lingva Kritiko.*

⋆

For the editorial policy of the journal, please see the first issue.

⋆

I hope you will enjoy reading these articles as much as I did!

*Christer Kiselman*

*Esperantologio / Esperanto Studies* **3** (2005), 5–39

# Influoj de gepatra lingvo sur la lernadon de esperanto: psikolingvistika esploro

Hiroshi Nagata kaj Renato Corsetti

Resumo. Tiu ĉi studo esploras la influojn de gepatra lingvo sur la lernadon de esperanto pere de du taskoj: juĝado de akceptebleco de frazoj kaj libera priskribado de bildo. Partoprenis entute 111 parolantoj el anglalingvanoj, perslingvanoj, hungarlingvanoj kaj ruslingvanoj, malsamaj je la sperto en esperanto: komencantoj, progresantoj kaj spertuloj. Testitaj fraztrajtoj estis tri-specaj: tiaj, kiuj inkludis sintagmo-konservantan disigon (*Grandan hundon renkontis la knabo sur la strato.*), tiaj, kiuj inkludis sintagmo-rompantan disigon (*Grandan li akiros sukceson.*) kaj tiaj, en kiuj mankis kromvorto (*Mi rakontos kion mi vidis.*). Tiuj ĉi transformitaj frazoj estis parigitaj respektive kun siaj bazaj frazoj: tiaj, kiuj ne inkludis sintagmo-konservantan disigon (*La knabo renkontis grandan hundon sur la strato.*), tiaj, kiuj ne entenis sintagmo-rompantan disigon (*Li akiros grandan sukceson.*), kaj tiaj, kiuj inkludis kromvorton (*Mi rakontos tion, kion mi vidis.*). Ĉefaj trovaĵoj estis: (1) diferenco de juĝado inter la bazaj kaj la transformitaj frazoj okazis depende de tio, ĉu la gepatra lingvo permesis aŭ ne permesis la kritajn fraztrajtojn. Tio ĉi okazis speciale ĉe komencantoj el perslingvanoj, hungarlingvanoj kaj ruslingvanoj, kiam ili juĝis frazojn kiuj inkluzivis la du tipojn de disigo. (2) La diferenco malgrandiĝis proporcie al spertiĝo en esperanto. Tio ĉi estis plej rimarkebla ĉe perslingvanoj kaj hungarlingvanoj, kiam ili juĝis la sintagmo-konservantajn frazojn. (3) Spertuloj el la kvar lingvanoj donis preskaŭ samnivelan juĝadon precipe al la frazoj rilatantaj al la du specoj de disigo. (4) Liberaj priskriboj, akiritaj precipe ĉe hungarlingvanoj kaj ruslingvanoj, konsistis el frazesprimoj, kiuj estis kreitaj laŭ la gramatiko de iliaj gepatraj lingvoj prefere ol statistike plej oftaj frazesprimoj ĉirkaŭantaj la skribantojn. La trovaĵoj indikas la grandan influon de gepatra lingvo sur la lernadon de esperanto. Ili ankaŭ indikas la influon de sperto pri la lingvo sur la juĝadon de akceptebleco de frazoj.

Ĉiuj esperantoparolantoj, escepte de tiuj malmultaj kiuj denaske akiris esperanton kiel unuan lingvon, lernas ĝin kiel duan lingvon. Ili do eklernas esperanton post kiam ili pli aŭ malpli plene posedis sian gepatran lingvon. Tio signifas, ke trajtoj de la gepatra lingvo facile influas lernadon de la dua lingvo, ĉi-kaze esperanto. Tiaj trajtoj sendube inkluzivas tiujn de fonetiko, vortofarado kaj frazkonstruado. Plue okazas influoj de la unua

lingvo sur la duan ne sole en produktado sed ankaŭ en komprenado. Kiel statis kaj statas sciencaj esploroj pri tiu ĉi studkampo oni povas kapti per, ekzemple, Gass (1996) kaj aliaj artikoloj aperintaj en Ritchie & Bhatia (1996). Ne troviĝas tamen antaŭaj studoj psikolingvistikaj, kiuj pritraktis esperanton kiel cellingvon, kvankam ekzistas sporadaj aludoj pri tiaj influoj (ekz. Sherwood 1982; Maxwell 1985).


La nuna studo esploras influojn de gepatraj lingvoj sur lernadon de esperanto laŭ du flankoj, komprenado kaj produktado de frazoj. Ni analizos la influojn, komparante sintaksan strukturon de gepatraj lingvoj kontraŭ tiu de esperanto. Tri trajtoj de la sintakso de esperanto, kiujn ni traktas tie ĉi, koncernas unuflanke du tipojn de disigo de elementoj el sintagmo kaj, aliflanke, almetadon de demonstrativo al frazo. La tri trajtojn montras jenaj ekzemplaj frazoj:


1-a. La knabo renkontis grandan hundon sur la strato.
1-b. Grandan hundon renkontis la knabo sur la strato.
2-a. Li akiros grandan sukceson.
2-b. Grandan li akiros sukceson.
3-a. Mi rakontos tion, kion mi vidis.
3-b. Mi rakontos kion mi vidis.

Malgraŭ Oostendorp (1991:11) kiu karakterizas esperanton kiel konfiguran lingvon, ekzistas ankaŭ la fakto, ke kompare al konfiguraj lingvoj kiel la angla kaj la franca ĝi permesas tre liberan ordigon de frazelementoj, kiel ofte diskutite (ekz. Wells, 1978; Kaloscay & Waringhien 1985). Tiele, en 1-b substantiva sintagmo (SS), *grandan hundon,* estas disigita de verba sintagmo (VS), *renkontis (grandan hundon) sur la strato* kaj allokita al la antaŭo de la frazo (F). Plue, en 2-b adjektivo (Adj), *grandan,* disiĝas de la substantiva sintagmo, *(grandan) sukceson*, kiu siavice estas ene de la verba sintagmo, *akiros (grandan) sukceson.* Tiaj ĉi du tipoj de disigo malsamas pro tio, ke la antaŭa disigo, eĉ se ĝi rompas la verban sintagmon, konservas sintaksan kategorion de substantiva sintagmo, *grandan hundon,* dum la lasta ne konservas ĝin pro la disigo de adjektivo, *grandan,* disde ties kunigita substantivo (S), *sukceson.* Pli precize, la lasta disigo inkludas moviĝon de unu konstituanto el la sintagmo (SS2) kiu situas pli profunde en la arbstrukturo ol la unua kiu inkludas moviĝon de ĉiuj konstituantoj ene de SS2. Vd. diagramon 1 sur p. 7.[1] Tiu-rilate, la lasta disigo estas pli serioza je rompiĝo de sintaksa kategorio ol la antaŭa. Ni nomu ekde nun la antaŭan disigon *sintagmo-konservanta disigo,* kaj la lastan *sintagmo-rompanta*

[1]La arbstrukturo prezentita en diagramo 1 estas jam malmoderna, laŭ la nuntempa disvolviĝo de teorio pri genera gramatiko. Ĝi tamen montras plej simple la diferencon inter la du trajtoj de disigo. La diagramo estas kreita nur laŭ la ekzemplo de Wells (1978:49), unu el la tre malmultaj provoj kiuj utiligas priskribmanieron de genera gramatiko al esperanto.

*disigo,* nur en la senco ke sintagmo tie ĉi rilatas nur al la sintagmo situanta profunde en la arbstrukturo, nome: tiu, kiu estas superregata de la verba sintagmo.[2]




*Diagramo 1.* Arbstrukturo indikanta la du specojn de disigo.

[2]Ŝajnas, ke ankoraŭ ne estas determinite pri tio, ĉu troviĝas iuj principoj kiuj limigas movadon de elementoj ankaŭ en esperanto — same kiel en la angla. Eĉ Oostendorp (1991:11) ne mencias tiun ĉi problemon, escepte de tio, ke li ne akceptas kiel gramatikan la frazon, *Kanguruon mi batos tiun,* en kiu *kanguruon* estas disigita de la substantiva sintagmo, *tiun (kanguruon)* kaj moviĝas al la kapo de la frazo same kiel la frazo (2-b). Kalocsaj & Waringhien (1985:274) kontraŭe akceptas la frazon *Mi estas certa, ke brilan vi havos sukceson.* Tiuj ĉi du frazoj estas samspecaj en sintaksa strukturo almenaŭ en tio, ke konstituanto situanta profunde en la arbstrukturo moviĝas el ĝi supren. Ili tial postulas al lingvistoj plenumi necesajn analizojn por precizigi gramatikecon de la frazoj. Wells (1978) kaj Komatsu (1996) diskutas ĉi tiun specon de frazoj kadre de genera gramatiko, tamen ili ne donas sintaksan analizon precizigitan pri tio, kien en la sintaksa arbstrukturo la disigita frazelemento moviĝas, nek pri tio, ĉu ekzistas en esperanto iuj sintaksaj kategorioj kiuj malpermesas tian disigon. Vd. noton 10.

Frazoj kun sintagmo-konservanta disigo renkonteblas plej ofte en esperanto, dum frazoj kun sintagmo-rompanta disigo ne estas tiom oftaj kvankam ili ne estas neakcepteblaj. Koncerne tiujn ĉi frazojn, Wells (1978) kaj Kalocsay & Waringhien (1985) akceptas ilin kiel gramatikajn. Wells (1978, p. 48) mencias, ke interrompiĝo de substantiva sintagmo okazas ankaŭ en la latina, precipe en poezio, dum Kalocsay & Waringhien notas ke uzado de tiaj ĉi frazoj estas "plene rajtigita" (1985:365), kaj ilin uzas precipe slavoj. La tri aŭtoroj samopinias, ke la interrompiĝo eblas pro morfema akordiĝo inter substantivo kaj epiteto.

La tria fraztrajto rilate al demonstrativo, *tio,* estas ofte renkontebla en esperanto. Kiel skribas Kalocsay & Waringhien, tiun ĉi demonstrativon oni uzas "por anonci sekvantan rilatan aŭ eksplikan subpropozicion" (1985:78). Al la kategorio de tiu ĉi fraztrajto ni aldonas ankaŭ adverbon, *tie,* ĉar ĉi tion oni uzas same kiel la demonstrativon, kiel montras la sekvantaj frazoj: *Li loĝas tie, kien eĉ birdo ne flugas* (PIV, p. 507) kaj *Oni suferas tie, kie oni estas vundita* (PIV, p. 1108). La demonstrativo en tiu ĉi okazo ne havas signifon per si mem, sed funkcias nur formale kiam ĝi kombiniĝas kun la subpropozicio kiun ĝi indikas. Lingvistoj nomas ĝin *ekspletivo* (angle: *expletive*).[3]

Tiuj ĉi tri fraztrajtoj donas al esperanto sintaksan rimedon por esprimi pensojn diversmaniere en lingvaj formoj. Sed ne malofte ekzistas lingvoj kiuj ne enhavas en si tiajn fraztrajtojn. Ekzemple, la sintakso de la angla ne permesas disigi konstituantojn disde substantiva sintagmo kaj ilin loki ĉe la antaŭo de frazo, kiel evidentiĝas en la simpla ekvivalento de 2-b, **Great he will attain a success.* (Steleto indikas negramatikan frazon.) Aliflanke, la uzado de la kromvorto estas permesebla ankaŭ en la angla, sed ne senkondiĉe. Ekzemple, laŭ Otsuka & Nakajima (1982:218–219) iuj frazoj kun la kromvorto estas gramatikaj, dum aliaj kun ĝi estas negramatikaj. Komparu la frazojn jenajn: *John doubts it that you will go* 'Johano dubas tion, ke vi iros' kaj **It is to relive the past to return to the homeland* 'Revigligas la pasintecon tio, ke oni revenas al la naskiĝloko'. Anglalingvanoj kiuj eklernas esperanton do devas renkonti lernosituacion, kie ili devas lerni renove pri tio, kiuj aspektoj de esperanta gramatiko estas samaj aŭ ne samaj al tiuj de la angla.[4]

[3]Nenie troviĝas termino por la frazelemento rilate al *expletive* (angla), *Füllerwort* (germana), kaj *expletive* (franca). En Vortaro: Japana-Esperanta, Miyamoto (1982) donas al ĝi *kjoĵi* (nenecesa vorto) kiu, tamen, ŝajnas iom erariga pro tio, ke ĝi ne estas nenecesa en tiaj frazoj. Ĝi estas ne ĉiam necesa sed plenumas gravan — ĉi-rilate necesan — rolon kiu ligas precizige kaj logike ĉefpropozicion kun subpropozicio. En tiu ĉi senco, la germana termino, *Füllerwort,* aspektas pli bona ol *nenecesa vorto,* se ne taŭgas tia angleca aŭ franceca neologismo kiel *ekspletivo.* En tiu ĉi studo, ni alprenas, tute provizore, neologismon, *kromvorto,* kiel la frazelementon pridiskutatan.

[4]Multaj esploroj nuntempaj en tiu ĉi studkampo sin direktas al la problemo, ĉu aŭ kiamaniere Universala Gramatiko (angle: *Universal Grammar*) proponata de Chomsky (1981, 1986, 1995, 2000) kaj liaj samskolanoj funkcias ĉe la akirado de dua lingvo (vd. ekz. White 1996, Flynn 1996, Schachter 1996). Tiu ĉi problemo, kvankam grava, ne povas stari kiel aktuala problemo tuj tuŝebla,

Tiu ĉi studo esploras kvar malsamajn lingvanojn kies gepatraj lingvoj estas la angla, la persa, la hungara kaj la rusa. Ĝi esploras kiel la kvar malsamaj lingvanoj lernas esperanton, komparante tri grupojn de lingvanoj kun malsamaj spertoj pri esperanto. Tabelo 1 prezentas kiel statas la kvar lingvoj pri la tri fraztrajtoj supre skribitaj. La tri grupoj malsamaj je la nivelo de esperanto estas: (1) komencantoj, kiuj estas ĵus finintaj elementan kurson, (2) progresantoj, kiuj lernis esperanton pli multe ol la komencantoj sed ne tiom ke ili fariĝis spertaj pri la lingvo, kaj (3) spertuloj, kiuj posedas la lingvon sufiĉe bone.

| | **Sintagmo-konservanta disigo** | **Sintagmo-rompanta disigo** | **Kromvorto** |
|---|---|---|---|
| **la angla** | permesebla(1) | nepermesebla | parte permesebla |
| **la persa** | nepermesebla | nepermesebla | nepermesebla |
| **la hungara** | permesebla | permesebla(2) | permesebla(1) |
| **la rusa** | permesebla | permesebla | permesebla |

*Tabelo 1.* Sintaksaj trajtoj de kvar lingvoj. *Notoj:* (1) Kun aparta stil-efekto, kiel akcentado. (2) Se temas pri verba sintagmo (ene de substantiva sintagmo tute ne ĉiam).

Ĉar la kvar lingvoj estas malsamaj rilate al la permesateco pri la tri fraztrajtoj supre menciitaj, la diverslingvanoj devas lerni aliajn aspektojn de sintakso ol tiujn de sia lingvo depende de la grandeco de diferenco inter esperanto kaj ilia gepatra lingvo.

ĉar preskaŭ neniom da esploroj surbaze de la genera gramatiko estas aplikita al esperanto, escepte de la komenca esploro fare de Oostendorp (1991), kiu argumentas ke ankaŭ esperanto submetiĝas al la principoj de Universala Gramatiko. Tamen, al tiuj ĉi studoj rilatas almenaŭ kernvorto-parametro (angle: *head-parameter*), kiu koncernas situon de kernvorto en sintagmo. Kiel ni skizis esperantlingve (Corsetti 1996, Nagata 1997), Chomsky asertas, ke Universala Gramatiko en si enhavas genetike kaj lingvistike specifajn principojn kaj parametrojn, kiuj determinas strukturajn trajtojn de homa lingvo. Laŭ lia teorio de principoj-kaj-parametroj, ŝajna struktura diverseco inter apartaj lingvoj estas klarigebla pere de la diferenco en parametro-fiksado, kaj esenca parto de lingvoakirado estas simpla fiksado de unuopaj parametroj, tiel ke ĉirkaŭantaj lingvomaterialoj nur efektivigas elekton de iu aŭ alia valoro por koncernaj parametroj. Ekzemple, en la angla verba sintagmo nepras ĝia kernvorto (ĉi-okaze verbo), kiu antaŭas ceterajn elementojn ene de la verba sintagmo (sekve, *akiros grandan sukceson* anstataŭ *grandan sukceson akiros* aŭ *grandan akiros sukceson*, t.e. kernvorto-komenca anstataŭ kernvorto-lasta en fiksado de kernvorto-parametro). Anglalingvanoj devus do sin submeti al la kondiĉo, ke la parametro rigide fiksita laŭ la kernvorto-komenca vortordo estu libere ŝanĝebla pro la fleksebleco de esperanta sintakso, kiu permesas aŭ kernvorto-komencan aŭ kernvorto-lastan vortordon (vd. Nagata 1997c). Rilate al la nuna esploro, plej eblos, ke la influo de parametro-fiksado plenumita en gepatra lingvo aperas pli ofte ĉe komencantoj ol ĉe spertuloj.

En la nuna studo, al la partoprenantoj ni donas du taskojn: unu estas juĝado de akceptebleco de esperantaj frazoj kaj la alia estas libera priskribado de bildo. La frazoj donotaj en juĝado de akceptebleco konsistas el du versioj de frazoj. Unuj estas bazaj, en la senco ke ili ne inkludas disigon de sintagmo, aŭ inkludas la kromvorton, kaj alia estas transformitaj frazoj, en la senco ke ili enhavas disigon de sintagmo aŭ ne enhavas la kromvorton. Ni testos sekvantajn hipotezojn per la du taskoj.

(1) Diferenco de juĝado inter la du versioj de frazoj, bazaj kaj transformitaj, okazos ĉe partoprenantoj depende de tio, ĉu ilia gepatra lingvo permesas aŭ ne permesas la trafajn fraztrajtojn;
(2) La diferenco varios depende de sperto en esperanto, nome: ju pli spertaj estos la parolantoj en esperanto, des pli malgrandiĝos la diferenco inter la bazaj kaj la transformitaj frazoj;
(3) La diferenco inter la parolantoj de la kvar lingvoj estos pli malgranda ĉe spertuloj ol ĉe komencantoj. Nome, sperto pri esperanto ebligos al lingvanoj alpreni pli-malpli similan nivelon de juĝado kiam ili juĝas akcepteblecon de frazoj;
(4) Ankaŭ en priskribado de la bildo, uzado de frazoj kiuj entenas la trafajn fraztrajtojn varios en ofteco depende, unuflanke, de la lingvo, kiu permesas aŭ ne permesas iun aŭ alian fraztrajton, kaj depende aliflanke de sperto pri esperanto.

# 1. Metodo

## 1.1. Partoprenantoj

Partoprenis entute 111 personoj el la kvar malsamaj lingvoj: 14 anglalingvanoj, 25 perslingvanoj, 33 hungarlingvanoj, kaj 39 ruslingvanoj. Tabelo 2 prezentas, laŭ lingvotipo kaj tri niveloj de sperto en esperanto, la nombron de partoprenantoj kune kun iliaj mezaĝoj kaj spertoj.

## 1.2. Stimulaj frazoj

Estis du aroj de stimulaj testfrazoj, trafaj kaj senrilataj. La trafaj frazoj konsistis plue el tri malsamaj specoj de frazstrukturo. La unua speco de frazoj enkorpigis en si sintagmo-konservantan disigon; la dua enhavis sintagmo-rompantan disigon; kaj la lasta kromvorton. Ni pretigis du versiojn de frazoj pri ĉiu el la tri specoj de testfrazoj. Unuaj estis tiuj frazoj kiuj inkluzivas unu el la fraztrajtoj supre menciitaj, t.e. sintagmo-konservanta disigo, sintagmo-rompanta disigo kaj kromvorto, dum aliaj konsistis el tiuj kiuj ne inkluzivas ilin. La apendico enlistigas ĉiujn testfrazojn uzitajn en la nuna esploro.

| Sperto Lingvo | Komencantoj | Progresantoj | Spertuloj |
|---|---|---|---|
| **Angla** | $(n = 3)$ | $(n = 2)$ | $n = 9$<br>aĝo = 64,6 jaroj<br>sperto = 17,3 jaroj |
| **Persa** | $n = 10$<br>aĝo = 27,9 jaroj<br>sperto = 1,1 jaroj | $(n = 5)$ | $n = 10$<br>aĝo = 31,8 jaroj$^{(1)}$<br>sperto = 10,9 jaroj$^{(1)}$ |
| **Hungara** | $n = 10$<br>aĝo = 22,3 jaroj<br>sperto = 0,9 jaroj | $n = 13$<br>aĝo = 32,7 jaroj<br>sperto = 3,4 jaroj | $n = 10$<br>aĝo = 41,3 jaroj<br>sperto = 13,9 jaroj |
| **Rusa** | $n = 14$<br>aĝo = 21,4 jaroj<br>sperto = 0,3 jaroj | $n = 9$<br>aĝo = 23,0 jaroj<br>sperto = 1,5 jaroj | $n = 16$<br>aĝo = 38,8 jaroj$^{(2)}$<br>sperto = 18,4 jaroj$^{(3)}$ |

*Tabelo 2.* Demografiaj trajtoj de partoprenantoj. *Notoj:* (1) Meza aĝo bazita sur 9 partoprenantoj. Unu partoprenanto ne indikis sian aĝon. (2) Meza aĝo bazita sur 15 partoprenantoj. Unu partoprenanto ne indikis sian aĝon. (3) Sperto bazita sur 14 partoprenantoj. Unu partoprenanto ne indikis sian sperton, sed testinto, kiu testis la kurantan foliaron, juĝis tiun ĉi partoprenanton sperta. Unu alia estis denaska parolanto de esperanto.

### 1.2.1. Sintagmo-konservanta disigo

Substantiva sintagmo kaj prepozicia sintagmo estis du sintagmoj uzataj en la nunaj testfrazoj. Ni kreis du versiojn de frazoj por ĉiu testfrazo. Ekzemple, en la ĉi-subaj frazoj kun substantiva sintagmo 4-a estas baza versio, dum 4-b estas transformita.

4-a. La maljunulino renkontis ĉarman knabinon en la parko.

4-b. Ĉarman knabinon renkontis la maljunulino en la parko.

En 4-b, la substantiva sintagmo, *ĉarman knabinon,* eliras el la verba sintagmo, *renkontis ĉarman knabinon en la parko,* kaj aliras al la fronto de la frazo, kune kun la interŝanĝo inter la substantiva sintagmo, *la maljunulino,* kaj la verbo, *renkontis.*[5]

Sammaniere, en la frazoj sekvantaj kun prepozicia sintagmo la transformita versio inkludas eltiriĝon de la prepozicia sintagmo kiel en 5-b, dum tia transformo ne estas farita en 5-a, la baza versio.

[5] Oni kritikus nian manipuladon pri tiu ĉi interŝanĝo surbaze de tio, ke ĝi rezultigas kroman diferencon inter la du versioj de la frazoj, t.e. tiun diferencon en vortordo. Ili asertus ke la du versioj de frazoj devas esti tute samaj krom en moviĝo. Tamen ni faris la interŝanĝon, ĉar 4-b estas pli natura esprimmaniero en esperanto ol la versio sen la interŝanĝo (*Ĉarman knabinon la maljunulino renkontis en la parko.*). Tio ĉi aplikeblas ankaŭ al aliaj frazekzemploj (5-a kontraŭ 5-b).

5-a. La studento proksimiĝis al la fremdulo.

5-b. Al la fremdulo proksimiĝis la studento.

Tridek du frazoj estis pretigitaj por tiu ĉi speco de trafaj frazoj, 16 bazaj kaj 16 transformitaj.

### 1.2.2. Sintagmo-rompanta disigo

Testfrazojn entenantaj tiun ĉi trajton montras jena paro da frazoj:

6-a. Li klopodis respondi al malfacila demando.

6-b. Klopodis li respondi al malfacila demando.

En 6-b (transformita versio), la vorto *klopodis* disiĝas de la kunmetita verba konstituanto, *klopodis respondi,* kaj translokiĝas ĉe la fronto de la frazo,[6] kompare kun 6-a, en kiu ne okazas tia translokiĝo (baza versio). Po 16 trafaj frazoj estis pretigitaj respektive por la bazaj kaj la transformitaj versioj.

### 1.2.3. Kromvorto

Testfrazoj entenantaj tiun ĉi trajton estas difinitaj de tio, ĉu ili entenis aŭ ne entenis kromvorton, *tio* aŭ *tie,* kiel montriĝas en la komparo de sekvantaj du frazoj:

7-a. Li rakontis tion, kion li suferis.

7-b. Li rakontis, kion li suferis.

8-a. Mi volas iri tien, kien vi iros.

8-b. Mi volas iri, kien vi iros.

7-a kaj 8-a enhavas la kromvorton (baza versio), dum 7-b kaj 8-b ne (transformita versio). Ni pretigis 32 trafajn frazojn por tiu ĉi speco de frazoj, 16 bazaj kaj 16 transformitaj.

### 1.2.4. Senrilataj frazoj

Ni konstruis entute 24 frazojn kiel senrilatajn frazojn, kies sintaksaj strukturoj estis diversspecaj kaj ne rilataj al la trafaj frazoj. Ĉi tiuj frazoj estis uzataj kiel maskilo kiu, laŭ nia intenco, kaŝu laŭeble la fakton, ke la tri specoj de testfrazoj kun apartaj sintaksaj strukturoj estas prezentataj.

## 1.3. Proceduro

Testado konsistis el du malsamaj taskoj: juĝado de akceptebleco de esperantaj frazoj kaj libera priskribo de bildo en esperanto. Plue, testado estis farata du fojojn. La unua testfazo inkludis la du taskojn suprajn, dum la dua inkludis nur juĝadon de akceptebleco de frazoj. Ĉiu partoprenanto partoprenis la du testfazojn, sed inter la du testfazoj devis esti pli ol unu semajno.

[6] Moviĝo okazinta en 6-b similas al tiu en 2-b en la senco, ke *klopodis* disiĝas de *klopodis respondi,* kunmetita konstituanto profunde situanta en la arbstrukturo. Diferenco inter la du frazoj troviĝas nur en tio, ĉu la moviĝo okazas aŭ el la verba sintagmo aŭ el la substantiva sintagmo.

### 1.3.1. Juĝado de akceptebleco de frazoj

La partoprenantoj juĝis entute 72 frazojn, 48 trafajn frazojn kaj 24 senrilatajn frazojn, laŭ la akceptebleco, akceptebleco en la senco, kiel ĝusta ĉiu frazo estis en esperanto. Ili juĝis ĉiun frazon per skalo kun kvin gradoj. Se ili rigardis frazon kiel akcepteblan, ili donis al ĝi la numeron 1; se ili rigardis la frazon kiel ne akcepteblan, ili donis al ĝi la gradon de neakceptebleco uzante unu el la gradoj ekde 2 ĝis 5. Ili enmetis la numeron en la krampon donitan post ĉiu frazo. Instrukcio donita al la partoprenantoj klarigis, ke granda numero indikas pli malaltan akcepteblecon ol malpli granda numero kaj ke ili juĝu ĉiun frazon senhezite, laŭ sia unua impreso.

### 1.3.2. Priskribo de bildo en esperanto


Al la partoprenantoj ni donis bildon, kiu montris scenon ordinare videblan en strato (vd. paĝon 14). Ili priskribis en esperanto tion, kio okazas en la bildo, uzante ĉirkaŭ 200 vortojn. Ili povis libere priskribi ĝin, kiel ajn ili volis.

## 1.4. Foliaroj

Ni pretigis du foliarojn por kontraŭpezigi la du versiojn de trafaj frazoj, bazaj kaj transformitaj. Nome, se la partoprenantoj ricevis la bazan version de iu trafa frazo en la unua foliaro, tiam ili ricevis la transformitan version en la dua foliaro; kaj se ili ricevis la transformitan version en la unua foliaro, tiam ili ricevis la bazan version en la dua foliaro. Duono de 16 frazoj el ĉiu el la tri tipoj de trafaj frazoj estis donita en la baza versio en la unua foliaro, dum la cetera duono de 16 frazoj estis donita en la transformita versio en la unua foliaro. Ni faris tiun ĉi manipuladon inverse en la dua foliaro. Plej zorgemaj ni estis pri tio, ke la unua duono da partoprenantoj ricevu la unuan foliaron en la unua testfazo kaj la duan foliaron en la dua, dum la alia duono da partoprenantoj ricevu la duan foliaron en la unua testfazo kaj la unuan foliaron en la dua testfazo. Tamen, la unua foliaro, donita en la unua testfazo, inkludis la du taskojn (juĝado de akceptebleco de frazoj kaj priskribado de la bildo), dum alia foliaro, donita en la dua testfrazo, inkludis nur la taskon pri juĝado de akceptebleco.

La unua paĝo de la unua foliaro klarigis pri tio, ke la esploro estas subtenita de la Fondaĵo FAME, ke la tasko de partoprenantoj konsistas el du partoj – juĝado de akceptebleco de frazoj kaj priskribo de bildo – , kaj kiamaniere ili plenumu la taskon. La unua paĝo ankaŭ petis informojn pri partoprenantoj, t.e. ilia nomo aŭ kvar-cifera numero, kiu identigis partoprenanton, sekso, denaska lingvo, kaj longo de lernado de esperanto specife en jaroj kaj monatoj.

La dua paĝo montris la manieron, en kiu la partoprenantoj juĝu ĉiun frazon, kune kun la 5-poenta skalo kaj du frazoj por ekzerco. Sur la paĝoj ekde 3 ĝis 5 estis prezentitaj trafaj frazoj kaj senrilataj frazoj, hazarde miksitaj



*Stratbildo.*

inter si. La skalo estis prezentita sur la supra parto de ĉiu paĝo por ke la partoprenantoj ne forgesu pri tio, kiu numero (1 aŭ 5) indikas la plej altan akcepteblecon. Unu duono da trafaj frazoj el ĉiu speco aperis en la baza versio, dum alia duono da ili aperis en la transformita versio. Paĝo 6 montris la bildon kun instrukcio pri la maniero, en kiu ili priskribu ĝin. Paĝo 7 estis blanka, sur kiu la partoprenantoj priskribu la bildon. La bildo estis apartigebla, por ke ili povu priskribi la bildon, vidante ĝin samtempe.

La dua foliaro donita en la dua testfazo konsistis el 4 paĝoj. La unua paĝo klarigis, ke plia volo de la partoprenantoj estas necesa por plenumi la tutan esploron, kaj ke ili ricevas nur la taskon pri juĝado de akceptebleco de frazoj. Ni kolektis denove la samajn informojn pri partoprenantoj, donitaj en la unua testfazo, sole por ke la du foliaroj estu parigeblaj inter si. Paĝoj ekde 2 ĝis

4 prezentis entute 72 frazojn, 48 trafajn frazojn kaj 24 senrilatajn frazojn. La senrilataj frazoj estis samaj kiel tiuj uzitaj en la unua foliaro; tamen, la trafaj frazoj estis prezentitaj en versio malsama ol la versio prezentita en la unua foliaro.

Tiele, ĉiu partoprenanto juĝis ambaŭ versiojn de ĉiu trafa frazo de la tri specoj, kaj priskribis la bildon unufoje.

# 2. Rezultoj

## 2.1. Juĝado de akceptebleco de frazoj

Ĉar, kiel videblas en tabelo 2, ne ĉiu ĉelo de kombino de lingvo kaj sperto estas plenigita, analizoj estis tial faritaj en kelkaj manieroj, por ke ni povu eltiri kiel eble plej multe da informoj el la datumoj tie ĉi akiritaj.[7]


Statistikaj analizoj estis faritaj du-maniere laŭkutime: unue, ni kalkulis mezvalorojn pere de stimulaj frazmaterialoj, traktante partoprenantojn kiel hazardan variablon (partoprenantoj-analizo: $SD_1$, $F_1$); kaj due, ni kalkulis mezvalorojn pere de partoprenantoj, traktante stimulajn frazmaterialojn kiel hazardan variablon (materialoj-analizo, $SD_2$, $F_2$).

### 2.1.1. Sintagmo-konservanta disigo


Diagramo 2 sur p. 16 prezentas mezvalorojn kaj variantajn deviojn ($SD_2$) de juĝita akceptebleco akirita ĉe spertuloj. Analizo de varianco montris nur la efikon pro Versio de Frazoj (baza kontraŭ transformita), $F_2(1, 60) = 10{,}95$, $p < 0{,}01$. Tiu ĉi efiko tamen devenis nur de la diferenco inter la du versioj de frazoj ĉe ruslingvanoj: ruslingvanoj juĝis la bazajn frazojn pli akcepteblaj ol la transformitajn frazojn. Kontraste, neniu diferenco troviĝis inter la du versioj de frazoj ĉe aliaj tri lingvanoj. Tial tiuj ĉi lingvanoj juĝis la transformitajn frazojn tiel akcepteblaj kiel la bazajn frazojn.

Diagramo 3 (p. 16) montras juĝitajn akcepteblecojn ĉe komencantoj kaj spertuloj pri la tri lingvanoj, persa, hungara, kaj rusa. Analizo de varianco ($3 \times 2 \times 2$, nome (Lingvogrupo: persa, hungara, rusa) $\times$ (Sperto: komencantoj, spertuloj) $\times$ (Versio de Frazoj: bazaj, transformitaj)) montris signifan diferencon pro Lingvogrupo, $F_1(2, 64) = 6{,}11$, $p < 0{,}01$, $F_2(2, 90) = 5{,}31$, $p < 0{,}01$, Versio de Frazoj, $F_1(1, 64) = 18{,}50$, $p < 0{,}001$, $F_2(1, 90) = 43{,}23$, $p < 0{,}001$. La unua trovaĵo devenis de la fakto, ke perslingvanoj (mezvaloro

[7] Antaŭ ol ni donis testadon, ni pretigis po 16 testfrazojn pri ĉiu el la tri specoj de frazoj. Tamen, malkaŝiĝis la fakto nur post la plenumiĝo de la esploro, ke eraro en tajpado estis okazinta ĉe unu frazo el la frazoj kun sintagmo-konservanta disigo, kaj ke unu testfrazo el la frazoj kun sintagmo-rompanta disigo devis esti grupigita en la frazojn kun sintagmo-konservanta disigo. Tial, ni traktis la frazon kun tajpo-eraro kiel senrilatan frazon kaj reklasifikis la frazon, erare grupigitan en la frazoj kun sintagmo-rompanta disigo, al la aro da frazoj kun sintagmo-konservanta disigo. De tiu ĉi reklasifikado sekvis tio, ke la nombro de testfrazoj kun sintagmo-rompanta disigo fariĝis nur 15, kompare kun aliaj du specoj de testfrazoj kiuj ambaŭ inkludis 16 frazojn.




*Diagramo 2.* Juĝita akcepteblo pri frazoj kun sintagmo-konservanta disigo (spertuloj).





*Diagramo 3.* Juĝita akcepteblo pri frazoj kun sintagmo-konservanta disigo.

= 1,47) trovis frazojn de tiu ĉi speco pli akcepteblaj ol hungarlingvanoj (mezvaloro = 1,82). La dua trovaĵo indikis, ke, se oni kunmetas kaj la tri lingvanojn kaj la du nivelojn de lingvosperto, la baza versio de frazoj (mezvaloro = 1,54) estas pli akceptebla ol la transformita versio (mezvaloro = 1,76). Interdependo (angle: *interaction* kiel la statistika termino) inter Sperto kaj Versio de Frazoj, $F_2(1,90) = 5{,}64$, $p < 0{,}05$, kaj interdependo inter la tri variabloj estis signifaj, $F_2(2,90) = 4{,}03$, $p < 0{,}05$.

Analizoj aplikitaj aparte al ĉiu lingvogrupo montris, ke kvankam perslingvaj komencantoj juĝis la transformitajn frazojn malpli akcepteblaj ol la bazajn frazojn, $F_1(1,36) = 6{,}62$, $p < 0{,}05$, $F_2(1,60) = 7{,}70$, $p < 0{,}01$, perslingvaj spertuloj juĝis la transformitajn frazojn pli akcepteblaj ol la komencantoj, $F_1(1,18) = 17{,}52$, $p < 0{,}001$, $F_2(1,30) = 33{,}85$, $p < 0{,}001$. Perslingvaj spertuloj do rigardis ambaŭ versiojn de frazoj samnivele akcepteblaj. Hungarlingvaj komencantoj juĝis preskaŭ sammaniere kiel perslingvanoj: komenc-

antoj juĝis la transformitajn frazojn malpli akcepteblaj ol la bazajn, $F_1(1,18) = 9{,}07$, $p < 0{,}01$, $F_2(1,30) = 13{,}13$, $p < 0{,}01$, kvankam spertuloj juĝis la du versiojn de frazoj samnivele akcepteblaj. Kontraste, ruslingvaj komencantoj juĝis la du versiojn samnivele akcepteblaj, kvankam spertuloj taksis la transformitajn malpli akcepteblaj ol la bazajn, $F_2(1,30) = 8{,}05$, $p < 0{,}05$. Tamen tiu ĉi lasta trovaĵo devenis de iom da altiĝo de akceptebleco pri la bazaj frazoj ĉe spertuloj. Neniu ŝanĝo pro sperto okazis pri la transformitaj frazoj.

Diagramo 4 ĉi-sube prezentas la rezultojn pri la tri grupoj de partoprenantoj ĉe hungarlingvanoj kaj ruslingvanoj.





*Diagramo 4.* Juĝita akcepteblo pri frazoj kun sintagmo-konservanta disigo.

Analizo de varianco (2 × 3 × 2; nome (hungarlingvanoj, ruslingvanoj) × (komencantoj, progresantoj, spertuloj) × (bazaj, transformitaj)) montris signifajn diferencojn pro Lingvogrupo, $F_1(1,66) = 7{,}11$, $p < 0{,}01$, $F_2(1,90) = 7{,}36$, $p < 0{,}01$, kaj pro Versio de Frazoj, $F_1(1,66) = 13{,}46$, $p < 0{,}001$, $F_2(1,90) = 28{,}11$, $p < 0{,}001$. La unua trovaĵo indikas, ke ruslingvanoj (mezvaloro = 1,57) juĝis frazojn de tiu ĉi speco pli akcepteblaj ol hungarlingvanoj (mezvaloro = 1,83). La interdependo inter la tri variabloj estis ankaŭ signifa, $F_2(2,90) = 3{,}73$, $p < 0{,}05$. Tiu ĉi interdependo devenis unue de tio, ke ambaŭ grupoj de hungarlingvanoj, komencantoj, $F_1(1,30) = 9{,}91$, $p < 0{,}01$, $F_2(1,45) = 11{,}90$, $p < 0{,}01$ kaj progresantoj, $F_1(1,30) = 9{,}02$, $p < 0{,}01$, $F_2(1,45) = 10{,}48$, $p < 0{,}01$, juĝis la bazajn frazojn pli akcepteblaj ol la transformitajn, kvankam tia diferenco inter la du versioj ne troviĝis ĉe spertuloj, kaj due de tio, ke plene inversa formo de diferenco okazis ĉe ruslingvanoj. Nur ruslingvaj spertuloj juĝis la bazajn frazojn pli akcepteblaj ol la transformitajn, $F_2(1,45) = 9{,}67$, $p < 0{,}01$, dum tia diferenco ne troviĝis ĉe komencantoj nek ĉe progresantoj (vd. diagramon 4).


### 2.1.2. Sintagmo-rompanta disigo

Diagramo 5 (ĉi-sube) prezentas la rezultojn pri la spertuloj. Nur la efiko de Versio de Frazoj estis signifa, $F_1(1,41) = 79{,}36$, $p < 0{,}001$, $F_2(1,56) = 133{,}58$, $p < 0{,}001$, tiel ke la transformitaj frazoj estis malpli akcepteblaj ol la bazaj ($p < 0{,}001$ ĉe ĉiuj lingvogrupoj).





*Diagramo 5.* Juĝita akcepteblo pri frazoj kun sintagmo-rompanta disigo (spertuloj).

Diagramo 6 (vidu ĉi-sube) prezentas la rezultojn ĉe tri lingvogrupoj. Krom la efiko pro Versio de Frazoj, $F_1(1,64) = 138{,}01$, $p < 0{,}001$, $F_2(1,84) = 190{,}94$, $p < 0{,}001$, estis ankaŭ la signifa efiko pro Sperto, $F_1(1,64) = 9{,}82$, $p < 0{,}01$, $F_2(1,84) = 10{,}84$, $p < 0{,}01$. La lasta trovaĵo montras, ke spertuloj donis ĝenerale pli altan akcepteblecon (mezvaloro = 1,81) ol komencantoj (mezvaloro = 2,11). Apartaj analizoj indikis, ke altiĝo de akcepteblеco estis plej rimarkinda ĉe perslingvanoj kiam ili juĝis la transformitajn frazojn ($p < 0{,}01$).




*Diagramo 6.* Juĝita akcepteblo pri frazoj kun sintagmo-rompanta disigo.

Diagramo 7 (ĉi-sube) prezentas la rezultojn ĉe du grupoj de partoprenantoj el hungarlingvanoj kaj ruslingvanoj. Ruslingvanoj (mezvaloro = 1,74) donis pli altan akcepteblecon ol hungarlingvanoj (mezvaloro = 2,11), $F_1(1,66) = 12{,}79$, $p < 0{,}001$, $F_2(1,84) = 17{,}33$, $p < 0{,}001$, krom signifa efiko pro Versio de Frazoj, $F_1(1,66) = 105{,}07$, $p < 0{,}001$, $F_2(1,84) = 140{,}48$, $p < 0{,}001$. Interdependo inter Lingvogrupoj kaj Sperto estis ankaŭ signifa, $F_1(2,66) = 3{,}51$, $p < 0{,}05$, $F_2(2,84) = 4{,}76$, $p < 0{,}05$. Tio ĉi indikas ke ruslingvaj progresantoj, kompare kun ties komencantoj kaj spertuloj, juĝis la transformitajn frazojn pli akcepteblaj ($p < 0{,}01$) , dum tia tendenco ne troviĝis ĉe hungarlingvanoj.





*Diagramo 7.* Juĝita akcepteblo pri frazoj kun sintagmo-rompanta disigo.


### 2.1.3. Kromvorto

Diagramo 8 (p. 20) prezentas rezultojn pri frazoj kun kromvorto ĉe la spertuloj. Troviĝis nur la signifa diferenco pro Versio de Frazoj, $F_1(1,41) = 29{,}07$, $p < 0{,}001$, $F_2(1,60) = 12{,}68$, $p < 0{,}001$. Tri lingvanoj, escepte de anglalingvanoj, juĝis la transformitajn frazojn malpli akcepteblaj ol la bazajn ($p < 0{,}05$ per ambaŭ manieroj de analizo, partoprenantoj kaj materialoj). Ne troviĝis signifa diferenco pro Lingvogrupo. Spertuloj do rigardis la frazojn de tia ĉi speco samnivele malgraŭ la diferenco de lingvoj.

Diagramo 9 (vidu paĝon 20) prezentas rezultojn ĉe komencantoj kaj spertuloj. Analizo montris ĉi tiu-foje – kondiĉe ke anglalingvanoj estas forstrekitaj kaj komencantoj aldonitaj – la signifan diferencon pro Lingvogrupo, $F_1(2,64) = 94{,}38$, $p < 0{,}05$, $F_2(2,90) = 5{,}90$, $p < 0{,}01$. Hungarlingvanoj (mezvaloro = 2,16) juĝis do tian ĉi specon de frazoj malpli akcepteblaj ol ruslingvanoj (mezvaloro = 1,79). Transformitaj frazoj estis juĝitaj ĝenerale pli malakcepteble ol la bazaj frazoj, $F_1(1,64) = 39{,}72$, $p < 0{,}001$, $F_2(1,90) = 24{,}52$, $p < 0{,}001$. Specife, tamen, la diferenco inter la du versioj de frazoj troviĝis ĉe ambaŭ grupoj de perslingvanoj ($p < 0{,}05$), kvankam kaj pri hungarlingvanoj kaj pri ruslingvanoj troviĝis tiu diferenco nur ĉe spertuloj. La formo de diferenco pri la lastaj du lingvanoj tamen estis malsama. Specife, hungarlingvaj




*Diagramo 8.* Juĝita akcepteblo pri frazoj kun kromvorto (spertuloj).





*Diagramo 9.* Juĝita akcepteblo pri frazoj kun kromvorto.

spertuloj emis doni pli altan akcepteblecon al la bazaj frazoj ol komencantoj, kvankam la du grupoj de hungarlingvanoj donis samnivelajn akcepteblecojn al la transformitaj frazoj. Kontraste, ruslingvaj spertuloj emis doni malpli altan akcepteblecon al la transformitaj frazoj ol ruslingvaj komencantoj, dum ne troviĝis tia tendenco kiam ili juĝis la bazajn frazojn.

Diagramo 10 sur p. 21 prezentas rezultojn ĉe tri grupoj de partoprenantoj el hungarlingvanoj kaj ruslingvanoj. Efikoj pro Lingvogrupo, $F_1(1,66) = 6{,}27$, $p < 0{,}05$, $F_2(1,90) = 10{,}33$, $p < 0{,}001$, kaj pro Versio de Frazoj, $F_1(1,66) = 36{,}49$, $p < 0{,}001$, $F_2(1,90) = 22{,}56$, $p < 0{,}001$, estis tiel samdirekte signifaj kiel skribite en la supra paragrafo pri la du lingvoj. Krome, la efiko de Sperto estis signifa, $F_2(2,90) = 3{,}16$, $p < 0{,}05$, tiel ke progresantoj (mezvaloro $= 1{,}76$) donis pli altan akcepteblecon ol komencantoj (mezvaloro $= 2{,}00$). Apartaj analizoj faritaj laŭ la apartaj lingvanoj montris, ke hungarlingvaj progresantoj

juĝis la bazajn frazojn pli akcepteblaj ol samlingvaj komencantoj ($p < 0,05$), kaj ke ruslingvaj progresantoj juĝis la bazajn frazojn pli akcepteblaj ol la transformitajn.





*Diagramo 10.* Juĝita akcepteblo pri frazoj kun kromvorto.

### 2.1.4. Sintagmo-konservanta kontraŭ sintagmo-rompanta disigo

Du tipojn de disigo, sintagmo-konservanta kaj sintagmo-rompanta, ni komparis por analizi ties influon sur juĝitan akcepteblecon. La analizon ni faris aparte pri ĉiu lingvogrupo kombine kun ĉiu lingvosperto. La suma nombro de kombinoj do fariĝis naŭ. Du tipojn de analizoj ni faris pri ĉiu el la naŭ kombinoj, do 18 analizoj entute. Diagramoj 11 (p. 22) prezentas juĝitajn akcepteblecojn akiritajn nur pri kvar el tiuj 9 kombinoj, nome: spertuloj el la kvar lingvogrupoj, angla, persa, hungara kaj rusa. Ĉiu diagramo montras du trafajn diferencojn menciindajn. Unua diferenco okazis inter du specoj de transformitaj frazoj, sintagmo-konservantaj kaj sintagmo-rompantaj. Alia diferenco okazis inter sintagmo-rompantaj frazoj, bazaj kaj transformitaj, tiel ke sintagmo-rompantaj bazaj frazoj estis juĝitaj pli akcepteblaj ol sintagmo-rompantaj transformitaj frazoj. Tiuj ĉi du diferencoj estis konfirmitaj samtempe pere de partoprenantoj-analizo kaj materialoj-analizo (Tukey-testoj, $p < 0,05$). Ankaŭ pri ceteraj analizoj aplikitaj al ĉiu lingvogrupo kombinita kun ĉiu lingvosperto troviĝis supraj du distingaj diferencoj, escepte de unu analizo, nome: rusaj progresantoj pere de materialoj-analizo. Ĉi tiu lasta analizo montris, ke rusaj progresantoj ne juĝis sintagmo-konservantajn transformitajn frazojn pli akcepteblaj ol sintagmo-rompantajn transformitajn frazojn.

## 2.2. Priskribado de bildo

En ĉi tiu sekcio nia precipa tasko estas analizi la verkojn de la partoprenantoj en la enketo, kiam temas pri libera priskribo de bildo (vd. paĝon 14). Ni provos ankaŭ, kiom eblas, eltiri frazojn utilajn rilate al nia analizo pri frazoj




*Diagramo 11.* Juĝita akcepteblo pri frazoj kun sintagmo-konservanta kaj sintagmo-rompanta disigoj (spertuloj).

kun sintagmo-konservanta disigo kaj kun sintagmo-rompanta disigo kaj pri la uzo de kromvortoj.

Ni preteratentas, en ĉi tiu analizo, la kutimajn erarojn de komencantoj, kiuj troviĝas ĉe ĉiuj el la testitaj komencantoj. Ni ankaŭ preteratentas nesistemajn erarojn pri aliaj gramatikaj punktoj (ekzemple: uzo de la tempoj de la verboj en dependaj frazoj).

El la metoda vidpunkto ĉi tiu analizo povas esti kritikata, ĉar ĝi sekvas la tradician analizon de la eraroj, kiu estis komuna jam en la 50-aj jaroj (Lado 1957). Tamen ni, kaj multaj aliaj, rimarkigas, ke ekzistas ankaŭ serio de eraroj, kies fonto estas la unua lingvo de la lernantoj. Oni povas kiel ajn diskuti pri la ekzisto aŭ neekzisto de reguloj de Universala Gramatiko (Bettoni 2001), pri la rekta aŭ nerekta alirebleco de tiuj reguloj fare de la lernantoj (Pienemann 1989). Restas faktoj, kiuj estas malfacile klarigeblaj alimaniere.

### 2.2.1. Eraroj bazitaj sur la son-strukturo de esperanto kompare kun la son-strukturo de la lingvoj de la lernantoj

Analizo de eraroj pri elparolo certe devas esti farata surbaze de surbendigita son-materialo. Aliflanke, kiel spertaj instruistoj scias, ankaŭ el la analizo de skribaj produktaĵoj oni povas vidi kelkajn tendencojn. Kiu ne trovis erarojn de eĉ tre spertaj japanaj esperantistoj pri *l* kaj *r*?

2.2.1.1. La ruslingvaj komencantoj (sed kun ili ankaŭ 5 progresantoj kaj 1 spertulo) sisteme konfuzas la sonojn *i* kaj *e* de esperanto en neakcentata pozicio, kvankam plej ofte la *i* fariĝas *e*. En la priskriboj ni havas "remarkas" (4 fojojn), "regardas" (5), "ditale" (1), "repari" (1), "manikeno" (1), "redetas" (1), "verino" (1), "vindisto" (1). Eĉ supraĵa kono de la rusa son-sistemo montras ke tiuj konfuzoj en neakcentataj pozicioj estas rilatigeblaj al la sonsistemo de la gepatra lingvo. Ankaŭ en ĉi tiu kazo funkcias principo de troa ĝusteco.

2.2.1.2. Ĉe perslingvaj komencantoj oni rimarkas konfuzon simila je tiu de la rusoj, sed plej ofte pri la vokalo *u*, kiu fariĝas *a*, kaj pri la vokalo *o*, kiu fariĝas *u*. Ekzemploj: ($u \rightarrow a$) "rabaĵujo" (rubaĵujo), "rabaĵoj" (rubaĵoj), "sarmetis" (surmetis); ($o \rightarrow u$) "resturacio" (restoracio), "telefon-kiusko" (telefon-kiosko), "ŝufero" (ŝoforo). Aliaj ekzemploj: "ŝaforo" (ŝoforo), "robejo" (rubejo), "setelo" (sitelo), "outomobilo" (aŭtomobilo), "secias" (scias).

Ni ne povas juĝi ĉu la ofta erara uzo de "kio" anstataŭ *kiu* havas la saman kaŭzon, sed evidente ioma influo de la malfacilo por perslingvanoj distingi mallongan *u* de *o* devas roli.

2.2.1.3. Ĉe la hungaraj lernantoj – komencantoj kaj progresantoj – oni trovas nur la sisteman ellason en la skribo de la supersigno en *ŭ*. Ni trovas la vorton *aŭto* (ankaŭ en la formoj *aŭtomobilo* aŭ *aŭtobuso*) sisteme sen la supersigno ĉe 6 hungaraj progresantoj.

Ni ne estas en pozicio diri, ĉu temas nur pri skriberaro, tamen stranga, aŭ ĉu ĝi estas iel influata de la elparolo de hungaraj esperantistoj aŭ ĉu pli simple la solvo estas trovebla en la manko de diftongoj en la hungara.

### 2.2.2. Eraroj kaj inventemo je la nivelo de la vortoj

2.2.2.1. La plej okulfrapa fenomeno, sendepende de la lingvo de la lernantoj, estas la inventemo, la uzo de la konataj radikoj por krei novajn vortojn, kies "normala" formo ne estas konata. Se ni prenas la nocion *voj-kruciĝo*, ni trovas apud ĉi tiu vorto la jenajn: "voj-kruco", "kruc-vojo", "kruco", "kvarvojoj", "duon-kruco", "interkruciĝaj stratoj", "strat-krucaĵo", "kruciĝantaj stratoj".

La samo validas por la nocio *franc-stilaj longaj panoj*, kiuj fariĝas "bastonaj longaj bulkoj", "bulkegoj", "pan-buloj", "longaj pan-briketoj", "longaj panoj" kaj "long-panoj".

Same la bariloj, kiuj malhelpas, ke oni enfalu en kavon en la strato, estas "striitaj, porteblaj bariletoj", "averto-pordoj", "barieroj".

Kaj la ejo en kiu estas la publika telefono estas “telefon-budo”, “telefon-domo”, “telefon-kabano” , “telefon-kabino” aŭ “niĉo”.

La efektive malofta vorto “manekeno” fariĝas “vesto-statuo” por persa komencanto kaj “pup-manekeno” por hungara spertulo.

Aliaj rimarkindaj inventoj estas: “balaaĵulo” (forportanto de ruboj), “bala-aĵujo, forĵetitaĵujo” (granda rubkolekta fera skatolego en la strato), “pied-linio” (zebra pasejo por piedirantoj en la strato), “malpur-akva-kanalo” (kloako).

Estas interese rimarki ke pluraj el la formoj konstruitaj ne estas komunaj. Kelkaj, kompreneble, estas malĝustaj kiel “voj-uzisto”, per kiu angla komenc-anto provas redoni la anglan *road user,* kio eventuale povus esti *voj-uzanto*.

2.2.2.2. Multaj estas influataj de la propra lingvo kaj kreas vortojn en esperanto laŭ propralingvaj vortoj perceptataj kiel internacie kompreneblaj, ĉar temas pri fremdaj vortoj enportitaj en la lokan lingvon.

Rusoj, ankaŭ progresantoj, relative ofte uzas la vorton *pavilono* en la senco de ‘vendejo’. Kaj same ili estas konvinkitaj (ankaŭ spertuloj) ke “batono” estas bona esperanta vorto por ‘longaj, francaj panoj’. Fakte en la rusa *baton* estas ‘longa, franca pano’, *barjer* estas difinita speco de barilo, ktp. Evidente la nacia lingvo influas ankaŭ pri la vortkunmetado, ĉar la rusa *telefonnaja budka* fariĝas nia *telefon-budo* kaj *telefonnaja kabina* fariĝas “telefon-kabino”.

2.2.2.3. Multaj estas influataj de la fremdaj lingvoj, kiujn ili konas. Tiel oni povas klarigi la vortojn *mendas* kaj *fiksas* en la senco de ‘riparas’, “marketo” por ‘vendejo’, “taŝo” por ‘mansako’, “kofero” por ‘valizo’, “konzolo” por ‘pakaĵ-ujo de biciklo’.

2.2.2.4. Ekzistas, krome, kelkaj aliaj problemoj tipaj por la parolantoj de difinitaj lingvoj. Persaj progresantoj havas problemojn distingi *homo* de *popolo* kaj ofte uzas la vorton *popoloj* por *homoj* kaj same la vorton *kokoj* por *ovoj*. Ĉi tiu lasta problemo okazas ankaŭ ĉe unu rusa progresanto.

Nur hungaraj komencantoj kaj progresantoj havas problemojn kun sufiksoj kaj entute kun la principo de neceso kaj sufiĉo. Tiel oni povas klarigi formojn kiel “virulo”, “virinulo”, “studentisto”, kaj eble “vendeto” (vendisto).

Kiel apartaĵon ni menciu la kazon de persa spertulo, kiu kreas la vorton “mulaĝo” por ‘manekeno’.

2.2.2.5. Apartan problemon montras anglalingvanoj pri la distingo inter formoj kiel *promenante/promenanta*. Ofte oni trovas frazojn de la speco “Mi estas promenante”.

Nenio alia ol la multaj funkcioj de la formo *-ing* en la angla povas esti rigardata kiel respondeca pri ĉi tiu eraro. Perslingvanoj havas tipan eraron, kiun konantoj de tiu lingvo tuj rekonos. Ili emas sisteme produkti frazojn de la speco: *Mi vidis la virinon, ke promenas*, aŭ eĉ: *Jen la urbo, ke mi loĝas*. Ili donas al la esperantlingva *ke* ĉiujn funkciojn de la persa *ke*.

### 2.2.3. Je la nivelo de esprimoj (sintagmoj)

En ĉi tiu esploro ni aparte interesiĝis pri la problemo de disigo de frazelementoj, sintagmo-konservanta kaj sintagmo-rompanta disigoj, kaj de kromvortoj. La absoluta plejmulto de la liberaj priskriboj de la lernantoj estas laŭ la tipa esperantlingva vortordo. Tamen rusaj lernantoj – komencantoj, progresantoj kaj spertuloj – uzas esprimojn kiel ĉi tiujn:

"... el ĵus venintaj al vendejo vestaĵoj"
"... vidi transirantan la vojon viron"
"... plenigitan ĝis la rando rubujon"
"... li transportas por kuiri kuketojn ovojn"

en kiuj la kernvorto – substantivo, ĉi-kaze, *vestaĵoj, viron, rubujon* kaj *ovojn* en la supraj esprimoj – estas ĉe la fino de la sintagmo, male al la statistike plej kutima maniero en esperanto kun kernvorto en la komenco, ekzemple,

"... el vestaĵoj ĵus venintaj al vendejo".

Cetere la kvara ekzemplo imitas samordajn rusajn frazojn.

La ĉi sekvaj du esprimoj, respektive de rusa spertulo kaj persa progresanto estas la solaj ekzemploj de divido de sintagmo, kiujn ni trovis.

"... alian virinon ni vidas elirantan"
"... skuas sian la manon"

Ĉiuj ĉi-supraj ekzemploj, aliflanke, povas esti interpretataj kiel sintagmo-rompantaj disigoj, en la senco klarigita komence de ĉi tiu artikolo. Aliflanke, malgraŭ tio, ke konsidero de la bildo indikas ke la senco estas 'mi vidas alian elirantan virinon', la ekzemplo ne estas tute certa pro la verbo 'vidi'.

Entute ni ne trovis ekzemplojn en kiuj oni uzas frazojn kun kromvortoj aŭ sen kromvortoj. Oni povas argumenti, ke ĉar temas pri liberaj priskriboj la priskribintoj provis entute eviti tiujn frazojn.

### 2.2.4. Je la nivelo de frazoj

En la absolute plej granda parto de la frazoj la ordo estas S(ubjekto), V(erbo), O(bjekto), observo simila al tiu de Sherwood (1982), kiu analizis interparolon en esperanto. Tamen ĉe rusoj kaj hungaroj (komencantoj, progresantoj kaj spertuloj) troviĝas ĉiuj eblaj fraz-ordoj, kiuj ĉiuj entenas sintagmo-konservantan disigon. Ekzemple,

*OVS:*
"la knabon punos lia majstro"
"la straton ĉe la angulo transiras viro"
"ĵus la vendejon lasis virino"
"vojon transiras inĝeniero"
"ovovendiston oni vidas"
"ŝin salutas feliĉa virino"
"en la magazeno diversajn varojn proponas la vendisto"
"la montran fenestron de butiko okulumas virino"

Al tiu grupo oni povas aldoni ankaŭ la jenan frazon, kiu havas komplementon en la unua pozicio:

"el la bakejo elvenas virino nun"

*SOV:*

"la virino florojn transportas"

"kiu multajn varojn aĉetis"

"pri kiu mi skribi ne volas"

La lasta esprimo inkludas sintagmo-rompantan disigon.

*Aliaj:*

"kaj en la dekstra mano paperoj estas"

"balaaĵkeston forlokumis la oni"

"fermoplaton apogis al la stratorando la oni"

"li malfruas, ĉi tial estas la virino kolera"

Inter la aliaj estas aparte rimarkindaj la jenaj:

"balaaĵkeston forlokumis la oni"

"fermoplaton apogis al la stratorando la oni"

kiuj estas de hungara komencanto, kiu donas difinitecon al la subjekto *oni* per la artikolo *la*.

### 2.2.5. Apartaĵoj

En la tekstoj estas troveblaj ankaŭ esprimoj, kiuj venas de la gepatra lingvo de la verkinto. Ĝenerale temas pri laŭvortaj tradukoj, kiuj ne funkcias je internacia nivelo. Persa spertulo uzas la frazon:

"... la arboj daŭrigas verda(n) sian verdecon"

kies senco estas

"la arboj plu estas verdaj".

Kvankam teorie ebla tiu frazo evidente impresas kiel io nekutima. Rusa spertulo diras: "... (li) ... kaptas kornikojn buŝe". La senco, klara el la kunteksto, estas:

"... li ne atentas tion, kio estas okazanta/ li gapas antaŭ si".

Tamen la metaforo ne ŝajnas tuj komprenebla ĝenerale. Ĝi venas el la rusa dirmaniero *kaptadi kornikojn* 'fari ion malatente'.

Rusaj spertuloj uzas kelkajn fojojn la esprimojn:

"okaziĝi sub aŭto"

"ambaŭ okazas sur la tero"

kies signifo laŭ la kunteksto estas: 'fali sub aŭtomobilon', 'esti surveturata de aŭtomobilo' kaj 'fali pro akcidento sur la grundon' pro la rusa falsa amiko *okazat'sja* 'montriĝi, hazarde esti, fali, trafi'.

Angla komencanto tre ĉarme laŭvorte tradukas: "neniu biciklo-rajdanto estas paganta atenton" kun la signifo: 'neniu biciklanto estas atentanta' kaj "havas kelkajn aĵojn por aĉeti" kun la signifo: 'devas aĉeti kelkajn aĵojn'.

# 3. Diskuto

## 3.1. Sintagmo-konservanta disigo

Ĉe spertuloj ne troviĝis diferenco aŭ pro lingvogrupo aŭ pro versio de frazoj, escepte de la transformitaj frazoj juĝitaj malpli akcepteblaj ol la bazaj nur ĉe ruslingvanoj. La kvar lingvanoj do donis preskaŭ similan nivelon de akcepteblеco al la frazoj, kiuj inkludis la sintagmo-konservantan disigon. Tial la rezulto subtenas nian duan prognozon: spertuloj, malgraŭ la diferenco de siaj lingvoj, emas juĝi la transformitajn frazojn tiel akcepteblaj kiel la bazajn frazojn. Ni povas do diri, ke ili atingis pli aŭ malpli saman staton de lingvoscio pri tia ĉi sintaksa trajto de esperanto.

Komparo de komencantoj kaj spertuloj plene subtenis la duan prognozon por perslingvanoj. Nome, komencantoj el tiu ĉi lingvogrupo juĝis la transformitajn frazojn malpli akcepteblaj ol la bazajn frazojn, dum neniu diferenco troviĝis ĉe spertuloj. Plue, la efiko de sperto aperis nur ĉe juĝado de la transformitaj frazoj, precipe ĉe perslingvanoj. Tio ĉi sugestas, ke sperto en esperanto ebligas al perslingvanoj pli kaj pli akcepti frazojn kiuj inkludas la sintagmo-konservantan disigon. Ĉar la persa ne permesas tian ĉi disigon, la trovaĵo tial estas plene komprenebla. Tamen ĉi tiu interpretado ne estas aplikebla senkondiĉe al la hungara. Tio estas pro tio, ke la hungara permesas tian ĉi disigon, kvankam la komencantoj juĝis la bazajn frazojn pli akcepteblaj ol la transformitajn.

La diferenco inter la du versioj de frazoj troviĝis ankoraŭ ĉe progresantaj hungarlingvanoj (vd. diagramon 4, p. 17). Ĉar ne sufiĉaj datumoj por perslingvaj progresantoj estis haveblaj, tial ne eblas plua ĝeneraligo al aliaj lingvanoj krom la hungarlingvanoj. La trovaĵo ĉe la hungarlingvanoj sugestus, ke tiom da spertoj en esperanto kiom havis la progresantaj hungarlingvanoj estus ne sufiĉa por nuligi la diferencon inter la du versioj de frazoj.

Tute mala tendenco okazis ĉe ruslingvanoj. Specife, la komencantoj kaj la progresantoj donis samnivelajn akcepteblecojn al la du versioj de frazoj, dum spertuloj juĝis la bazajn frazojn pli akcepteblaj ol la transformitajn. Kial okazis tiu ĉi rezulto estas tamen ne klare. Tio ĉi estas pro tio, ke ĉar la rusa lingvo permesas la sintagmo-konservantan disigon, tial ni hipotezis, ke ne okazos diferenco inter la du versioj de frazoj. Tre verŝajne la fakto ke la spertaj ruslingvanoj taksis la transformitajn frazojn malpli akcepteblaj ol la komencantoj povas esti kaŭzita de ia superkorektismo (evito de frazotipoj konceptataj rusecaj).[8]

## 3.2. Sintagmo-rompanta disigo

Sendepende de lingvogrupoj, spertuloj montris similan nivelon de juĝita akcepteblеco al la bazaj kaj al la transformitaj frazoj, kvankam la lastajn frazojn

[8] Tiun ĉi interpreton ni ŝuldas al Lindstedt kaj Kolker.

ili juĝis malpli akcepteblaj ol la unuajn. Do ankaŭ pri la sintagmo-rompantaj frazoj sperto en esperanto ebligis al lingvanoj alpreni samnivelan kriterion de akceptebleco. La trovaĵo tial konformiĝas al nia tria hipotezo.

Tamen, okazis diferenco inter la du versioj de frazoj eĉ ĉe la spertuloj kaj sendepende de la lingvogrupoj. Ni antaŭvidis, ke sendepende de sperto ruslingvanoj juĝos la du versiojn de frazoj similnivelaj en akceptebleco. Tio ĉi estas antaŭ ĉio pro tio, ke sintagmo-rompantan disigon permesas la rusa mem, kaj ke la transformitaj frazoj kun tiu ĉi disigo, laŭ Kalocsay & Waringhien (1985), estas uzataj de slavoj. Tamen ne troviĝis tia tendenco. La transformitajn frazojn ili juĝis malpli akcepteblaj ol la bazajn frazojn, sendepende de sperto. Tiu ĉi trovaĵo estas akirita ankaŭ ĉe la ceteraj tri lingvogrupoj. Ĉiuj lingvanoj testitaj do rigardis tiajn ĉi sintagmo-rompantajn frazojn ne tiel akcepteblaj kiel la bazajn frazojn.

Notinda tamen estas la fakto, ke la kvar grupoj de spertuloj ne rifuzis la interrompiĝon de sintagmo tiugrade, ke ili juĝis la transformitajn frazojn plej malakcepteble. La mezvaloroj donitaj de la kvar grupoj de spertuloj estis malpli ol tri sur la 5-poenta skalo. Plue notindas, ke eĉ anglalingvaj kaj perslingvaj spertuloj donis al la transformitaj frazoj mezvaloron pli aŭ malpli similan al la aliaj du lingvanoj. La sintakso de la angla kaj la persa ne permesas la interrompiĝon de tiu ĉi speco. La trovaĵo do indikas, ke sperto en esperanto ebligis al tiuj ĉi du lingvanoj alpreni sintakson malsaman de tiu de sia lingvo, la angla kaj la persa. Ankoraŭ plue ni devas mencii, ke la mezvaloro donita al la transformitaj frazoj de la perslingvaj komencantoj estis malpli ol tri. Tio ĉi sugestas, ke komencantoj alprenas pli-malpli rapide la sintaksan trajton ne permeseblan en sia gepatra lingvo.

Ruslingvaj progresantoj juĝis la transformitajn frazojn pli akcepteblaj ol ruslingvaj komencantoj kaj spertuloj. Kaŭzon por tiu ĉi rezulto ni tamen ne povas klarigi. Estas nun ne distingeble, ĉu la rezulto devenis de nesufiĉo de nombro de partoprenantoj ($n = 9$) aŭ ĉu ĝi spegulas ion signifan rilate al psikologia procezo.

### 3.3. Komparo de sintagmo-konservanta kontraŭ sintagmo-rompanta disigo

Kvankam esperanto permesas tiujn ĉi du specojn de disigo, sintagmo-rompanta disigo estas pli serioza ol sintagmo-konservanta disigo pro tio, ke la unua disigo rompas substantivan aŭ verban sintagmon, dum la lasta konservas ilin, almenaŭ iom grade. Alivorte, en la sintagmo-rompanta disigo sintagmoelementoj eltiriĝas el la sintagmo kadrita pli profunde en arbstrukturo ol en la sintagmo-konservanta disigo.

La diferenciga influo de tiu ĉi du specoj de disigo sur juĝadon de akceptebleco estis klare observita en la nuna esploro. Nome, montriĝis pere de ambaŭ analizoj – partoprenantoj kaj materialoj – ke frazoj kun sintagmo-

rompanta disigo estis juĝitaj malpli akcepteblaj ol tiuj kun sintagmo-konservanta disigo, de ĉiuj lingvogrupoj kaj en ĉiuj niveloj de sperto, sendepende de permesateco de unu aŭ alia speco de disigo, escepte, tamen, de ruslingvaj progresantoj testitaj pere de materialoj-analizo. Kontraste, frazoj kun sintagmo-konservanta disigo estis samnivele juĝitaj kiel bazaj frazoj kiuj ne inkludas disigon.

Oostendorp (1991) rifuzas frazojn kun sintagmo-rompanta disigo kiel negramatikajn. Lia lingva intuicio prave prognozas, ke frazoj kun sintagmo-rompanta disigo estas pli malaltaj je juĝita akceptebleco ol tiuj kun sintagmo-konservanta disigo. Ni devas tamen mencii la rezulton akiritan en la nuna esploro, ke eĉ la frazoj kun sintagmo-rompanta disigo ne estis juĝitaj tiel mal-akcepteblaj kiel la juĝado de Oostendorp (1991) implicas.[9] Kiel ni supre raportis, eĉ la perslingvaj komencantoj donis al la sintagmo-rompantaj frazoj mezvaloron de akceptebleco malpli ol tri. Teoriaj lingvistoj emas juĝi gramatikecon[10] de frazoj surbaze de tio, ĉu apartaj frazoj estas generitaj tutkonforme al iuj aŭ aliaj principoj aŭ kondiĉoj sintakse difinitaj. Tamen, efektiva – kontraŭe al idealigita – stato de lingvoscio aspektas ne tiel, kiel teoriaj lingvistoj, inkluzive de Chomsky, asertas pri ĝi, nome: la stato estas nenio alia ol tio, kion priskribas la genera gramatiko kiu distingas gramatikecon en la ĉio-aŭ-nenio-maniero, klasfikante frazojn aŭ en unu kategorion de gramatikaj frazoj aŭ en alian kategorion de negramatikaj frazoj. La efektiva stato aspektas anstataŭe tiel, ke juĝado de vivantaj – ree kontraŭe al idealigita – parolantoj falas ien sur la kontinuaĵo ekde maksimuma ĝis minimuma gramatikeco, kiel ni ripetis kelkloke (Nagata 1988, 1989, 1992, l997a, 1997b, 2001; Nagata & Bain 2000; vd. ankaŭ Schütze 1996).

## 3.4. Kromvorto

Konforme al la lingvotrajto de la angla, kiu parte permesas al si enteni la kromvorton, anglalingvaj spertuloj samnivele rigardis la du versiojn de frazoj

[9] Akceptebleco de frazoj ĝenerale varias depende de kunteksto en kiu ili aperas (ekz. Hill 1961, Bolinger 1968, Bever 1970, Greenbaum 1976, Lakoff 1977). Notindas tamen, ke ĉiuj unuopaj frazoj ĉi tie uzitaj estas prezentitaj sen kunteksto. Tial ni ne bezonas konsideri influojn de iuj aŭ aliaj kuntekstoj sur la juĝadojn de la frazoj. Eĉ se ne forigeblus tiaj influoj, ili tamen devas esti tiele okazintaj en ĉiuj testkondiĉoj sendepende de lingvogrupo, sperto kaj versio de frazoj, ke oni povus nuligi tiajn influojn.

[10] La koncepto de gramatikeco, laŭ Newmeyer (1983), estas valida nur kiam ĝi koncernas apartan formalan reprezentadon de kompetenteco (angle: *competence*) de parolantoj. Kontraste, akceptebleco estas la koncepto ordinare uzata por priskribi aktualan juĝadon kiun montras parolantoj rilate al la bonformeco de frazoj. Ni opinias, ĉiu-okaze, ke la diferenco inter la du konceptoj restos ne valida. Tio ĉi estas unuflanke pro tio, ke la gramatikeco estas atingebla nur pere de empiriaj datumoj pri akceptebleco, kaj aliflanke pro tio, ke ĉiuj normalaj homoj, laŭ Chomsky, atingas finan stabilan staton de lingvoscio, kiu ebligas al ili distingi gramatikajn frazojn disde negramatikaj, anstataŭ akcepteblajn frazojn disde neakcepteblaj. Ekzistas certa konfuzo inter aktualaj kaj idealigitaj homoj, kiam Chomsky parolas pri lingvoscio. Vd. ankaŭ Christiansen & Chater (1999) pri rilataj argumentoj.

kiel akcepteblajn sendepende de tio, ĉu la frazoj entenas aŭ ne entenas kromvorton. Kontraŭe, spertuloj el aliaj tri lingvanoj juĝis la transformitajn frazojn sen kromvorto malpli akcepteblaj ol la bazajn frazojn kun ĝi. Rezultoj pri hungarlingvaj spertuloj kaj ruslingvaj spertuloj estas kontraŭ nia prognozo, ĉar kaj la hungara kaj la rusa, same kiel la angla, permesas forigon de kromvorto.

La tri lingvogrupoj – persa, hungara kaj rusa – evidentigis ne similan juĝadon kiam spertuloj estas komparataj kun komencantoj. Specife, la diferenco inter la du versioj aperis jam ĉe la perslingvaj komencantoj, dum ne troviĝis tia diferenco ĉe la aliaj du lingvogrupoj, t.e. hungarlingvaj komencantoj kaj ruslingvaj komencantoj. Tiuj ĉi du komencanto-grupoj do juĝis la du versiojn de frazoj samnivelaj en akceptebleco. Ĉi-rilate, almenaŭ ĉe la komencantoj estas subtenita nia prognozo, ke hungarlingvanoj kaj ruslingvanoj, male ol perslingvanoj, montros samnivelan juĝadon al la du versioj de frazoj pro tio, ke la rusa kaj la hungara, male ol la persa, respektive tute aŭ parte permesas frazojn kiuj malhavas kromvorton. Se ni rezonas bonorde unuflanke, ke la rusa kaj la hungara permesas ambaŭ versiojn de kromvorto-frazoj, kaj aliflanke, ke sperto en esperanto nuligos la diferencon inter la du versioj de frazoj, tiam sekvas la prognozo, ke la diferenco ne aperos ĉe ruslingvaj kaj hungarlingvaj spertuloj. Tamen la trovaĵo ne montris tiun ĉi formon de juĝado. Certan klarigon pri tio ni nun ne povas liveri.

### 3.5. Priskribo de la bildo

Ĉar pri diverspecaj trajtoj observitaj je la niveloj de son- kaj vort-strukturoj ni menciis mallongan komenton jam en la rilataj lokoj de Rezultoj, ni tial diskutas tie ĉi pri tiuj trajtoj, kiuj aperis je la niveloj de sintagmo kaj frazo.

Kaj ĉe ruslingvanoj kaj ĉe hungarlingvanoj aperis plej ofte tiuj frazoj, kiuj inkludas sintagmo-konservantajn frazojn kaj, kelkfoje tiuj, kiuj inkludas sintagmo-rompantantajn frazojn kiel la sekvantajn:

"La knabon punos lia majstro." (Sintagmo-konservanta disigo);

"Pri kiu mi skribi ne volas." (Sintagmo-rompanta disigo).

La rusa kaj la hungara akceptas tiajn ĉi specojn de frazoj kiel permeseblaj, tial la nuna trovaĵo sugestas, ke ambaŭ lingvanoj utiligas tiujn ĉi frazesprimojn kiam ili konstruas frazojn en esperanto, kiu per si mem permesas samspecajn frazstrukturojn. Tio estas tre interesa je la lumo de la rezultoj de la juĝado pri akceptebleco de frazoj, en kiu precipe ruslingvaj spertuloj emis malakcepti disigojn. Alivorte, kvankam teorie ili emas malakcepti tiajn frazojn, en la praktiko ili multe uzas ilin.

Kontraste al tio, tiuj ĉi frazstrukturoj preskaŭ neniam estas uzitaj de anglalingvanoj kaj perslingvanoj, kies lingvoj ne akceptas ilin kiel permeseblajn. Notinda tamen estas la trovaĵo, ke unu persa progresanto kreis la sintagmo-rompantan sintagmon (*... skuas sian la manon*), kvankam la persa ne permesas

la disigon. La influo ne devenas de alie ol de la gramatiko de esperanto mem. Evidente oni devas esti tre singarda en la interpretado de ĉi tiu formo (*sia la mano*), kies kaŭzo povus esti klopodo de la lernanto apliki malbone lernitan regulon al la perslingva originala esprimo.

Nun ni provu apliki la teorion de parametro-fiksado (vd. noton 4) al la priskriboj. Flynn (1996:151) asertas, ke "ĉiuj principoj kaj parametroj karakterizitaj de la teorio de Universala Gramatiko estas uzeblaj fare de infanoj kaj plenkreskaj lernantoj de dua lingvo." Kernvorto-parametro (angle: *head parameter*), kiu priskribas la lokon de kernvortoj ene de sintagmo, estas unu el la asertitaj parametroj. Se ni sekvas la evoluon de fiksado de la parametro, ni povas diri, ke la kvar lingvanoj jam fiksas la valoron de la parametro laŭmaniere de la sintaksaj trajtoj de sia lingvo, t.e. ĝuste laŭ la permesateco donita en tabelo 1, antaŭ ol ili eklernas esperanton. Notu tie ĉi, ke fiksado de parametro okazas tuje tiumaniere, kvazaŭ oni povas ŝalti aŭ elŝalti elektran cirkuladon per manipulado de ŝaltilo.

Estas prave, ke esperanto laŭgramatike permesas sintagmo-konservantan disigon kaj sintagmo-rompantan disigon. Tamen ankaŭ estas ja la statistika fakto, ke en esperanta sintagmo (ekz. *... (vidi) viron transirantan la vojon*) la kernvorto, *viron,* aperas komence multe pli ofte ol ĝi aperas laste (sekve, *viron transirantan la vojon* anstataŭ *transirantan la vojon viron*). Alivorte, en tiu ĉi okazo kernvorto-komenca fiksado de parametro estas pli kutima ol kernvorto-lasta fiksado. Tamen, ruslingvanoj uzis esprimojn konforme al la kernvorto-lasta fiksado de parametro en sia lingvo, preskaŭ sendepende de spertiĝo de esperanto (vd. p. 25). Estas plene akcepteble, ke ruslingvaj komencantoj emas uzi tiajn frazesprimojn laŭkutime al la antaŭa fiksado de parametro pri la rusa. Sed tamen eĉ ruslingvaj spertuloj utiligis tiajn ĉi frazesprimojn. Ĉu Flynn kaj aliaj samskolanoj kuraĝas diri, ke en la lernado de esperanto la parametro ankoraŭ ne estas plene fiksita ĉe la spertuloj aŭ ke, laŭkutime, iuj aŭ aliaj faktoroj rilataj al mensa prilaborado malhelpas la malkaŝadon de la parametro jam plene fiksita? Oni rajtas sin demandi de kie, se ne de la gepatra lingvo, la spertuloj prenis la kernvorto-lastan fiksadon de parametro. Tiu ĉi klarigo ŝajnas al ni pli natura kaj pli ekonomia. Tiu-rilate, oni ankaŭ rajtas sin demandi, surbaze de niaj trovaĵoj pri priskriboj, pri la tuta koncepto de fiksado de parametroj je teoria nivelo.

Efektive se oni baziĝas sur la psikolingvistikaj teorioj de la lastaj jardekoj (ekzemple la tiel nomata "konkurenc-modelo" laŭ MacWhinney & Bates 1989) estas klare ke en esperanto la indico por kompreni la objekton en la frazo estas la *-n* en *florojn*. La pozicio en la frazo en esperanto kiel en la latina aŭ en aliaj lingvoj kun abunda riĉeco de finaĵoj ludas multe malpli gravan rolon. Alivorte oni devus esplori pri la akiro de la parametro *-n*, kio normale estas nomata "lernado de la akuzativo".

La tekstoj de la liberaj priskriboj apogas la hipotezon ke la fiksado de parametro de kernvortoj ne tuje determiniĝas, sed evoluas dum la lernado de esperanto tiel ke spertuloj sekvas la statistike plej oftan parametradon, ekzemple "kernvorto-komenca" en frazoj de la speco "... virino elirinta el la vendejo", "kernvorto-lasta" en frazoj de la speco "ruĝa mantelo".

La samaj tekstoj montras ke frazoj kun kromvortoj aŭ sen kromvortoj estas sisteme evitataj de la verkantoj.

Kaj fine la disigo de la elementoj estas fenomeno, kiu rilatas ĉefe al la tekstoj de rusaj kaj hungaraj parolantoj de esperanto. Restas do la ĝenerala demando pri la multaj rusoj kaj hungaroj, kiuj utiligas sintagmo-konservantan kaj sintagmo-rompantan modelojn, malgraŭ tio ke ilia juĝo pri similaj proponitaj frazoj devus pensigi la malon. Iliaj tekstoj povas esti juĝataj nekutimaj sed certe tute gramatikaj.

El tiu vidpunkto esperanto estas lingvo en kiuj la pozicio de kernvortoj estas relative malgrava kompare kun lingvoj kiel la angla, en kiuj ĝi estas esenca. Alivorte el la sintagmoj: *mantelo ruĝa* kaj *ruĝaj mantelo* la dua estas negramatika, dum la unua povas esti stile malsam-efika sed certe gramatika. Same okazas ĉe la frazoj: *virino aĉetis robo* kaj *robon aĉetis virino* aŭ *robon virino aĉetis* el kiuj negramatika estas nur la unua.

Oni devus fari pliajn esplorojn, demandante sin kiom la ideoj mem pri kernvortoj kaj disigoj estas influataj de la lingvaj ecoj de difinitaj lingvoj.

## 4. Konkludo

Tiu ĉi studo esploris la influojn de kvar gepatraj lingvoj sur la lernadon de esperanto. Ĉefaj trovaĵoj akiritaj kaj ties implicoj estas jenaj:

(1) Spertuloj juĝis la transformitajn frazojn pli-malpli samnivele akcepteblaj, sendepende de tio, ke ies aŭ alies lingvoj permesas aŭ ne permesas la transformadon. Tio ĉi estas precipe prava pri la frazoj kun sintagmo-konservanta disigo kaj sintagmo-rompanta disigo. Tiele ili atingas similan staton de lingvoscio de esperanto, almenaŭ pri tiuj ĉi specoj de frazoj.

(2) Diferenco inter la bazaj kaj la transformitaj frazoj troviĝis pri la frazoj kun sintagmo-rompanta disigo, dum ne estis tiele pri la frazoj kun sintagmo-konservanta disigo. La lasta trovaĵo estas akirita eble pro tio, ke frazoj kun sintagmo-konservanta disigo estas plej ofte renkonteblaj en esperanto.

(3) Frazoj kun sintagmo-rompanta disigo estis juĝitaj malpli akcepteblaj ol tiuj sen ĝi, sendepende de lingvoj kiuj permesas aŭ ne permesas la disigon. Tamen notinda estas la trovaĵo, ke ĉiuj diverslingvanoj donis al la frazoj kun sintagmo-rompanta disigo mezvalorojn malpli ol tri sur la 5-poenta skalo. Tiu ĉi speco de disigo rompas la unuecon de sintagmo, kies rompon ne permesas al si precipe la angla kaj la persa. Malgraŭ tio, anglalingvaj spertuloj kaj perslingvaj spertuloj juĝis tiujn frazojn pli-malpli samnivele akcepteblaj kiel

hungarlingvaj spertuloj kaj ruslingvaj spertuloj. La trovaĵo indikas asimiliĝon al la cellingvo – esperanto – , kiu okazis ĉe anglalingvanoj kaj perslingvanoj kiam ili ellernis esperanton. Tia ĉi disigo eblas ekskluzive pro tio, ke esperanto estas lingvo kun abunda riĉeco de finaĵoj ene de vortoj. Ni devas atentigi ĉi-okaze, ke nepras lingvistika esploro precipe pri tio, kien en sintaksa arbstrukturo disigita(j) elemento(j) estas levita(j) tiumaniere, ke la levo ne malobservu iun aŭ alian principon aŭ kondiĉon.[11]

(4) La diferenco inter la bazaj kaj la transformitaj frazoj ne troviĝis pri la sintagmo-konservantaj frazoj ĉe spertuloj, escepte de ruslingvanoj, dum ĝi aperis ĉe komencantoj. Specife, perslingvaj komencantoj kaj hungarlingvaj komencantoj juĝis la transformitajn frazojn malpli akcepteblaj ol la bazajn, tutkonforme al la lingvaj trajtoj de iliaj gepatraj lingvoj. Kontraŭe, ne troviĝis diferenco inter la du versioj ĉe ruslingvanoj. Tio indikas la influon de gepatra lingvo sur la lernadon de esperanto.

(5) Perslingvaj spertuloj juĝis frazojn kun sintagmo-konservanta disigo kaj tiujn kun sintagmo-rompanta disigo pli akcepteblaj ol perslingvaj komencantoj. Ĉar, renove, la persa ne permesas tiajn ĉi du specojn de disigo, la trovaĵoj tial indikas iom-post-ioman asimiliĝon de perslingvanoj al la gramatiko de esperanto. Kontraste, ne troviĝis la diferencoj inter komencantoj kaj spertuloj aŭ ĉe ruslingvanoj aŭ ĉe hungarlingvanoj, kies lingvoj ambaŭ permesas la disigojn.

(6) Tamen, trovaĵoj estas ne tute konformaj al niaj hipotezoj. Specife, ruslingvaj spertuloj juĝis frazojn kun sintagmo-konservanta disigo malpli akcepteblaj ol tiuj sen ĝi. Tiu ĉi trovaĵo estas malfacile komprenebla en du flankoj. Unuflanke, la rusa permesas tiun ĉi disigon kaj ne troviĝis la diferenco inter la du versioj de frazoj ĉe anglalingvanoj kaj perslingvanoj, kies lingvoj kontraŭe ne permesas ĝin. Aliflanke, ruslingvaj spertuloj, kiel ankaŭ hungarlingvaj spertuloj, uzis multfoje frazojn kun la disigo kiam ili priskribis la bildon.

Ruslingvaj spertuloj juĝis la frazojn kun sintagmo-rompanta disigo malpli akcepteblaj ol tiujn sen ĝi, kvankam tiu ĉi speco de disigo estas permesebla en la rusa, kaj kvankam ili uzis multfoje frazojn kiuj inkludis la disigon. Simila tendenco estas observita ankaŭ ĉe hungarlingvanoj.

Ankaŭ pri la juĝadoj de frazoj kun kaj sen kromvorto okazis fenomenoj ne kompreneblaj. Specife, la diferenco inter la du versioj de frazoj aperis ĉe ruslingvaj spertuloj kaj hungarlingvaj spertuloj, dum ĝi ne okazis ĉe komencantoj el ambaŭ lingvanoj. Ĉar la du lingvoj pli-malpli permesas frazojn sen kromvorto unuflanke kaj ĉar esperanto permesas ilin aliflanke, tial ne eblas,

[11] Almenaŭ pri la moviĝo de sintagmo ĉe sintagmo-konservanta frazo, oni povas vidi kelke da eblaj sintaksaj analizoj en Radford (1997:312–313), sed ne troviĝas analizoj faritaj ĉe sintagmo-rompanta frazo.

ke la diferenco estas okazinta nur ĉe spertuloj, dum la malo estas okazinta ĉe komencantoj.

(7) Rimarkinda observaĵo pri la priskriboj estas tio, ke eĉ spertuloj, precipe ruslingvanoj kaj hungarlingvanoj, daŭrigis utiligi frazesprimojn, kiuj ja konformiĝis al la gramatiko de esperanto sed kiuj ne konformiĝis al statistike plej oftaj frazmaterialoj ĉirkaŭantaj la lingvanojn. La frazesprimoj uzitaj estis ĝuste tiaj, kiuj estas ofte uzataj en iliaj gepatraj lingvoj. Tiu-rilate, la influo de gepatra lingvo ankoraŭ daŭris eĉ ĉe spertuloj, kiam ili estas testitaj pere de libera priskribado, malgraŭ tio, ke juĝado de akceptebleco de frazoj emis kaŝi tian influon.

La nuna esploro estas ne ĝisfine plenumita ĉefe pro la manko de datumoj neniel forlasindaj. Malgraŭ tio, ni kredas, ke ĝi liveris al ni interesajn trovaĵojn pri la influoj de gepatra lingvo sur la lernadon de esperanto. Studoj kiel la nuna estas treege malmultaj en Esperantujo. Ni ankaŭ kredas, ke esperanto povus fariĝi unu el la plej bonaj testlingvoj por esplori diversspecajn problemojn en lingvistiko kaj psikolingvistiko, aparte pro ties fleksebleco pri sintaksa strukturo kaj vortfarado.

Dankesprimo

Tiu ĉi esploro estas subtenita de la FAME Fondaĵo. Ni treege ŝuldas al multe de personoj kiuj subtenis kaj helpis la daŭrigon de la esploro. Antaŭ ĉio, ni volas esprimi elkoran dankon al partoprenantoj el la kvar lingvogrupoj kiuj volonte partoprenis la esploron, kvankam la donitaj taskoj al ili estis ege tempobezonaj. Al Aleksander Korĵenkov, Irina Gonĉarova, Vera Payne, Don Harlow, Balasz Wacha, Mojtaba Kheir-Kha kaj Reza Torabi ni aparte ŝuldas pro ilia bonvolo helpi nin. Ili testis partoprenantojn, disdoninte kaj kolektinte foliarojn. Apartajn dankvortojn ni volas esprimi al la sekvantaj kolegoj: Jouko Lindstedt, Boris Kolker, Balasz Wacha, Hamzeh Shafiee kaj Marc van Oostendorp pro multe da akademiecaj helpoj en la tuta daŭro de la esploro kaj pro komentoj kiujn ili donis pri la unua versio de la nuna artikolo.

## Apendico. Testfrazoj uzitaj estas listigitaj laŭ tri specoj de frazstrukturo

(B) indikas bazan frazon, dum (T) indikas transformitan frazon.

### Sintagmo-konservanta disigo

1. (B) La maljunulino renkontis ĉarman knabinon en la parko.
   (T) Ĉarman knabinon renkontis la maljunulino en la parko.
2. (B) La prezidanto faris tre bonan paroladon.
   (T) Tre bonan paroladon faris la prezidanto.
3. (B) La violonisto ludis belan muzikon.
   (T) Belan muzikon ludis la violonisto.

4. (B) La partoprenantoj aŭdis bonvenajn vortojn.
   (T) Bonvenajn vortojn aŭdis la partoprenantoj.
5. (B) La filo trovis grandan ĝojon en la vizaĝo de la patrino.
   (T) Grandan ĝojon trovis la filo en la vizaĝo de la patrino.
6. (B) Instruistoj havas tro da malfacilaj problemoj en la nuna tempo.
   (T) Tro da malfacilaj problemoj havas instruistoj en la nuna tempo.
7. (B) La studento proksimiĝis al la fremdulo.
   (T) Al la fremdulo proksimiĝis la studento.
8. (B) Ni ekveturis plu post mallonga ripozo.
   (T) Post mallonga ripozo ni ekveturis plu.
9. (B) La plej juna studentino rimarkis nin de granda distanco.
   (T) De granda distanco rimarkis nin la plej juna studentino.
10. (B) La fama biologo parolis pri interesaj birdoj.
    (T) Pri interesaj birdoj parolis la fama biologo.
11. (B) La knabo plej juna respondis tuj al la demando plej malfacila.
    (T) Al la demando plej malfacila respondis tuj la knabo plej juna.
12. (B) Oni ne iras malfrue al la lernejo.
    (T) Al la lernejo oni ne iras malfrue.
13. (B) Novaj ideoj aperis en la mondon.
    (T) En la mondon aperis novaj ideoj.
14. (B) Via amiko devas legi ĉi tiun libron.
    (T) Ĉi tiun libron devas legi via amiko.
15. (B) La frato ekiros al la urbo, por akiri monon.
    (T) Por akiri monon, la frato ekiros al la urbo.
16. (B) Ĝenerale kion vi pensas pri esperanto?
    (T) Ĝenerale pri esperanto kion vi pensas?

Sintagmo-rompanta disigo

1. (B) Mi ne volas iri tien.
   (T) Iri tien mi ne volas.
2. (B) Li klopodis respondi al malfacila demando.
   (T) Klopodis li respondi al malfacila demando.
3. (B) Mi estas certa, ke li havos brilan sukceson.
   (T) Mi estas certa, ke brilan li havos sukceson.
4. (B) Li ricevis ŝian donacon tre valoran.
   (T) Tre valoran li ricevis ŝian donacon.
5. (B) Ĉu la infano ne volas esti kun sia avino?
   (T) Ĉu ne volas la infano, esti kun sia avino?
6. (B) Infanoj ankoraŭ ne povas ŝanĝi veston.
   (T) Veston ŝanĝi, ankoraŭ ne povas infanoj.

7. (B) Neniu el ni ricevis sinceran bonvenon.
   (T) Sinceran neniu el ni ricevis bonvenon.
8. (B) Ŝi eniris la salonon plenan de homoj.
   (T) Plenan de homoj ŝi eniris la salonon.
9. (B) Ju pli studemaj estas studentoj, des pli grandan sukceson ili ĝuos.
   (T) Ju pli studemaj estas studentoj, des pli grandan ĝuos ili sukceson.
10. (B) Mi taksas la estraron de nia esperanto-klubo tre laborema.
    (T) Tre laborema mi taksas la estraron de nia esperanto-klubo.
11. (B) Oni ankoraŭ ne povas paroli esperanton en stacidomoj.
    (T) Paroli esperanton en stacidomoj, oni ankoraŭ ne povas.
12. (B) Li aĉetis malnovan libron.
    (T) Libron li aĉetis malnovan.
13. (B) Ĉiu studento devas verki brilan eseon en la fino de la kurso.
    (T) Verki brilan eseon en la fino de la kurso devas ĉiu studento.
14. (B) Se vi faros tion, vi ricevos tre varman dankon.
    (T) Se vi faros tion, tre varman vi ricevos dankon.
15. (B) Li ne sukcesis, malfermi sian pordon.
    (T) Malfermi sian pordon, li ne sukcesis.

Kromvorto

1. (B) Li rakontis tion, kion li suferis.
   (T) Li rakontis, kion li suferis.
2. (B) Ŝi ne similas al tio, kio ŝi estis antaŭe.
   (T) Ŝi ne similas al kio ŝi estis antaŭe.
3. (B) Ĉio dependas de tio, kiel ni vidas la aferon.
   (T) Ĉio dependas de kiel ni vidas la aferon.
4. (B) Ĉu entute havas sencon tio, ke la klubo pluvivu?
   (T) Ĉu entute havas sencon, ke la klubo pluvivu?
5. (B) Mi volas skribi tion, kia estas ilia komuna pensmaniero.
   (T) Mi volas skribi, kia estas ilia komuna pensmaniero.
6. (B) Li demandis min pri tio, kial lia amiko estis elektita kiel prezidanto.
   (T) Li demandis min pri kial lia amiko estis elektita kiel prezidanto.
7. (B) Kaj nun fine ni vidas tion, kion la studentoj de longe atendis.
   (T) Kaj nun fine ni vidas kion la studentoj de longe atendis.
8. (B) La plej granda problemo estas tio, ke mankas al ili mono.
   (T) La plej granda problemo estas, ke mankas al ili mono.
9. (B) Estas plej facile diri tion, kie la knabo sin kaŝas.
   (T) Estas plej facile diri kie la knabo sin kaŝas.

10. (B) La fiŝkaptistoj ekiris en la maro spite tion, ke malbona estis la vetero.
    (T) La fiŝkaptistoj ekiris en la maro spite ke malbona estis la vetero.
11. (B) Ni priploras tion, kion ni perdis.
    (T) Ni priploras, kion ni perdis.
12. (B) Sur la lango estas tio, kio estas en la kapo.
    (T) Sur la lango estas kio estas en la kapo.
13. (B) Ĉiu elektas tion, kion li ŝatas.
    (T) Ĉiu elektas, kion li ŝatas.
14. (B) Li volis scii pri tio, kio okazis en la kunveno.
    (T) Li volis scii pri kio okazis en la kunveno.
15. (B) Mi volas iri tien, kien vi iros.
    (T) Mi volas iri, kien vi iros.
16. (B) Mia dubo estas tio, ĉu ni povos akiri lian helpon.
    (T) Mia dubo estas, ĉu ni povos akiri lian helpon.

## Referencoj

Bettoni, C. 2001. *Imparare un'altra lingua.* Bari: Editori Latera.

Bever, T. G. 1970. The cognitive basis for linguistic structures. En: J. R. Hayes, red., *Cognition and the development of language*, p. 279–362. New York: Wiley.

Bolinger, D. 1968. Judgments of grammaticality. *Lingua*, **21**, 34–40.

Chomsky, N. 1981. *Lectures on government and binding.* Dordrecht, Holland: Foris.

Chomsky, N. 1986. *Knowledge of language: Its nature, origin and use.* New York: Preager.

Chomsky, N. 1995. *The minimalist program.* Cambridge, MA: MIT Press.

Chomsky, N. 2000. *New horizons in the study of language and mind.* Cambridge: Cambridge University Press.

Christiansen, M. H.; Chater, N. 1999. Toward a connectionist model of recursion in human linguistic performance. *Cognitive Science*, **23**, 157–205.

Corsetti, R. 1996. Esperanto kaj kreolaj lingvoj: Komunaj kaj malkomunaj trajtoj en la kreoliĝo. En: Kosecky, S.; Tvarozek, E.; Oriain, S., red., *Multkulturaj familioj de nuntempa Eŭropo*, p. 11–36. Bratislava, Slovakio: Esprima.

Flynn, S. 1996. A papameter-setting approach to second language acquisition. En: Ritchie & Bhatia, red., (1996:121–158).

Gass, S. 1996. Second language acquisition and linguistic theory: The role of language transfer. En: Ritchie & Bhatia, red., (1996:317–345).

Greenbaum, S. 1976. Contextual influence on acceptability judgments. *Linguistics*, **187**, 5–11.

Greenbaum, S., red., 1977. *Acceptability in language.* The Hague: Mouton.

Hill, A. A. 1961. Grammaticality. *Word*, **17**, 1–10.

Kaloscay, K.; Waringhien, G. 1985. *Plena analiza gramatiko de Esperanto.* Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.

Komatsu, M. 1996. An $X'$ bar analysis of Esperanto. *LING 602 term paper.* University of Alberta.

Lado, R. 1957. *Linguistics across culture.* Ann Arbor: University of Michigan Press.

Lakoff, R. 1977. You say what you are: Acceptability and gender-related language. En: Greenbaum, red., (1977:73–86).

MacWhinney, B.; Bates, E. 1989. *The crosslinguistic study of language processing.* New York: Cambridge University Press.

Maxwell, D. 1985. Genera modelo de Esperanto: Ĝeneralaj rimarkoj kaj specifa analizo. En: R. Ryszard, red., *Acta interlingvistica: 12-a Scienca Interlingvistika Simpozio Varsovio,* p. 47–56. Varsovio: Akademickie Centrum Interlingwistiyczne.

Miyamoto, M. 1982. *Vortaro Japana-Esperanta.* Tokyo: Japana Esperanto-Instituto.

Nagata, H. 1988. The relativity of linguistic intuitions: The effect of repetition on grammaticality judgments. *Journal of Psycholinguistic Research,* **17**, 1–17.

Nagata, H. 1989. Effects of repetition on grammaticality judgments under objective and subjective self-awareness conditions. *Journal of Psycholinguistic Research,* **18**, 255–269.

Nagata, H. 1992. Anchoring effects in judging grammaticality of sentences. *Perceptual and Motor Skills,* 75, 159–164.

Nagata, H. 1997a. An assimilation effect in judging grammaticality of sentences violating the subjacency condition. *Perceptual and Motor Skills,* **84**, 755–767.

Nagata, H. 1997b. Anchoring effects in judging grammaticality of sentences violating the subjacency condition. *Psychologia,* **40**, 163–171.

Nagata, H. 1997c. Kernvorto-parametro en genera gramatiko: Apliko al eldiroj de infanoj denaske lernantaj Esperanton. *Scienca Revuo,* **48**(1), 34–43.

Nagata, H. 2001. Judgments of grammaticality of Japanese bitransitive sentences with a differing number of arguments. *Perceptual and Motor Skills,* **92**, 993–1001.

Nagata, H.; Bain, B. 2000. Judgments of grammaticality of sentences with a differing number of arguments: A comparison of English and Japanese speakers. *Perceptual and Motor Skills,* **91**, 503–511.

Newmeyer, F. J. 1983. *Grammatical theory: Its limits and its possibilities.* Chicago, IL: The University of Chicago Press.

van Oostendorp, M. 1991. *The syntax of a language without grammar.* MA Thesis, Tilburg University.

Otsuka, T.; Nakajima, F., red., 1982. *The Kenkyusha Dictionary of English Linguistics and Philology.* Tokyo: Kenkyusha.

Pienemann, M. 1989. Is language teachable? *Applied Linguistics,* **10**, 52–79.

Radford, A. 1997 Syntactic theory and the structure of English: A minimalist approach. Cambridge: Cambridge University Press.

Ritchie, W. C.; Bhatia, T. K. red., 1996. *Handbook of second language acquisition.* San Diego, CA: Academic Press.

Ritchie, W. C.; Bhatia, T. K. 1996. Second language acquisition: Introduction, foundations, and overview. En: Ritchie & Bhatia, red., (1996:1–46).

Schachter, J. 1996. Maturation and the issue of universal grammar in second language acquisition. En: Ritchie & Bhatia, red., (1996:159–193).

Schütze, C. T. 1996. *The empirical base of linguistics: Grammaticality judgments and linguistic methodology.* Chicago, IL: The University of Chicago Press.

Sherwood, B. A. 1982. Statistical analysis of conversational Esperanto, with discussion of the accusative. *Studies in the Linguistic Sciences,* **12**, 165–182.

Waringhien, G., red., 1970. *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto.* Paris: Senancieca Asocio Tutmonda.

Wells, J. C. 1978. *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto.* Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.

White, L. 1996. Universal grammar and second language acquisition: Current trends and new directions. En: Ritchie & Bhatia, red., (1996: 85–120).

*Adresoj de la verkintoj:*
Hiroshi Nagata, ⟨hinagata@mw.kawasaki-m.ac.jp⟩, Okajama Universitato;
nun ĉe Kawasaki University of Medical Welfare.
Renato Corsetti, ⟨renato.corsetti@uniroma1.it⟩, Universitato de Romo,
"La Sapienza."

Ricevita 2002-06-03. Akceptita 2002-12-08

*Esperantologio / Esperanto Studies* **3** (2005), 40–44

# En Germanujo pli ol aliloke: esperantologia agado

Renato Corsetti

Resumo. En Germanujo oni sukcesis kunmeti elementojn, kiuj kutime restas disaj: scienca interesiĝo pri esperanto kaj aliaj planlingvoj, lingvistaj fak-scioj de neesperantistaj kaj esperantistaj lingvistoj, kaj scienc-organizaj kapabloj. Tiel naskiĝis la *Gesellschaft für Interlinguistik (GIL)*, kiu ĉiujare aranĝas siajn konferencojn, kiujn partoprenas esperantistaj kaj neesperantistaj lingvistoj. La verkoj prezentataj ĉi tie estas la aktoj de tiuj konferencoj.

Duono de la parolantoj en la konferencoj de GIL estas neesperantistaj lingvistoj, kiuj akceptas partopreni konferencon, en kiu la tono certe ne estas "samideana", sed en kiu ja partoprenas pluraj lingvistoj, kiuj estas konataj kiel esperantistoj.

Malantaŭ la kajeroj staras ankaŭ granda laboro. Ne nur tiu de la redaktintoj, U. Becker kaj D. Blanke, sed ĉefe tiu de D. Blanke, kiu sukcesis kunmeti kaj kunteni la tutan teamon.

Abstract. *German Talents: Esperanto studies*
The Germans are particularly talented at bringing together elements which are normally unconnected: scientific research into Esperanto and other planned languages; linguistic know-how from both Esperanto-speaking linguists and their non-Esperanto speaking colleagues; and organizing ability. This combination led to the birth of the *Gesellschaft für Interlinguistik (GIL)*, which organizes a conference every year for Esperanto-speaking and non-Esperanto-speaking linguists. This series consists of compilations of the conference papers.

Half of the participants in the GIL conferences are non-Esperanto-speaking linguists who agreed to take part in a conference which, while its tone was certainly not clannish, was attended by a large number of linguists who are known to be Esperantists.

Putting these volumes together was certainly not an easy task. For the final result we must thank the editors U. Becker and D. Blanke, but particularly D. Blanke, who created and held together the entire team.

En Germanujo pli ol en aliaj landoj oni sukcesis kunmeti elementojn, kiuj kutime restas disaj: scienca interesiĝo pri esperanto kaj aliaj planlingvoj, lingvistaj fak-scioj de neesperantistaj kaj esperantistaj lingvistoj kaj scienc-organizaj kapabloj. Tiel naskiĝis la *Gesellschaft für Interlinguistik (GIL)*, kiu ĉiujare aranĝas siajn konferencojn, kiujn partoprenas ĝuste esperantistaj kaj

neesperantistaj lingvistoj (de la 28-a ĝis la 30-a de novembro 2003 okazis la 13-a pri *Spracherfindung – Sprachplanung – Plansprachen*).

La ĉi-tie priparolataj *Beihefte*[1] (eble ni traduku tion simple per 'Kajeroj') estas la aktoj de tiuj konferencoj. Kiel la konferencoj mem ili ne havas limigitan temon, eĉ se ili daŭre restas en la kampo de scienca interlingvistiko, sed varias de politik-lingvistiko, kiel la 6-a kajero, al leksikografio, kiel la 5-a kajero, al pli pure interlingvistikaj temoj, kiel la 2-a aŭ la 8-a.

Ne eblas, tamen, kompreni la gamon sen konsiderado de la titoloj. Jen ili:

· *Translation in Plansprachen* [Tradukado en planlingvoj], 1996, aktoj de la 5-a konferenco 1995.

· *Terminologiewissenschaftliche Aspekte der Interlinguistik,* [Terminologio-sciencaj aspektoj de la interlingvistiko], 1997, aktoj de la 6-a konferenco 1996.

· *Eine Sprache für die Wissenschaft?* [Unu lingvon por la scienco?], 1998, aktoj de eksterseria GIL-konferenco komune kun Humboldt-Universitato Berlino kaj Wilhelm-Ostwald-Societo Großbothen pri la interlingvistikaj konceptoj de Wilhelm Ostwald, 1996.

· *Soziokulturelle Aspekte von Plansprachen* [Socikulturaj aspektoj de planlingvoj], 1998, aktoj de la 7-a konferenco 1997.

· *Interlinguistik und Lexikographie* [Interlingvistiko kaj leksikografio], 1999, aktoj de la 8-a konferenco 1998.

· *Sprachenpolitik in Europa* [Lingvopolitiko por Eŭropo], 2001, aktoj de la 9-a konferenco 1999, komune organizita kun la Societo por progresigo de lingvistikaj studoj en Berlin.

· *Zur Struktur von Plansprachen* [Pri la strukturo de planlingvoj], 2001, aktoj de la 10-a konferenco 2000.

· *Plansprachen und ihre Gemeinschaften* [Planlingvoj kaj iliaj komunumoj], 2002, aktoj de la 11-a konferenco 2001.

· *Plansprachen und elektronische Medien* [Planlingvoj kaj elektronikaj medioj], 2003, aktoj de la 12-a konferenco de GIL 2002.

· *ProCom '98. Sektion "Terminologiewissenschaft und Plansprachen"*, [Sekcio "Terminologio kaj planlingvoj"], 2003. Aktoj de internacia konferenco okaze de la centjariĝo de la naskiĝo de Eugen Wüster, 1998 en Vieno; kp. la konferencraporton en la revuo *Esperanto* 10/1998: 180–181.

· *Spracherfindung — Sprachplanung — Plansprachen* [Lingvo-inventado — lingvoplanado — planlingvoj], 2004; aktoj de la 13-a konferenco 2003.

· En preparo: *Internationale Plansprachen — Entwicklung und Vergleich* [Internaciaj planlingvoj — evoluo kaj komparo], aktoj de la 14-a konferenco 2004.

[1] *Beihefte der Gesellschaft für Interlinguistik,* numeroj 1–11, Berlino: GIL, ISSN 1432-3567, varia nombro de paĝoj sed ĝenerale pli ol cent, malsamaj prezoj sed proksimume 15 eŭroj por la lastaj kajeroj kaj 10 eŭroj por la unuaj. Redaktintoj de la unuaj kvin kajeroj estas Ulrich Becker kaj de la lastaj ses Detlev Blanke.

La enhavtabelojn de la kajeroj oni trovas ĉe
`www.interlinguistik-gil.de/beihefte.html`

Kaj ne eblas kompreni la riĉecon de la enhavo se oni ne konsideras la enhavon de almenaŭ du el ili hazarde elektitaj.

La kvara kajero: *Soziokulturelle Aspekte von Plansprachen*

- Tazio Carlevaro: Das soziokulturelle Selbstverständnis der wichtigsten Plansprachen außer Esperanto
- Otto Back: Gedanken über die deutsche Orthographiereform und ihre Kritiker
- Sabine Fiedler: Zu Merkmalen der Esperanto-Sprachgemeinschaft (Ergebnisse einer Probandenbefragung)
- Werner Bormann (Hamburg): Die Esperanto-Bewegung in den gesellschaftlichen Strömungen ihrer Zeit (Ein Bericht aus eigener Erfahrung)
- Helmut Welger: Plansprachliche Gütekriterien und ihre Konkretisierung und Gewichtung bei Zamenhof
- Tazio Carlevaro: Apprender Interlingua
- Tazio Carlevaro: Andreas Juste — idista poeto
- Vera Barandovská-Frank: Der neueste Stand der Lateinbewegung: Bericht über den Latinisten-Weltkongreß
- Johannes Imscher: Soziokulturelle Aspekte der griechischen Reinsprache
- Dieter Dungert: Die Bildung von Verben aus substantivischen Wortstämmen im Esperanto
- Ronald Lötzsch: Zwölf Thesen und zwei Texte zu einer alternativen deutschen Rechtschreibung

La sesa kajero: *Sprachenpolitik in Europa,* Teil I:

- Erika Ising: Begrüßungs- und Eröffnungsansprache
- Detlev Blanke: Eröffnungsansprache
- Max Hans-Jürgen Mattusch: Sprachenvielfalt — Fluch oder Segen?
- Ronald Lötzsch: Zum typologischen Reichtum europäischer Sprachen
- Vitalij G. Kostomarov: Das Russische als internationale Verkehrssprache
- Johannes Klare: Sprachenpolitik aus französischer Sicht
- Detlev Blanke: Plansprachen und Europäische Sprachenpolitik
- Jürgen Scharnhorst: Nachwort zur Tagung "Sprachenpolitik in Europa"
- Detlev Blanke kaj Jürgen Scharnhorst: Auswahlbibliographie zur europäischen Sprachenpolitik, Teil II
- Vera Barandovská-Frank: Gibt es Europa? Was ist europäisch?
- Sabine Fiedler: Bela dam', ĉu al vi plaĉus, se akompanon mi kuraĝus? Zur Übersetzung von Goethes *Faust* ins Esperanto
- Karl-Hermann Simon kaj Ingward Ullrich: Erfahrungen bei der terminologischen Bearbeitung der forstlichen Fachsprache

Kiel oni povas klare vidi, tiuj kajeroj celas ĉefe la germanlingvan publikon, kaj GIL fakte agas ĉefe en Germanujo. Hazarde de tempo al tempo oni povas trovi artikolon en alia lingvo ol la germana, sed baze temas pri germanlingvaj materialoj. Ili estas relative modeste produktataj, sed la limigiteco de la publiko por tiu, kaj por aliaj, fakaj, tre specialaj kampoj ne permesas pli luksajn eldonojn, kiuj cetere apenaŭ estas pravigeblaj por sciencaj libroj.

Ili ankaŭ ne aparte celas "normalajn" esperantistojn, sed nur tiujn, kiuj interesiĝas pri interlingvistiko. En sia kampo, tamen, ĉi tiuj kajeroj montras, kion oni povas atingi, se oni science alfrontas la problemon de esperanto kaj de planlingvoj. La longe serĉata aprobo de lingvistoj en malgranda skalo jam ŝajnas esti realo en Germanujo. Se oni atente ekzamenas la liston de la parolantoj en la konferencoj de GIL oni vidas ke duono konsistas el neesperantistaj lingvistoj, kiuj akceptas partopreni konferencon, en kiu la tono certe ne estas "samideana", sed en kiu ja partoprenas pluraj lingvistoj, kiuj estas konataj kiel esperantistoj. Cetere la plurjardeka batalo por doni al la scienco "interlingvistiko" la dignon de scienco ankoraŭ ne finiĝis. Nuntempe, se oni parolas en naciaj lingvistaj medioj pri "interlanguage", tio pri kio la homoj pensas estas ĉefe la pluraj stadioj de la lernant-lingvo popularigita de Gass kaj Selinker.

Malantaŭ la kajeroj staras ankaŭ granda laboro. Ne nur tiu de la redaktintoj, U. Becker kaj D. Blanke, kiuj ankaŭ meritas laŭdon pro la atento de la redaktado, sed ĉefe temas pri la scienc-organiza laboro de D. Blanke, kiu sukcesis kunmeti kaj kunteni la tutan teamon. Cetere li estas ankaŭ la eldonanto de la germanlingva *Interlinguistische Informationen,* kiu estas la bulteno de GIL en Germanujo.

D. Blanke redaktas ankaŭ alian bultenon en esperanto: *Informilo por Interlingvistoj* eldonata de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvoproblemo kaj senpage ricevebla pere de Universala Esperanto-Asocio, sed ĝi ne estas simpla traduko al esperanto de la germanlingva *Informationen,* ĉar ĝi celas tute alian publikon.

Estas bedaŭrinde, ke simila laboro de rilatado je la ĝusta nivelo kun lingvistoj neesperantistaj ne okazas en aliaj landoj. Kompreneble ekzistas esceptoj, kaj en Italujo mem la esperanto-movado faras ion alimaniere rekte kiel esperanto-movado: de tempo al tempo oni kontaktas italajn lingvistojn, invitas ilin prelegi, ktp. En Hungarujo kaj en Pollando ankaŭ estas rilatoj kun la nacia lingvista rondo, kaj laste tre bonaj novaĵoj venas el Japanujo. Sed ĝenerale oni devas konstati, ke la organiziĝemo de esperantistaj interlingvistoj ne estas tre alta kaj la deziro alparoli neesperantistajn kolegojn estas ankaŭ ne tre granda.

Pro tio la agado de GIL ne nur estas valora en si mem rilate al Germanujo, sed valoras ankaŭ kiel ekzemplo de tio, kion oni povas atingi, se oni sukcesas kunmeti sciencan interesiĝon pri esperanto kaj aliaj planlingvoj, lingvistajn

fak-sciojn de neesperantistaj kaj esperantistaj lingvistoj kaj scienc-organizajn kapablojn.

Renato Corsetti instruas psiĥologion kaj pedagogion de lingvoj kaj de komunikado en la universitato de Romo 1, kie li estas profesoro pri psikopedagogio de lingvoj kaj komunikado. Li verkis plurajn artikolojn kaj librojn pri socilingvistiko, psiĥolingvistiko kaj interlingvistiko.

*Adreso de la recenzanto:* Facoltà di Psicologia 1, Via dei Marsi, 76, IT-00185 Roma, Italujo
*Komputilreta adreso:* `renato.corsetti@uniroma1.it`

Ricevita 2002-06-20. Akceptita 2002-07-16. Aldonoj ricevitaj 2002-12-22 kaj 2005-05-18

*Esperantologio / Esperanto Studies* **3** (2005), 45–54

# Dokumente zum „Weltspracheverein Nürnberg“

Marcus Sikosek

Resumo. La "Mondlingva Klubo" de Nurenbergo ludis specialan rolon en la historio de esperanto, ĉar tiu volapukista grupo fariĝis per konvertiĝo la unua Esperanto-grupo (1888). Poste ĝi forlasis esperanton kaj okupiĝis pri aliaj planlingvaj projektoj. Dokumentoj el la urba arkivo de Nurenbergo, trovitaj de Anny Hartwig, nun pli prilumas ĝian historion: statutoj rakontas pri klubaj strukturoj, urbaj aktoj pri la prezidantecoj kaj transiroj al Idiom Neutral kaj poste Ido.

Abstract. *Documents on "Weltspracheverein Nürnberg."*
The "Word Language Club" of Nurenberg has a special role in the Esperanto history, because this group of Volapukists adopted Esperanto and became its first local group (1888). Later it left Esperanto and was occupied with other projects of a planned language. Documents from the city archive of Nuremberg, found by Anny Hartwig, now give us more information about that history: statutes tell us about the structure of the club, city acts mention the chairmen and the transitions to Idiom Neutral and later Ido.

In der Geschichte der Plansprachenversuche nimmt das Volapük eine herausragende Stellung ein. Es war die erste Plansprache, die einen nennenswerten Anhängerkreis erwerben konnte; davon haben später andere Projekte, auch das Esperanto, profitiert. Árpád Rátkai sprach sogar von einer Kontinuität zwischen der Volapük- und der Esperanto-Bewegung, angesichts der Tatsache, dass viele bedeutende Esperanto-Pioniere dem Volapük-Lager entstammten – auch der Begründer L. L. Zamenhof selbst, der es 1882 kennengelernt hatte (Rátkai 1978, S. 172/173).

Die bekannteste dieser Konversionen betraf den „Weltsprache-Verein Nürnberg“. Als Volapükvereinigung 1885 gegründet ging er 1888 zu Esperanto über, wie es auch in zahlreichen Esperanto-Schriften zu lesen ist. Weniger popularisiert wurde die Tatsache, dass der Verein später die Konkurrenzprojekte Idiom Neutral und Ido unterstützte, wie Ernest Drezen 1931 in seiner Historio de la mondolingvo berichtete (Drezen 1991, S. 257, 284).

Mehr über diesen Verein erfahren wir nun durch die Dokumente, die Frau Anny Hartwig 1997 im Stadtarchiv Nürnberg gefunden hat. Die Nürnberger Repräsentantin des Welt-Esperanto-Bundes UEA hatte sich nicht durch die

verbreitete Annahme entmutigen lassen, die entsprechenden Magistratsakten seien ebenso wie die Vereinsbibliothek den Bomben des Zweiten Weltkriegs zum Opfer gefallen. Kopien dieser Dokumente sowie weitere Informationen und Zeitungsausschnitte hat Frau Hartwig dem Verfasser zwecks Veröffentlichung überlassen. Eine Auswahl der Magistratsakten kann nun einige Unklarheiten beseitigen und die Geschichte des Weltsprache-Vereins Nürnberg weiter erhellen.

Pionier der Nürnberger Plansprachenbewegung war der jüdische Religionslehrer, Kaufmann und Schriftsteller Leopold (Löb) Einstein, geboren am 28. November 1833 in Roth, gestorben am 9. September 1890 in Nürnberg. Am 26. Februar 1885 meldete Einstein dem Magistrat die Gründung eines „nicht politischen“ Vereins, des „Weltsprache-Verein / Volapüka-Klub / Nürnberg“, nach Vorbild des Münchner Volapükvereins (Dokument Nr. 1). Durch eine Nachwahl am 22. Februar 1888 wurde der Lehrer Christian Schmidt Vorsitzender, der weiterhin aktive Einstein war nicht mehr im Vereinsvorstand (Dokument Nr. 2).

Während des II. Volapük-Kongresses 1887 in München waren die sprachlichen Mängel des Volapük deutlich geworden, und 1888 sorgte die umstrittene Wahl eines deutschen „Obervolapükisten“ für Streit in der Bewegung. Dies war wohl ein Grund dafür, dass am 18. Dezember 1888 der Verein auf Initiative Einsteins zum Esperanto überwechselte (siehe Drezen 1991, S. 173/174; Enciklopedio 1979, s.v. Einstein). Dies ist in der Literatur unstrittig, findet seinen Niederschlag in den Vereinsakten beim Nürnberger Magistrat allerdings erst 1890. Der Verein informiert, dass er sich seit dem 25. März des Jahres nicht mehr „Volapükaclub“, sondern „Esperanto-Club“ nennt. Ferner werden neue Statuten angekündigt (Dokument Nr. 3). Im Archiv befinden sich ähnliche Dokumente, die fortlaufend bis 1899 die Existenz dieses Vereins mit jeweils anderen Vorstandsmitgliedern unter dem Vorsitz Schmidts bestätigen.

Die angekündigten Statuten beziehen sich anscheinend auf das undatierte Exemplar, das den Akten beiliegt. Aufgrund der erwähnten, schließlich doch nicht gegründeten „Ligo internacia de Esperantistoj“ (Zamenhof 1929, II. 3, 15, 22, 32), ist die Einordnung in das Jahr 1890 sicher. Es handelt sich um acht handgeschriebene Seiten, von denen hier nur die interessanteren Punkte wiedergegeben werden. Das „Statut des Klubo Esperanto en Nürnberg“ nennt es den Zweck des Vereins, eine neutrale Sprache für Angehörige verschiedener Nationen zu fördern. Erst im zweiten Satz erscheint das Esperanto, das für den Vereinszweck am geeignetesten sein soll; darin folgt das Statut dem vorgeschlagenen „Regularo“ der o.g. internationalen „Ligo“. So wie der Nürnberger Weltsprache-Verein von München aus angeregt worden war, so macht der politisch und konfessionell neutrale Klubo es sich nun selbst zum Ziel, an anderen Orten Vereine zu gründen. Möglicherweise hat man in Erlangen

und Schweinfurt 1892 Erfolg gehabt (Enciklopedio 1979, s.v. grupoj unuaj). Ordentliche Mitglieder sind „unbescholtene Herren", die sich zum Esperanto-Lernen verpflichten, während Damen nur außerordentliche oder fördernde Mitglieder werden können.

In den wöchentlichen Sitzungen soll Esperanto gesprochen werden, was anscheinend nicht selbstverständlich ist, aber auch der nötige Unterricht soll stattfinden. Man erwartet vom Vorstand (Ausschuss), dass er über die Weltsprachenbewegung informiert. Ein dem Vorstand angehörender Bibliothekar kümmert sich um die vereinseigene Bibliothek und einen Lesezirkel. Nicht erwähnt wird die von Zamenhof redigierte und in Nürnberg gedruckte Zeitschrift *La Esperantisto*, 1889–1895 (Dokument Nr. 4).

Der Verein unter Christian Schmidt ist allerdings auch dem Esperanto nicht treu geblieben. Wie der Japaner Itô Kanzi unter dem Pseudonym Ludovikito schreibt, war der Verein sowieso nur unter der Vorraussetzung übergetreten, dass am Esperanto notwendige Reformen vorgenommen werden würden (Ludovikito 1982, S. 52). Drezen zufolge trat man 1903 dem Volapük-Nachfolger Idiom Neutral bei (s.o.), was nach den Akten des Magistrats nun korrigiert werden kann: bereits am 9. Mai 1901 nahm der „Esperantoklub" den Namen „Klub de amiki de lingu universal Nürnberg" an (Dokument Nr. 5). Nach Auskunft von Frau Hartwig befinden sich im Archiv weitere Schriftstücke zu diesem Klub bis zum 4. April 1908.

Als im Jahre darauf der Verein sich wieder beim Magistrat melden musste, gab er jedoch die am 1. Mai 1909 erfolgte Rückbenennung in „Weltsprache-verein Nbg." bekannt (Dokument Nr. 6). Am 19. Mai 1910 wurde der nach dem Tode Christian Schmidts verwaiste Vorsitz mit Dr. Ludwig Eßlinger besetzt (Dokument Nr. 7). Welche Konsequenzen damit in der Sprachenfrage verbunden waren, ist erst aus der beigelegten Werbekarte ersichtlich, mit der der Weltsprache-Verein anbietet, über das „Reform-Esperanto" Ido zu informieren. Das Klublokal ist das gleiche wie in Dokument 7. Die Zusammenkünfte sind weiterhin wöchentlich, wobei sogar kostenloser Unterricht angeboten wird. Damen sind expressis verbis willkommen (Dokument Nr. 8).

Auch wenn Vorstandsangehörige nicht für die Mitgliederschaft repräsentativ sein müssen: Die Berufsangaben in den Dokumenten 2, 5 und 7 zeigen deutlich den sozialen Wandel in Deutschland. Eine ähnlich starke Vertretung der Kaufmannschaft würde man etwa im heutigen Deutschen Esperanto-Bund nicht wiederfinden. Ansonsten überwiegen weiterhin die Lehrer und sonstige Dienstleistungsberufe (bei Staat oder Gemeinde).

Der Weltsprache-Verein Nürnberg ist nicht die Keimzelle der späteren deutschen Esperanto-Bewegung geworden, sondern die 1903 vom Schweizer Jean Borel angeregte Berliner Gruppe. Dennoch ist die Geschichte der Nürnberger ein wichtiger Beitrag zur frühen Esperanto-Geschichte und gibt Aus-

künfte über die ersten Versuche, eine Organisation der Esperanto-Anhänger zustande zu bringen.

## Literatur

Drezen, Ernest K. 1991. *Historio de la mondolingvo. Tri jarcentoj da serĉado*, 4., kommentierte Auflage. Moskau: Eldonejo Progreso [Leipzig 1931].

*Enciklopedio de Esperanto* 1979. Chefredakteur: I. Ŝirjaev, Budapest: Hungara Esperanto-Asocio [Budapest 1933].

Ludovikito [Kanzi Itô] 1982. *Senlegenda biografio de l. l. zamenhof.* Kioto.

Rátkai, Árpád 1978. *La internacilingva movado kiel kreinto de la Internacia Lingvo.* In: Detlev Blanke, Red., *Socipolitikaj aspektoj*, S. 166–181. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio.

Zamenhof, L. L. 1929. *Originala Verkaro. Antaŭparoloj — Gazetartikoloj — Traktaĵoj — Paroladoj — Leteroj — Poemoj,* kolektitaj kaj ordigitaj de Johannes Dietterle. Leipzig: Ferdinand Hirt & Sohn.

## Dokumente

Dokument Nr. 1. Leopold Einstein meldet die Gründung des Weltsprache-Vereins, 26. Februar 1885 ..... 48

Dokument Nr. 2. Heinrich Huber meldet die Liste der am 22. Februar 1888 gewählten Vorstandsmitglieder, 25. Februar 1888 ..... 49

Dokument Nr. 3. Der Verein meldet die neue Leitung und die Namensänderung in „Esperanto-Club“, ferner neue Statuten, 17. Juni 1890 ..... 50

Dokument Nr. 4. Statut des Klubo Esperanto en Nürnberg, ohne Datum, vermutlich 1890. Auszüge ..... 51

Dokument Nr. 5. Der Verein meldet die Namensänderung in „Klub de amiki de lingu universal Nürnberg“, 15. Juli 1901 ..... 52

Dokument Nr. 6. Der Verein meldet die Namensänderung in „Weltsprache-verein “, den Tod Christian Schmidts und neue Statuten, 4. August 1909 ..... 53

Dokument Nr. 7. Der Verein meldet den neuen Vorstand mit Vorsitzendem Dr. Ludwig Eßlinger, 18. August 1910 ..... 54

Dokument Nr. 8. Werbekarte für Ido, 1910 ..... 54

## 1. Dokument Nr. 1. Der Verein meldet die Gründung des Weltsprache-Vereins, 26. Februar 1885

N. 13660

Gegenwärtig Poliz.-Offiz. [Name]

MAGISTRAT / PRÄS 27 FEB 85

Geschehen Nürnberg, 26 Febr. 1885 bs. dem Stadtmagistrat

Schriftsteller Herr Leopold Einstein Lorenzerstraße 5 wohnhaft, zeigt an: Es hat sich dahier unter dem Namen „Weltsprache-Verein /:

Volap[fehlerhaftes *b* überschrieben]üka-Klub /: Nürnberg" ein neuer nicht politischer Verein gebildet. Ich übergebe ein Exemplar der Statuten des in München bestehenden gleichen Vereins, welche Statuten auch der hiesige Verein zu den seinigen gemacht und bemerkt, daß die Verwaltung des Vereins dermalen aus:
1., mir selbst als Vorstand,
2., dem Commis Braune, bs. Conradty in Gostenhof als Kassier u.
3., dem Lehrer Holzer, innere Laufergasse 5 wohnhaft, als Schriftführer besteht.

Das Vereinslokal befindet sich in der Restauration Peter Vischer.

lt. V.

L. Einstein

zu No. 13660
I., fiat Vermerk im Verzeichnis der nicht politischen Vereine u. Formierung ein Aktes [!] mit der Bezeichnung: „Weltsprache-Verein /: Volapükaclub Nürnberg"
II., Herrn Justr. 12 zur Bekanntgabe an die treffenden Polizeiorgane wegen des Vereinslokals
III., Wiedervorlage am 15. März 1886.

Nürnberg den 28. Febr. 1885

[Unterschrift]

ad No. 13660
Rottmeister Baumann und [unlesbar] Mayer I wurden verständigt.

Nrbeg. den 3. März 1885

[Unterschriften]

## 2. Dokument Nr. 2. Der Verein meldet die Liste der am 22. Februar 1888 gewählten Vorstandsmitglieder, 25. Februar 1888

[Stempel] Praes. 27.FEB.88 Nm 14048

Gegenwärtig Poliz. Offiz. [Name]

Geschehen Nürnberg, 25. Febr. 1888 bs. dem Stadtmagistrat

Kaufmann Herr Heinr. Huber Plobenhofstraße 6 wohnhaft, übergibt Verzeichnis der in der Generalversammlung des Vereins „Volapüka-Club Nürnberg" am 22. l. M. neugewählten Verwaltungsmitglieder dieses Vereins

z. V.

Heinrich Huber

a.n.t.

[Unterschrift]

zu No. 14048.
I., fiat Vermerk im Vereinsverzeichnisse.
II., Sammt Beilage zu den Akten, welche am 15. März 1889 wiedervorzulegen sind.

Nürnberg, 29. März 1888

[Unterschrift]

Vorstandschaft des Volapükaklub Nürnberg

Nachwahl am 22. Februar 1888:

I. Vorstand: Herr Christian Schmidt, Lehrer an der höheren Töchterschule Spitterthorgraben 33

II. " " Ferdinand Brügel, Lehrer obere [fehlerhaft *untere* durchstrichen] Baustrasse Baustrasse 25/2

I. Schriftführer " Peter Steiner, Telegraf Adjunct, Luisenstrasse 5

II. " " Krämer, Lehrer, Nordtorstrasse 6.

Kassier " Heinrich Huber, Kaufmann, Plobenhofstraße 6.

Bibliothekar " Georg Dumpert, Kaufmann, Königsstraß 53.

Beisitzer " Julius Volkhardt, Tel. Adjunct, St. Johs. Str. 1

" " " Hermann Rehlen, Kaufmann, Lange [unlesbar] 35.

" " " Joseph Haack, Criminal Registrator, Unterkreuzgasse 2

" " " Gustav Jäger, Lehrer, Sandstrasse 11.

[unterer Teil nicht lesbar]

## 3. Dokument Nr. 3. Der Verein meldet die neue Leitung und die Namensänderung in „Esperanto-Club", ferner neue Statuten, 17. Juni 1890

Reg.

Der „Weltspracheverein" hat sich seit 25. III. 90 den Namen „Esperanto-Club" beigelegt. Die Bezeichnung „Volapükaclub" wird nicht mehr geführt. Die Vorstandschaft besteht aus den Herren:

Lehrer Christian Schmidt, Spittlerthorgraben 33 I. Vorstand

Kaufmann J. Müller, Bruchstr. 10, Schriftführer

" Gg. Dumpert, Königsstr. 53, Kassier

Die neuen Statuten werden übergeben. d. 17. VI. 90.

[Unterschrift]

zu. No 14297/I.

fact. [Name] I. Vermerk im Verzeichniß.

II. Wiedervorl. am 15. April 1891.

d. 17. VI. 90.

lt.V.

[Unterschrift]

[Anmerkung: Es folgen ähnliche Dokumente jährlich durchlaufend bis 1899]

## 4. Dokument Nr. 4. Statut des Klubo Esperanto en Nürnberg, ohne Datum, vermutlich 1890. Auszüge

[Handschriftlich. Offensichtlich erst nachträgliche Unterstreichungen wurden hier nicht berücksichtigt.]

Klubo Esperanto en Nürnberg

Statut

I. Zweck.

§ 1.

Zweck des Klubo ist die Förderung u. Verbreitung einer neutralen Sprache, welche für den Verkehr zwischen Personen verschiedener Nationen dienen würde. Als neutrale Sprache ist die Esperanto-Spr. ausersehen, da sie sich am besten als geeignet erweist, das vorerwähnte Ziel zu erreichen.

§ 2.

Anschluß des Klubo an die „Ligo internacia de Esperantistoj" soll unterhalten werden.

§ 3.

Jede politische und konfessionelle Tendenz ist ausgeschlossen.

II. Mittel zur Erreichung dieses Zweckes sind:

§ 4.

1. wöchentliche Sitzungen in der Esperanto-Sprache
2. Gründung von Vereinen an anderen Orten Deutschlands,
3. Korrespondenz mit den in- und ausländischen Vereinen u.
4. Oeffentliche Vorträge über die Esperanto-Sprache hier u. auswärts.

III. Mitgliedschaft.

§. 5.

Der Verein besteht aus:

1, Ordentlichen Mitgliedern,

2, außerordentlichen Mitgliedern,

3, Ehrenmitgliedern,

4, fördernden Mitgliedern.

ad. 1, Ordentliche Mitglieder sind unbescholtene Herren, welche das 18. Lebensjahr überschritten u. sich verpflichten, die Esperanto-Sprache zu erlernen u. zur Erreichung des Vereins-Zweckes nach Kräften beizutragen.

ad 2, Als außerordentliche Mitglieder können alle diejenigen aufgenommen werden, welche bestrebt sind, die Esperanto-Sprache zu erlernen.

ad 3, Ehrenmitglieder sind Persönlichkeiten, die sich um den hiesigen Verein in her-

vorragender Weise verdient gemacht haben.

ad 4, Fördernde Mitglieder sind Herren und Damen, wenn sie einen jährlichen Beitrag von mindestens M. 2,40 in die Vereins-Kasse fließen lassen.

IV. Rechten und Pflichten der Mitglieder

§ 9.

Ordentliche Mitglieder haben beschließende, außerordentliche nur beratende Stimme; dagegen haben alle Mitglieder das Recht auf Theilnahme an den Vereinsübungen, sowie auf Benützung der Bibliothek.

§ 11.

Als Aufnahmensgebühr ist von den ordentlichen und außerordentlichen Mitgliedern eine Mark zu entrichten.

§ 12.

Der Beitrag der ordentlichen hiesigen Mitglieder ist jährlich vier Mark, der auswärtigen u. außerordentlichen zwei Mark 40 [Pfennig-Zeichen]; diese Beiträge werden vierteljährlich im voraus vom Kassier gegen Quittung erhoben.

V. Ausschuß.

§ 19.

Der Bibliothekar versieht die dem Verein gehörigen Bücher u. Drucksachen u. besorgt den Lesezirkel.

VI. Versammlungen

§ 21.

Vereinsversammlungen mit Unterrichtsstunden finden in der Regel wöchentlich einmal statt. In den selben hat der Ausschuß über seine Thätigkeit, über die Vereinsangelegenheiten u. über alle wichtigen Vorkommnisse auf weltsprachlichem Gebiet zu berichten.

## 5. Dokument Nr. 5. Der Verein meldet die Namensänderung in ,,Klub de amiki de lingu universal Nürnberg", 15. Juli 1901

[Stempel] MAGISTRAT NÜRNBERG Eingel.: 15JUL1901 Num 57806/II.

V. No. 22461/II.

Klub de amiki de lingu universal

Nbg., 15. Juli 1901

[Unterschrift]

In der am 9. Mai d. J. stattgefundenen Generalversammlung des Esperantoklub wurde die Änderung des bisherigen Namens des Vereins in „Klub de amiki de lingu

universal Nürnberg“ beschlossen.
Gewählt wurden als I. Vorstand: Chr. Schmidt, Lehrer hint. Joh. [unlesbar] 13

“ II. “ : Max Ruppart, Kaufmann Baustraße 13

“ Kassier: Ludwig Senninger. Kaufmann Hintere Schulgasse 10.

“ Schriftführer: Jakob Sessler, Kaufmann Breitegasse 27.

[Stempel] G.R. dem W. B. 3.
zur Kenntnisnahme
[Unterschriften]

zu No 22461/II.

I. die Aktenaufschrift ist entsprechend zu ändern.
II. [unlesbar]
III. Herrn Rat XIV.
IV. Wiedervorlage am 15. Juli 1901

Nürnberg, den 3. August 1900.
lt.V.

[Unterschrift]

[Stempel] Kenntniss genommen.
8. VIII. 1900

[Unterschrift]

Ver. Lokal [unlesbarer Straßenname] 22 / Wittelsb. Hof
15.VII. 01
[Unterschrift]

## 6. Dokument Nr. 6. Der Verein meldet die Namensänderung in ,,Weltspracheverein “, den Tod Christian Schmidts und neue Statuten, 4. August 1909

Wiedervorlage No. 40422/II. (08.)
Betreff: wie vor.

[Stempel] MAGISTRAT NÜRNBERG Eingel.: 4.AUG1909 Num 82423/II.

Nürnberg, den 3. August 1909.
Magistrat-Haupt-Registratur
[Unterschrift]

Vermerk:
Der Name des Vereins wurde in der Mitgliederversammlung v. l. Mai 1909 geändert: er lautet nun: „Weltspracheverein Nbg.“ Der Vorstand Christ. Schmidt ist am 8. VIII. 09 gestorben. Ein Ersatz für ihn wurde noch nicht gewählt.
Neue Statuten liegen bei.
Nbg, 25. 8. 09.
[Unterschrift]

zu. No. 82423/II

Wiedervorlage am 1. August 1910
Nürnberg, den 25. August 1909
Stadtmagistrat.
lt. V.
[Unterschriften]

## 7. Dokument Nr. 7. Der Verein meldet den neuen Vorstand mit Vorsitzendem Dr. Ludwig Eßlinger, 18. August 1910

Vermerk.

Am 19. Mai 1910 wurde neu gewählt:

I. Vorstand: Dr. Ludwig Eßlinger, Rechtsanwalt, Buchenstr. 21:

Kassier: Sessler Jakob, Kaufmann, Fürtherstr. 89

Schriftführer: Mayer Maria, Klavierlehrerin, Bentz[?]straße 3

Vereinslokal: Café Central: Karolinenstraße

Sonst ohne Änderung.

Nürnberg, den 18. August 1910
[Unterschrift]
Sekretär

Zu. No. 72641/II.
Wiedervorl. am. 1. August 1911
Nbg. d. 18. VIII. 10.
lt.V.

[Unterschriften]

## 8. Dokument Nr. 8. Werbekarte für Ido, 1910

[Gedruckte Karte. Die Karte hat links oben ein Ido-Abzeichen mit sechseckigem, mit „IDO" beschriebenem Stern sowie der Umschrift „UNIONO DI L'AMIKI DI LA LINGUO INTERN" [Rest nicht lesbar], sowie rechts oben einen Ehrenkranz mit der Schrift „25. Jahr"]

Der Weltsprache-Verein Nürnberg
gegründet 1885.
stellt Jnteressenten für die Weltsprache Ido (Reform-Esperanto) aufklärende Schriften kostenlos zur Verfügung.
Klublokal in Nürnberg: Karolinenstr.23/I. Café Central.
Kostenloser Unterricht und Zusammenkunft jed Donnerst.Abd. $\frac{1}{2}$ 9 h
Damen und Herren willkommen!

*Anschrift des Verfasser:* Marcus Sikosek, Prinsenhof 4, NL-7051 AR Varsseveld.
⟨z@sikosek.de⟩

Ricevita 2002-12-04. Akceptita 2003-01-05. Aldoneto ricevita 2004-01-14

*Esperantologio / Esperanto Studies* **3** (2005), 55–68

# *Lingva Kritiko* (1932–1935): La unua esperantologia periodaĵo

Bernhard Pabst

Zusammenfassung. *Lingva Kritiko (1932–1935): Die erste esperantologische Zeitschrift*
*Lingva Kritiko* [*Sprachkritik*] war die erste Fachzeitschrift, die ausschließlich „Studien und Notizen über Grammatik, Wörterbuch und Stil" des Esperanto gewidmet war. Als unselbstständige monatliche Beilage zu *Heroldo de Esperanto* erschienen zwischen 1932 und 1935 in Köln 112 Seiten des ersten Bandes, bis wirtschaftlicher und politischer Druck im nationalsozialistischen Deutschland die Einstellung erzwangen. Auf Grund zahlreicher bis heute geführter Diskussionen zur Esperantologie ist das Periodikum nach wie vor von (nicht nur historischem) Interesse. Ein kommentierter chronologischer Index zeigt die damaligen Dispute auf, z.B. zur Frage der Neologismen und des technischen Wörterbuchs, zu den passiven Partizipien, dem genitivus obiectivus u.v.a.

Abstract. *Lingva Kritiko (1932–1935): The first esperantology journal*
*Lingva Kritiko* [*Language Critique*] was the first specialized periodical dedicated exclusively to "Studies and Notes on Grammar, Dictionary and Style" of Esperanto. As a monthly supplement to *Heroldo de Esperanto,* 112 pages of volume 1 were published in Cologne between 1932 and 1935 until publication ceased due to the economical and political pressure in Nazi Germany. With its many discussions on esperantology the periodical is still of more than historical interest. An annotated chronological index references disputes then current over such issues as neologisms and technical terminology, the passive participles, and the objective genitive.

Kvankam interlingvistikaj kaj esperantologiaj studoj aperis jam pli frue en la esperantlingva gazetaro, ekzemple kaj precipe en la *Oficiala Gazeto Esperantista,* sed ankaŭ en multaj aliaj periodaĵoj, *Lingva Kritiko* estis la unua esperantoperiodaĵo speciale kreita por tiuspecaj kontribuaĵoj. Inter februaro 1932 kaj marto 1935 aperis dum iom pli ol tri jaroj en Köln (Kolonjo) 28 numeroj de *Lingva Kritiko. Studoj kaj notoj pri gramatiko, vortaro kaj stilo* kiel memstara [monata] "aldono al Heroldo de Esperanto" en la gazetara formato 32,5 × 24 cm (la presita teksto preskaŭ komplete plenigas paĝon A4). Ĉiuj 28 numeroj kune formas volumon I kaj havas po 4 (neindikitajn) paĝojn, la duoblaj numeroj (ekz. n-ro 18/19, julio/aŭgusto 1933) po 8 paĝojn, la serio

do entute 112 paĝojn kun entute 162 kontribuaĵoj.[1] La volumo neniam estis finita. De la prelego de W. A. Oeste[2] en la laste aperinta numero de marto 1935 aperis nur la unua parto, la kontribuaĵo de J. Penndorf samkajere estis publikigita nur ĝis la dua parto, la fina tria mankas. Pro la politika kaj sekve ekonomia premo en nazia Germanio la ĵurnalisto kaj eldonisto de *Heroldo,* Teo Jung, forlasis sian patrujon en aŭtuno 1936 kaj translokiĝis al Nederlando. En ekzilo estis prioritate unue sekurigi la aperon de *Heroldo*; la kromprojekto *Lingva Kritiko* formalaperis.[3]

Kiel ties respondeculoj estas indikataj: "Gvidanto: Prof. D-ro B[runo] Migliorini, LK. [membro de la Lingva Komitato], Ak[ademiano]. Ĉefredaktoro: Stefano La Colla, LK. Redaktoroj: Max Butin, LK.; Teo Jung; Robert Kreuz, LK.; Prof. D-ro Inĝ. R. Orengo. Redakcio: ĉe S-ro Stefano La Colla, Via Dandolo 24, Roma (114)". Malgraŭ tiuj indikoj La Colla kaj eĉ malpli Migliorini nur malmulte kontribuis. Motoro malantaŭ *Lingva Kritiko* estis precipe Teo Jung. Tion evidentigas kaj la (sentitola) enkonduko de "La Redakcio" (t.e. Teo Jung) en la unua numero kaj la tie anoncitaj kaj postaj faktaj fokusoj temaj.[4] Ties personeco kaj la apermaniero kiel aldonaĵo al *Heroldo* influis enhavon kaj formon.

Ŝuldata al la gazetar-simila formo ekzemple estas, ke pli longaj artikoloj estis dispecigitaj en tri aŭ eĉ pli multaj partoj (vd. jam la supre menciitajn artikolojn de Oeste kaj Penndorf). Enhave la ofta monata aperritmo (en la fino Jung ne plu sukcesis konstante garantii ĝin) ŝajnis kaŭzi problemojn. Oni sentas kelkloke, ke la venonta numero devis esti iel plenigita, tiel ke oni akceptis kontribuaĵojn eĉ sub la mem difinita kvalitonivelo. Malgraŭ tio troveblas multaj ankoraŭ hodiaŭ legindaj kontribuaĵoj, kaj de famuloj kiel Waringhien, Kalocsay, Wüster, Drezen, Baghy, Grosjean-Maupin, Rollet de l'Isle, Lippmann, Migliorini, Butin, Collinson, Jung, E. de Wahl (la aŭtoro de Occidental[5]), kaj multaj aliaj, kaj de hodiaŭ apenaŭ plu konataj aŭtoroj kiel Gerber, Hartog, Penndorf, Schattat k.a. Kelkajn nomojn ni postmilite retrovos sur la paĝoj de *Esperantologio,* ekzemple Waringhien kaj Collinson.

---

[1] Kalkulante tute formale, t.e. ĉiun pecon unuope. Se oni kalkulas artikolojn aperintajn en pluraj partoj nur kiel unu kontribuaĵon estas iom malpli.

[2] Tiel! Probable W. T. Oeste, t.e. Wilhelm Theodor Oeste (m. 2003).

[3] Kp. la aŭtobiografion Jung (1979), precipe ĉapitrojn 11—12 (p. 235 ss). Pri la temo "Esperanto sub la svastiko" vd. Lins (1988/1990).

[4] "La Redakcio", do Jung, i.a. skribis en n-ro 1, p. 1: "Ni [!] petis Akademianon D-ron B. Migliorini, profesoron ĉe la Roma Universitato kaj ĉefredaktoron de *Enciclopedia Italiana,* preni sur sin la gvidadadon de "Lingva Kritiko". Li bonvole akceptas ĝeneralan kontroladon pri la afero, kvankam, pro la multaj okupoj, li devas komplete lasi la zorgon de la korespondado al la ĉefredaktoro s-ro La Colla, L.K., redaktoro de Enciclopedia Italiana. S-ro Teo Jung, ĉefredaktoro de Heroldo de Esperanto, speciale redaktos la gramatikan parton.[...]"

[5] Jung konis lin persone pro vizito en ties hejmo en septembro 1925, kp. Jung (1979), p. 177, 181. Ni supozas, ke la anonima "Esplorinto" estas Jung mem.

Du centraj temoj de *Lingva Kritiko* estas intime ligitaj al Jung: neologismoj kaj la *-ata/-ita*-problemo, t.e. la diskuto pri la pasivaj participoj. Pri ambaŭ *Lingva Kritiko* oponas al la t.n. Budapeŝta Skolo ĉirkaŭ la revuo *Literatura Mondo* kaj kontraŭ ties epigonoj Waringhien, Kalocsay k.a. La "ĉiama neologisma diskuto" revigliĝis post la 1970-aj jaroj en la disputoj ĉirkaŭ la Iltisa Skolo kaj precipe ĉirkaŭ la ĉeĥa aŭtoro Karolo Piĉ. Kontraŭ la anstataŭigo de vortoj kun la prefikso *mal-* Baghy jam argumentas en n-ro 15 de aprilo 1933. La *-ata/-ita*-diskuto revigliĝis kaj intensiĝis post la milito ĝis la fino de la 1960-aj jaroj, ĝis kiam la Akademio sub ties tiama prezidanto Waringhien provizore finis ĝin per (laŭ mi enhave malĝusta kaj procedure tre dubinda) decido favore al aspektismo kaj do kontraŭ la tempismo de Jung k.a. (Aktoj de la Akademio 1963–1967). I.a. la Analiza Skolo ĉirkaŭ Rikardo Ŝulco traktis la temon denove en la 1980-aj kaj 1990-aj jaroj. En *Lingva Kritiko* oni do povas legi fruan etapon de tiu "klasika" esperantologia kverelo.

Troveblas aliaj "eternaj" diskutoj. La alvokojn krei fakajn terminarojn (vd. ekz. Rollet de l'Isle en n-ro 6, julio 1932) oni legos kvazaŭ ili estus skribitaj 50 jarojn pli malfrue en la 1980-aj lige al la aktivecoj de la tiama Terminologia Esperanto-Centro (TEC). La terminfara temo "Ĉu internacia ne-reguleco aŭ ne-internacia reguleco?", kiun Eichholz (1985) (re-)malkovris, Haberler (n-ro 20, oktobro 1933) kaj Sirk (n-ro 24, aprilo 1934) jam diskutas sub la titolo "Ĉu aŭtonoma, ĉu greko-latina scienca terminaro?". La pronomo *ci* – por citi almenaŭ kelkajn ekzemplojn de gramatikaj temoj – estas same traktrata, kiel la "troŝarĝita" prepozicio *de* aŭ la "diabla vorto" *po* – tiel la titolo de nuntempa studo samtema de Cherpillod (1996).

Iu japana anonimulo[6] statistike analizas paroladojn de Zamenhof, Penndorf verkas pri Pra-Esperanto kaj (iom ĝenerale) pri la etimologio de la gramatikaj eroj de esperanto, Waringhien komparas la unuan kaj kvinan eldonon de la Hamlet-traduko, Wüster en nekrologo pri Grosjean-Maupin saĝe skizas la vortarajn tendencojn antaŭ la unua mondmilito kaj atentigas pri la "ĉiam aktualega" diskuto pri la antagonismaj tendencoj de "natura evolucio" kaj lingvo-planado en esperanto. En (preskaŭ la lastaj) kajeroj de junio kaj oktobro 1934 (n-ro 25 kaj 26) fine aperas en Germanio, regata de naci-socialista partio, kontribuaĵo de la soveta komunisto E. Drezen pri "Perspektivoj en la kampo de internacia normigo de scienc-teknikaj terminoj kaj simboloj" kun enkonduko de Wüster.

Kvankam *Lingva Kritiko* ne ĉiam atingas la sciencan nivelon, kiun ni hodiaŭ atendas, kaj ankaŭ ne tiun de la posta revuo *Esperantologio* (1949–1961), ĝi restas (ne nur historie) interesa esperantologia periodaĵo, publikigita en tre malfavoraj cirkonstancoj. Represo ŝajnas dezirinda.

[6] Reinhard Haupenthal en persona korespondado supozas ke temas pri TASHU Asaki kaj Ĵuntaro Iuashita. La aŭtoro dankas pro la indiko.

Pri la ĉefa enhavo oni jam nun povas informi sin per la sekva indekso, kiu estas kronologia kaj enhavas, krom indikoj pri aŭtoro, titolo, subtitolo kaj fonto, aldonajn ŝlosil-vortajn informojn (kursive presitajn) pri la ĉefa temo de la artikolo kaj krome ofte centrajn tezojn per citaĵo aŭ regesto.[7] La strukturo kaj cit-maniero (jaro: volumo: numero, paĝo) egalas al tiu de la *Elektronika Bibliografio de Esperantaj Artikoloj, EBEA.*[8]

La prezento de la materialo en laŭtempa ordo montras la impone diskutan, foruman karakteron de *Lingva Kritiko.*

## Bibliografio

*Aktoj de la Akademio 1963–1967.* S.l. [Rotterdam]: Akademio de Esperanto (Oficiala Bulteno de la Akademio de Esperanto, n-ro 9).

Cherpillod, André 1996. *Po — La diabla vorto.* Courgenard: La aŭtoro. 19 p.

Eichholz, Rüdiger 1985. Ĉu internacia ne-reguleco aŭ ne-internacia reguleco?. En: *Akademiaj Studoj.* Red. Rüdiger Eichholz, p. 183–192. Bailieboro, ON.

Jung, Teo 1979. *Ĉiu ĉiun. Sep jardekojn en la Esperanto-movado. Memoraĵoj de 86-jara optimisto.* Antverpeno, La Laguna: tk; Stafeto. 400 p.

Lins, Ulrich 1988. *La danĝera lingvo. Studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto.* [Moskvo]: Progreso 1990. 568 p. (1-a eldono Gerlingen: Bleicher).

Pabst, Bernhard 2002. EBEA: Retrobibliographierung nichtmonographischer Literatur zum Esperanto. En: Blanke, Detlev, red., *Plansprachen und elektronische Medien.* Beiträge der 12. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V. [GIL], 6.–8. Dezember 2002 in Berlin. Berlin: GIL.

Bernhard Pabst (n. 1960) verkas precipe pri esperantaj terminologio, bibliografio kaj historio: aŭtoro de *Inversa Vortaro de Esperanto, IVE* (1989), kunlaboro je *Perkomputora Terminokolekto, Pekoteko* (1985–1990) kaj *Manlibro de Politiko* (1994), redaktado de *Terminoteko, Informilo pri terminara laboro en Esperanto* (1990–1996), kunordigado de *Elektronika Bibliografio de Esperantaj Artikoloj, EBEA* (ekde 1994), bibliografioj de diversaj esperantistoj, laste pri Marie Hankel (2004) kaj Julius Penndorf (2005), kunlaboro en *Vikipedio* kaj pluraj artikoloj. Lia komputilreta adreso estas ⟨bernhard.pabst@gmx.de⟩

Ricevita 2003-11-02. Akceptita 2005-05-22

[7] *Regesto* (el la latina, germana *Regest*): 'resuma indiko de la enhavo de dokumento, akto, k.s.', uzata plejofte plurale: *regestoj de eklezia registro pri naskiĝoj, de tribunalaj decidoj.*

[8] *EBEA* estas bibliografio de ne-monografiaj kontribuaĵoj pri la esperantaj terminologio, gramatiko, historio kaj aliaj temoj. Versio de ĉirkaŭ 8 000 enskribaĵoj, de la 1890-aj jaroj ĝis hodiaŭ, estas publikigita ĉe `http://www.esperantoland.org/ebea/`. Germana priskribo (Pabst 2002) troviĝas ĉe `http://www.interlinguistik-gil.de/ebealink.html`. Simile kiel EBEA ankaŭ la sekva indekso ne ĉiujn diakritajn literojn de ĉiuj lingvoj ĝuste redonas. Ni petas komprenemon kaj indulgon pro tiuj teknikaj limigoj de la uzata datumbanka programo.

## Indekso

### *1932*


Redakcio [= Jung, Teo]: *'Lingva Kritiko'*
Lingva Kritiko 1932:1:01 (feb.), p. [1]
*Gvidaj redakt-principoj por LiKr: "... prezenti al la uzantoj de Eo gramatikon, kiu donu informon k konsilon en plejeble multaj dubaj kazoj — jen la tasko de la gramatika parto de nia revuo. Ne malpli grava estos la kontrolado de la evoluo de nia komuna k teknika vortaro. En la komuna vortaro oni speciale atentos la ... neologismojn. ... Aliaj fakoj estos: pri la Ea stilo, pri ĝenerala lingvistiko, pri la svarmantaj projektoj de lingvo int. kompare kun Eo, lingva 'libera tribuno'. ..."*

Migliorini, Bruno: 'Helpa' lingvo
*planlingvoj*
Lingva Kritiko 1932:1:01 (feb.), p. [1–2]
*Ne estas allaseble kompari Eon al etnaj lingvoj en ties naciaj funkcioj, sed nur al etnaj lingvoj en ties internacia funkcio ("funkciantaj kiel helplingvoj"). Ĝusta komparo do ekzemplo nur: ĉu la Franca aŭ Eo pli taŭgas por kongresa komunikado inter Hispano kaj Japano? "Multaj argumentoj de la kontraŭuloj de la lingvo int. rompiĝas kontraŭ tiu ĉi rimarko". Ekz.: malunueca prononcado de Eo fare de parolantoj de diversaj etno-lingvoj komparebla nur al la simile malunueca prononcado de la Angla fare de la sama grupo.*

Waringhien, G[aston]: Scipovi lingvon
Lingva Kritiko 1932:1:01 (feb.), p. [2]
*Diversaj gradoj de lingvo-regado de hotel-pordisto ĝis literatura profesoro. Eo ne tiel facila je certa lingvo-nivelo. "Tial mi opinias necese altiri la atenton de la e-istoj al la relativa kompleksеco de ilia lingvo k rapide studi ties kaŭzojn."*

Bennemann, Paul: Ĉu vi konas sinjoron Bojkot'? Lingva babilaĵo de Paul Bennemann, Leipzig, Germanujo
*etimologio*
Lingva Kritiko 1932:1:01 (feb.), p. [2–3]
*Anekdote klarigas la devenon de terminoj kiel zepelino, saksofono, benzino, gilotino, drezino, nikotino, ktp., kiuj ĉiuj originas de propraj nomoj de personoj, je la ekz. Zeppelin, Sax, Benz, Guillotin, Nicot, ktp. Kun "Rim. de Red. [= Jung, Teo]: ... Prof. B. Migliorini verkis ... libron pri tiu temo ... sub titolo 'Dal nome proprio al nome comune, Genève, Olschki 1927 ..."*

Takahaŝi, Meguru: Pri la uzado de 'kio' kiel relativo
*relativo; 'kio'; tabelvortoj*
Lingva Kritiko 1932:1:01 (feb.), p. [3–4] 1932

Le Brun, P.: Tonelo, tuno, tino
*leksikografio; termino*
Lingva Kritiko 1932:1:01 (feb.), p. [4]
*Klarigas, kial li uzis la radikon 'tonel-' anstataŭ 'tun-' en artikolo en REo pri "nova franca 40.000 Ta. ŝipo 'L'Atlantique' ". Kun referenco al la Marista Terminaro de Rollet.*

Esplorinto [ps.]: Notoj pri Occidental [1]
*interlingvistiko; Occidental*
Lingva Kritiko 1932:1:01 (feb.), p. [4]

[Jung, Teo]: Survoje al Konsilanta Gramatiko [1]. [Demandoj 1–12]
*gramatiko*
Lingva Kritiko 1932:1:02 (mar.), p. [1–2]

Schattat, G.: Reguloj kaj formuloj
*vortfarodo; vort-kategorioj*
Lingva Kritiko 1932:1:02 (mar.), p. [2]
*"Granda eraro estas la idista teorio, ke nura radiko *ne* havas karakteron substantivan, adjektivan ktp., sed ke tiun karakteron ĝi ricevas de la finaĵo ..."*

Bailley, William: Lingvaj notoj
Pri la prepozicio 'da'. Pri 'kelkaj' kaj 'kelke da'
*prepozicio; 'da'*
Lingva Kritiko 1932:1:02 (mar.), p. [2–3]

Esplorinto [ps.]: Notoj pri Occidental [2]. (Fino.)
*interlingvistiko; Occidental*
Lingva Kritiko 1932:1:02 (mar.), p. [3–4]

Schattat, G.: Relativ-pronomo 'kio'
*relativo; 'kio'; tabelvortoj*
Lingva Kritiko 1932:1:02 (mar.), p. [4]
*Resp. al LiKr 01 (feb.) p. [3–4].*

Avril, [Georges]: Pri la uzado de 'kio' kiel relativo
*relativo; 'kio'; tabelvortoj*
Lingva Kritiko 1932:1:02 (mar.), p. [4]
*Resp. al LiKr 01 (feb.) p. [3–4].*

De Maertelaere, Ach.: Pri karesa sufikso
*sufikso; -j/; -ĉj/; -nj/*
Lingva Kritiko 1932:1:02 (mar.), p. [4]
*Proponas novan karesan sufikson '-j-' "uzinda[n]*

*almenaŭ por senseksaj nomoj" laŭ la ekzemplo de la Nederlanda: " '[La knabino] diras ameme: Mia pupjo (pupetjo) dormu bone!', same kiel ŝia patrinjo diras al ŝi je la enlitiĝo: 'Mia infanjo (infanetjo), dormu bone!'."*

Grosjean-Maupin, [E.]: Pri la uzado de 'kio' kiel relativo
*relativo; 'kio'; tabelvortoj*
Lingva Kritiko 1932:1:03 (apr.)

La Colla, Stefano: La inventaro de nia vorttrezoro
*neologismoj; terminaro; terminologio*
Lingva Kritiko 1932:1:03 (apr.), p. [1]
*"Mi jam komencis .. k surslipigis la radikojn entenatajn en la vortaroj de Meazzini, Kabe, Verax, Presa Societo; Grosjean-Maupin, Christaller, Bennemann, Plena Vortaro, Wüster; ... La slipoj surhavos, krom la radikojn, ĝian tradukon en la ĉefaj lingvoj (mi proponus anglan, francan, germanan, hispanan, italan, portugalan k rusajn tradukojn); k estus konsilinde aldoni mallongan difinon esperantan de la signifo de la nacilingva traduk-vorto. ..."*

E.D.D. [= Durrant, Ernest Donald]: Urĝas evoluo de Scienca Terminaro
*terminologio; scienco*
Lingva Kritiko 1932:1:03 (apr.), p. [1–2]

Lejzerowicz, I.: Internaciaj vortoj
*terminologio*
Lingva Kritiko 1932:1:03 (apr.), p. [2]

Waringhien, G[aston]: Scipovi Lingvon ...
Lingva Kritiko 1932:1:03 (apr.), p. [3–4]

Grosjean-Maupin, E.: Ankoraŭ pri la relativo 'kio'
*tabelvortoj; 'kio' relativo*
Lingva Kritiko 1932:1:03 (apr.), p. [4]

Bünemann, O[scar]: La interliga streko
*interpunkcio; interliga streko; ortografio*
Lingva Kritiko 1932:1:03 (apr.), p. [4]
*"La streketon oni uzas, kiam la vorto sen ĝi fariĝus tro longa kaj tiel neklara, k ankaŭ por eviti miskomprenojn: sendata letero estas letero, kiun oni sendas; kaj sen-data letero estas letero, kiu ne portas daton. ..."*

Bünemann, Oscar: Pri la montrado de la kazoj
*kazo*
Lingva Kritiko 1932:1:03 (apr.), p. [4]

B.M. [= Butin, Max]: Lingvistiko kaj Internacia Lingvo
*Meillet, A.; Sapir, E.*
Lingva Kritiko 1932:1:03 (apr.), p. [4]

Jung, Teo (red.): Survoje al Konsilanta Gramatiko [3]. [Gramatikaj demandoj kaj respondoj]
*gramatiko; refleksivo; interpunkcio; singularo; pluralo;*
Lingva Kritiko 1932:1:04 (majo), p. [1–2]
*"Por eviti konfuzon de niaj respondoj kun la 'Lingvaj Respondoj' de D-ro Zamenhof, ni nomos la niajn de nun 'gramatikaj' demandoj kaj respondoj. ..."*

Sirk, H[ugo]: Alp(in)isma Terminaro
*terminaro; sporto; alpinismo*
Lingva Kritiko 1932:1:04 (majo), p. [2]

Boucon, H.: Pri neologismoj
*neologismoj*
Lingva Kritiko 1932:1:04 (majo), p. [3]
*Refutas la kritikon, ke Eo stagnus, per listo de neologismoj, kiuj anstataŭigis klasikajn vortojn, ekz. almiliti > konkeri, subaĉeti > korupti, libertempi > ferii, elrigardi > aspekti; el komenc-tempa 'bleki' fariĝis heni (ĉevalo), muĝi (bovo), boji (hundo), miaŭi (kato), grunti (porko), hurli (lupo), kviki (muso), graki (korvo), pepi (pasero), kveri (kolombo); ktp.*

Grosjean-Maupin, E.: Naciaĵoj kaj neologismoj
*neologismoj*
Lingva Kritiko 1932:1:04 (majo), p. [3]

B.M. [= Butin, Max]: Dokumentoj pri L.I. Por kaj kontraŭ
*Schuchardt, H.; Bally, Ch.*
Lingva Kritiko 1932:1:04 (majo), p. [3]
*Citaĵoj de lingvistoj pri planlingvoj k spec. pri Eo.*

Rollet de l'Isle: Pri la prepozicio 'de'
*prepozicio; 'de'; 'da'*
Lingva Kritiko 1932:1:04 (majo), p. [3–4]
*"Kelkaj esperantistoj jam de longe plendas pri uzo je la prepozicio 'de' laŭ pluraj sencoj, kio efektive kaŭzas konfuzon en kelkaj okazoj. ..."*

Klemm, E.: Etjo
*sufikso; -etjo; neologismo*
Lingva Kritiko 1932:1:04 (majo), p. [4]
*Proponas novan karesan sufikson '-etj/': patretjo, fratinetjo, hundetjo, avinetjo ktp.*

S.L.C. [= La Colla, Stefano]: Scipovi. Ril. al Lingva Kritiko p. 2

*gramatiko; prefikso; sufikso; 'scipovi'; red-; -onc; -ev; -if*
Lingva Kritiko 1932:1:04 (majo), p. [4]
*"Jam antaŭ dek jaroj mi proponis, ekzameni ... ĉu estas rekomendinde, enkonduki unu aŭ alian el la sekvantaj afiksoj: red-, -onc, -ev, -if ... -if = diri ion tia, deklari ion tia; ekz. verifi = deklari ion vera; kulpifi = deklari ion kulpa ..."*

T.J. [= Jung, Teo]: La 'problemo' ata-ita
*pasivaj participoj; ata-ita*
Lingva Kritiko 1932:1:05 (jun.), p. [1–2]

Boucon, H.: Respondoj al kelkaj leteroj
*sufikso; -etjo; neologismo; ata-ita*
Lingva Kritiko 1932:1:05 (jun.), p. [2]

Orengo, Rinaldo: Rollet de l'Isle. Scienca Fundamenta Esperanto Terminaro. Parizo 1931
*recenzo; terminaro; scienco*
Lingva Kritiko 1932:1:05 (jun.), p. [3–4]

Steiner, Georgo: Pri karesa sufikso
Ril. al Lingva Kritiko n-ro 2
*sufikso*
Lingva Kritiko 1932:1:05 (jun.), p. [4]

Boirac, Emile; S.L.C. [= La Colla, Stefano]: 'Edzo' kaj 'haladzo'
*termino; 'edzo'; 'haladzo'; etimologio*
Lingva Kritiko 1932:1:05 (jun.), p. [4]
*Ril. al 'edzo' nur referenco al la Lingva Respondo (p. 32) de Zamenhof.*

Schattat, G.: Tuno
Ril. Al Lingva Kritiko n-ro 1
*termino; 'tuno'*
Lingva Kritiko 1932:1:05 (jun.), p. [4]
*Kun n.d.l. Red.*

La Colla, Stefano: Pri karesa sufikso
Ril. Al Lingva Kritiko n-ro 2
*sufikso; -etj*
Lingva Kritiko 1932:1:05 (jun.), p. [4]
*'-j- kaj -etj- estas nepre malkonsilindaj.'*

Schattat, G.: Pri karesa sufikso
Ril. al Lingva Kritiko n-ro 2
*sufikso*
Lingva Kritiko 1932:1:05 (jun.), p. [4]

Jung, Teo: Survoje al Konsilanta Gramatiko [1]
*akuzativo; participo; imperativo; fonetiko; gramatiko*
Lingva Kritiko 1932:1:06 (jul.), p. [1]

Degenkamp, G.J.: Antaŭ ol, antaŭ kiam
*'ol'*
Lingva Kritiko 1932:1:06 (jul.), p. [2]

Schattat, G.: Grupo-reagoj
*vortfarado*
Lingva Kritiko 1932:1:06 (jul.), p. [2–3]

Migliorini, Bruno: Faklingvaj neologismoj kaj internacieco
*terminologio*
Lingva Kritiko 1932:1:06 (jul.), p. [3]
*Kiam oni kreu fakan neologismon? Kiam oni uzu vorton el la ĝenerala lingvaĵo en vastigita aŭ specialigita faka senco? Ekz.: ĉu ekvilibro aŭ egalpezo? Ĉar krom la Germ. 'Gleichgewicht' ĉiuj lingvoj uzas specialan terminon, ekvilibro estas bona. Ĉu (elektra) kurento aŭ fluo? Ĉar nur la Angla havus du vortojn, ankaŭ por Eo unu vorto (fluo) sufiĉus [!].*

T.J. [Jung, Teo]: Pri la objektiva genitivo
(Kp. la artikolon de s-ro Rollet de l'Isle en 'Lingva Kritiko' n-ro 4)
*kazo; genetivo; 'de'; propocizio*
Lingva Kritiko 1932:1:06 (jul.), p. [3]

Redakcio [Jung, Teo]: Kion ni ne bezonas
Lingva Kritiko 1932:1:06 (jul.), p. [3]
*Ne teoriajn pripensojn, sed "metoda scienca esplorado de nia literaturo".*

Rollet de l'Isle: Pri la bezono de Teknikaj Vortaroj
*terminologio*
Lingva Kritiko 1932:1:06 (jul.), p. [3–4]
*Urĝas verki fakajn terminarojn.*

Zambrzycki, A.: La koncepto 'paroli' kaj parencaj konceptoj en Esperanto
*terminologio; sinonimoj*
Lingva Kritiko 1932:1:06 (jul.), p. [4]
*"S-ro A. Zambrzycki, eks-redaktoro de Voĉo de Farmaciistoj, Kotuń (Polujo), prilaboras listojn de sinonimaj vortoj en Esperanto. Kiel specimenon, ni publikigas ĉi-sube la serion 'paroli' ..."*

Boucon, H.: KIU kaj KIO kiel relativaj pronomoj
*relativo; pronomoj; 'kiu'; 'kio'; tabelvortoj*
Lingva Kritiko 1932:1:06 (jul.), p. [4]

Nylén, Paul: Virĉevalo aŭ ĉevalviro?
*terminologio; vortfarado*
Lingva Kritiko 1932:1:06 (jul.), p. [4]

Studejo de Zamenhofa Gramatiko, Tokio. Teksto-Kritiko de la Paroladoj de Zamenhof laŭ Originala Verkaro de D-ro Dietterle
*Zamenhof; paroladoj; vort-statistiko*
Lingva Kritiko 1932:1:07 (aŭg.), p. [1–2]

Malmkvist, Erik: Pri la uzado de 'kio' kiel relativo
*relativo; 'kio'; tabelvortoj*
Lingva Kritiko 1932:1:07 (aŭg.), p. [2–3]

Engholm, Stellan: Novaj vortoj en Esperanto
*neologismoj*
Lingva Kritiko 1932:1:07 (aŭg.), p. [3–4]
*Artikolo de Liem Thong Hie en 'Esperanto' 1932:2 (Feb.) montras, ke la "senĉesa kreado de novaj vortoj malfaciligas Esperanton precipe al azianoj. ... Ni enkonduku novajn vortojn nur kiam estas absolute necese..."*

Wahl, E[dgar] de: Respondo al kritiko
*interlingvistiko; Occidental*
Lingva Kritiko 1932:1:07 (aŭg.), p. [4]
*"En la artikolo 'Notoj pri Occidental' en n-ro 2 de 'Lingva Kritiko' estas eldiritaj kelkaj kritikoj, kiuj ŝajnas al mi ne justaj, kaj ankaŭ kelkaj eraroj: ....".*

La Colla, Stefano: Dr. Ernst Sós, Dictionnaire actuariel des langues Espéranto — Allemande — Anglaise et Francaise
*recenzo; terminaro; ekonomio; komerco; termino; paronimoj*
Lingva Kritiko 1932:1:07 (aŭg.), p. [4]
*"Tiu ĉi verketo enhavas sur dekses paĝoj la teknikajn esprimojn pri asekurado. ... 'Domaĝo' estas uzata, kiel tro ofte nuntempe, laŭ nefundamenta, konfuziga maniero; por forigi la miskomprenojn, oni proponis 'damaĝo', sed la vortojn, kiuj diferencas nur per unu litero, oni prefere evitu ...".*

Esperantista Lingva Komitato kaj Akademio [Raporto de la Prezidanto de la Akademio; Raporto de la Direktoro de la Gramatika Sekcio]
*Akademio; AdE; ata-ita; 'po'; mallongigoj*
Lingva Kritiko 1932:1:08 (sep.), p. [1–4]
*Represo el la 'Oficiala Raportaro' de la 24-a Universala Kongreso de Esperanto.*

Grosjean-Maupin, E.: Esperantista Lingva Komitato kaj Akademio. [Raporto de la Direktoro de la Sekcio 'Komuna Vortaro']
*Akademio; AdE;*
Lingva Kritiko 1932:1:09/10 (okt.), p. [1]

Rollet de l'Isle, M.: Esperantista Lingva Komitato kaj Akademio. [Raporto de la Sekcio por la Teknikaj Vortaroj]
*Akademio; AdE*
Lingva Kritiko 1932:1:09/10 (okt.), p. [1]

R.L.: Kongresaj kunsidoj de la Lingva Komitato kaj ĝia Akademio
*Akademio; AdE; kongreso; UK*
Lingva Kritiko 1932:1:09/10 (okt.), p. [2]
*Kun rim. de Rob[ert] Kreuz.*

Migliorini, Bruno: La artefaritaj elementoj en la naciaj lingvoj. (Prelego farita ĉe la Internacia Somera Universitato, Parizo 1932)
*SUK*
Lingva Kritiko 1932:1:09/10 (okt.), p. [2–5]
*"Kaj ĝuste pro tio la svarmantaj projektoj de artefaritaj lingvoj k Eo abisme diferenciĝas: ĉar la projektoj estas teoriaĵoj k Eo malgranda vivanta lingvo de malgranda popolo."*

Jung, Teo: Survoje al Konsilanta Gramatiko [2]
*gramatiko; prepozicio; komparativo; kvazaŭ; ata-ita; artikolo*
Lingva Kritiko 1932:1:09/10 (okt.), p. [5]

Waringhien, G[aston]: Letero al Teo Jung pri la pasivaj participoj
*ata-ita; pasivaj participoj*
Lingva Kritiko 1932:1:09/10 (okt.), p. [6–7]

Calloens, Leo: Pli — plu — ankoraŭ — jam
*'pli'; 'plu'; 'ankoraŭ'; 'jam'*
Lingva Kritiko 1932:1:09/10 (okt.), p. [7]

Studejo de Zamenhofa Gramatiko, Tokio. Teksto-Kritiko de la Paroladoj de Zamenhof laŭ Originala Verkaro de D-ro Dietterle. Daŭrigo. Komencon vidu en Lingva Kritiko n-ro 7
*Zamenhof; paroladoj; vort-statistiko*
Lingva Kritiko 1932:1:09/10 (okt.), p. [7–8]

Jung, Teo: Survoje al Konsilanta Gramatiko [1]
*gramatiko; adverbo; refleksivo; dativo; kazo; -iĝ*
Lingva Kritiko 1932:1:11 (nov.), p. [1]

Studejo de Zamenhofa Gramatiko, Tokio. Teksto-Kritiko de la Paroladoj de Zamenhof laŭ Originala Verkaro de D-ro Dietterle. Daŭrigo. Komencon vidu en Lingva Kritiko n-ro 7, 1-an daŭr. en 9/10.
*Zamenhof; paroladoj; vort-statistiko*
Lingva Kritiko 1932:1:11 (nov.), p. [1–2]

Bauman, J. E.: Tempaj rilatoj
*ata-ita; pasivaj participoj*
Lingva Kritiko 1932:1:11 (nov.), p. [3]

T. J. [Jung, Teo]: Refoje la 'problemo' ata-ita
*ata-ita; pasivaj participoj*
Lingva Kritiko 1932:1:11 (nov.), p. [3–4]

Padfield, W. W.: Pri ata-ita
*ata-ita; pasivaj participoj*
Lingva Kritiko 1932:1:11 (nov.), p. [4]

Gerber, Karlo: Abelkultura terminaro
*terminaro; zoologio; abelkulturo*
Lingva Kritiko 1932:1:11 (nov.), p. [4]

## *1933*

Studejo de Zamenhofa Gramatiko, Tokio. Teksto-Kritiko de la Paroladoj de Zamenhof laŭ Originala Verkaro de D-ro Dietterle Daŭrigo. Komencon vidu en Lingva Kritiko n-ro 7, 1-an daŭr. en 9/10.
*Zamenhof; paroladoj; vort-statistiko*
Lingva Kritiko 1933:1:12 (jan.), p. [1]

Gerber, Karlo: Abelkultura terminaro. Fino
*terminaro; zoologio; abelkulturo*
Lingva Kritiko 1933:1:12 (jan.), p. [1–2]

Dratwer, I.: Publika letero al la Esperantaj verkistoj
*neologismoj*
Lingva Kritiko 1933:1:12 (jan.), p. [2]
*"Mi ... devas prenadi la fremdlingvajn vortarojn por ekscii, ke 'dura' estas 'malmola', 'lucida' egalvaloras al 'klarvida', 'trista' al 'malgaja', 'stumbli' al 'faleti', ktp. ktp. Dank' al via gimnastikado k ĵonglado per la lingvo, Eo fariĝas ĉiam pli malfacila; ..."*

Schattat, G.: Pri la prepozicio 'de'
(Ril. al Lingva Kritiko n-ro 4, p. 3)
*prepozicio; 'de'*
Lingva Kritiko 1933:1:12 (jan.), p. [2–3]

Engholm, Stellan: Aoristo. [Resp. al G. Waringhien en Lingva Kritiko n-ro 9/10]
*pasivaj participoj; ata-ita*
Lingva Kritiko 1933:1:12 (jan.), p. [3]

Grosjean-Maupin, E.: Kompletiga rimarko pri la objektiva genitivo
*kazo; genitivo; 'de'*
Lingva Kritiko 1933:1:12 (jan.), p. [3]

Bauman, John E.: Lingvaj rimarkoj
*'de'; 'da'; -ig; sufikso*
Lingva Kritiko 1933:1:12 (jan.), p. [3–4]

Robo (ps.): Mortema
*termino; 'mortal-'; neologismo*
Lingva Kritiko 1933:1:12 (jan.), p. [4]
*Kiel traduki la Anglan frazon 'All men are mortal'? 'mortema' ne taŭgus, "mankas ĝis nun en Eo science ĝusta vorto por vesti la nocion 'mortal'. Proponas "prov-enigi" la radikon 'mortal-'.*

Schattat, G.: Novaj afiksoj. (Rilatas al Lingva Kritiko n-ro 4, p. 4)
*prefikso; sufikso; red-; -onc; -ev; -if*
Lingva Kritiko 1933:1:12 (jan.), p. [4]
*Defendas sian proponon "ekzameni, ĉu eble unu aŭ la alia el ili [la proponitaj sufiksoj] estas rekomendinda."*

Studejo de Zamenhofa Gramatiko, Tokio. Teksto-Kritiko de la Paroladoj de Zamenhof laŭ Originala Verkaro de D-ro Dietterle. Fino
*Zamenhof; paroladoj; vort-statistiko*
Lingva Kritiko 1933:1:13 (feb.), p. [1–2]

Kalocsay, K.: Publika letero al s-ro Dratwer
*neologismo*
Lingva Kritiko 1933:1:13 (feb.), p. [2]
*Defendas siajn neologismojn en 'Strečita Kordo' k 'Eterna Bukedo'. Estus sur la sama linio kiel Zamenhof k Grabowski.*

Carreiro Neto, Porto: La formoj 'ata' kaj 'ita'
*ata-ita; pasivaj participoj*
Lingva Kritiko 1933:1:13 (feb.), p. [2–4]

Jung, Teo: Survoje al Konsilanta Gramatiko [4] [Demandoj 44-54]
*ata-ita; pasivaj participoj; akuzativo; 'ke'; 'nek'*
Lingva Kritiko 1933:1:14 (mar.), p. [1–2]

Baghy, Julio: Danĝera vojo [1]
*neologismoj*
Lingva Kritiko 1933:1:14 (mar.), p. [2–3]
*Tro multaj (609) neologismoj en la 'Poezia Fakvortaro': "Ili estas parte akcepteblaj, parte superfluaj, eĉ ekzistas inter ili tute netaŭgaj el vidpunkto gramatika. ... ni verkistoj embarasiĝus, se iu kamparano dezirus la plej simplan priskribon de sia veturilo. Ni bonege povas manĝi, friŝtiki, devori,*

*pranzi, vikti, sed nomi la partojn de kampara veturilo ni ne kapablas. ...*" "maskita reformado, IDO-igo, ..."

Bauman, John E.: Vortaraj aferoj
*terminologio; termino; 'eficienco'; 'ci'; -aĉ; pronomo*
Lingva Kritiko 1933:1:14 (mar.), p. [3–4]
*1. Pri ĝusta senco de 'eficienco' (laborkvanto liverata de ia maŝino por ĉiu unuo de laboro enmetita). 2. Ne uzu ci / vi en la senco de Germ. Du / Sie, Franc. tu / vous, ktp., ankaŭ Z. ne faris. 3. La lingvistikaj terminoj propozicio, frazero, klaŭzo ofte neklare difinitaj en vortaroj.*

F.J.B. [Berger, Ferdinand Josef]: Kompreni
*leksikologio; termino*
Lingva Kritiko 1933:1:14 (mar.), p. [4]
*Ne 'kompreni' frazon enhave (ekz. ĉar oni ne konas la vortojn) aŭ ĉar oni malbone aŭdis la vortojn. Por la dua kazo kompreni estas "nepre malkonsilinda", prefere 'bonaŭdi', 'ĝustaŭdi', 'elaŭdi', k.s.*

T.J. [Jung, Teo]: Pli bona stilo per dispartigo de longa frazo
*stilo*
Lingva Kritiko 1933:1:14 (mar.), p. [4]
*Oni preferu "tri-kvar mallongajn, bonstilajn kaj facile kompreneblajn frazojn" al longega "frazmonstro". Donas ekzemplon.*

Penndorf, J.: Pra-Esperanto
*pra-Esperanto; Zamenhof, L.L.*
Lingva Kritiko 1933:1:15 (apr.), p. [1]

Baghy, Julio: Danĝera vojo [2]. [Daŭrigo]
*neologismoj; mal-*
Lingva Kritiko 1933:1:15 (apr.), p. [2–3]
*"La tendenco forigi la vortojn, faritajn per la prefikso 'mal-' estas danĝera eksperimento kaj dubsukcesa novaĵo, ĉar oni ne povas malpermesi la aplikon de la sama prefikso ĉe tiuj vortoj k tiamaniere ni havas duoblaĵojn: malfermi = uvri, aperti; fermi = maluvri, malaperti .."*

Takahaŝi, Meguru: Pri la refleksiva pronomo [1] [Kun respondo de W[alter] Lippmann]
*refleksivo; pronomo*
Lingva Kritiko 1933:1:15 (apr.), p. [3–4]

Knoll, B.: Ĉu 'negocanta' estraro?
*leksikologio; termino*
Lingva Kritiko 1933:1:15 (apr.), p. [4]
*Ne 'negocanta' (= celanta monan profiton), sed 'afergvidanta' aŭ 'plenumanta' estraro.*

G.H.: 'Stiefbruder'
*termino*
Lingva Kritiko 1933:1:15 (apr.), p. [4]
*'Duonfrato' el la vortaroj ne taŭgas. Necesas enkonduki "apartajn vortojn por la ideoj 'Stiefbruder' kaj 'Halbbruder'."*

Wüster, [Eugen]: Preciza vorto por 'eficienco'
*termino*
Lingva Kritiko 1933:1:15 (apr.), p. [4]
*"Ekzistas de multaj jaroj plene natura kaj taŭga esprimo por 'Wirkungsgrad', nome efikeco, pli detale koeficiento de efikeco. Ĝi enestas en la vortaroj de Wüster ... kaj Bennemann. ... Oni konsultu pli multe la ekzistantajn fakajn terminarojn!"*

Penndorf, J.: Pra-Esperanto. (Fino.)
*pra-Esperanto; Zamenhof, L.L.*
Lingva Kritiko 1933:1:16 (maj.), p. [1–2]

Baghy, Julio: Danĝera vojo [3]. [2a daŭrigo kaj fino]
*neologismoj; pseŭdosufikso; -aci; -ator; -ik; -iv; -um; -i*
Lingva Kritiko 1933:1:16 (maj.), p. [2–3]
*"Kion fari? Halti sur la danĝera vojo k revizii la principojn de la laboro literatura. ... Miaj proponoj celas la purigadon de la lingvo, ĝian naturan poluriĝon ... [sekvas 5 proponoj]. ... a) Por forigi k eviti la pseŭdosufiksojn ... oni prenas nur la vortradikojn. En la Poezia Fakvortaro ni trovas ekzemplojn: erota, erupti, gimnasto, konversi, situi, ktp. b) Por [iaj efikoj] oni provas krei vortojn el la orig. elementoj de la lingvo: Neologismo = novigismo, novismo; agrikulturo = terkulturo; hidroterapio = akvokuraco," ktp.*

Takahaŝi, Meguru: Pri la refleksiva pronomo [2]. (Fino.)
*refleksivo; pronomo*
Lingva Kritiko 1933:1:16 (maj.), p. [3–4]

F.J.B. [Berger, Ferdinand Josef]: Kondiĉa modo
*verbo; kondicionalo*
Lingva Kritiko 1933:1:16 (maj.), p. [4]

Einig, A.: Stiefbruder. (Vd. en Lingva Kritiko n-ro 15.)
*termino*
Lingva Kritiko 1933:1:16 (maj.), p. [4]
*Proponas solvon laŭ Franca modelo: duonfrato = Stiefbruder; samsangulo, samsanga frato = Halbbruder, frère consanguin (sama patro) aŭ samuterulo, samutera frato (sama patrino).*

Sieche, G.: La 'mal-vortoj'
*mal-*
Lingva Kritiko 1933:1:16 (maj.), p. [4]
*"Kial oni [= Baghy] parolas pri danĝero, kvankam jam ekzistas rifuzi apud malakcepti, maldolĉa — amara, malaperi — foriĝi ...?"*

Jung, Teo: Survoje al Konsilanta Gramatiko [5]. [Demandoj 55-60]
*adverbo; nenia; kazo*
Lingva Kritiko 1933:1:17 (jun.), p. [1]

Penndorf, J.: La Zamenhofa tabelo
*tabelvorto*
Lingva Kritiko 1933:1:17 (jun.), p. [2]

Kalocsay, K.: Pri la pasivaj participoj
*ata-ita; pasivaj participoj*
Lingva Kritiko 1933:1:17 (jun.), p. [2–3]

T.J. [Jung, Teo]: Pri la pasivaj participoj. Postrimarko [al la samtema artikolo de Kalocsay]
*ata-ita; pasivaj participoj*
Lingva Kritiko 1933:1:17 (jun.), p. [3]

La Colla, Stefano: Recenzoj kaj studoj. [Pri Drezen, E., *Historio de la Mondolingvo*, Leipzig: Ekrelo 1931]
*recenzo; Drezen, E.; interlingvistiko*
Lingva Kritiko 1933:1:17 (jun.), p. [3–4]
*Multaj detaloj malĝustaj, probable ŝuldata al la bibliografio de Stojan [citas ekzemplojn]. "Malgraŭ la eraretoj k la rezervoj elvokitaj de la politika [komunista] vidpunkto de la aŭtoro, la verko de samideano E. Drezen estas tre altvalora, kaj ĉiam tre interesa, kaj ĝi meritas la plej grandan disvastigon."*

P.B. [Bennemann, Paul]: Prepocizio 'de'
*prepozicio; 'de'*
Lingva Kritiko 1933:1:17 (jun.), p. [4]

Bünemann, Oscar: Pra-Esperanto. (Komento al la artikolo de J. Penndorf en 'Lingva Kritiko' I/15 kaj 16)
*pra-Esperanto*
Lingva Kritiko 1933:1:17 (jun.), p. [4]
*Atentigas pri mis-cito de Penndorf.*

H-s K.: Teknikaj vortoj por gramatikaj konceptoj
*termino; lingvistiko*
Lingva Kritiko 1933:1:17 (jun.), p. [4]
*Alvokas prepari "teknikan vortaron por gramatikaj esprimoj".*

Rollet de l'Isle; Lippmann, Walter: Esperantista Lingva Komitato kaj Akademio. [Raporto de la Prezidanto de la Lingva Komitato. Sekcio de Teknikaj Vortaroj. Sekcio Gramatiko]
*Akademio; AdE*
Lingva Kritiko 1933:1:18/19 (jul. – aŭg.), p. [1–3]
*"Kiel ni jam faris lastjare post la Universala Kongreso de Parizo, ni ankaŭ nun, post la Jubilea en Kolonjo, represas ĉi-sekve la jarraportojn de niaj lingvaj institucioj el la 'Oficiala Raportaro', tiamaniere diskonigante iliajn laborojn en vastaj rondoj de la esperantista publiko."*

Collinson, W[illiam] E.: Pri la metaforo en internacia lingvo. Prelego farita dum la Somera Universitato de la Jubilea 25-a Kongreso de Esperanto en Kolonjo
*SUK, metaforo*
Lingva Kritiko 1933:1:18/19 (jul. – aŭg.), p. [3–5]

Penndorf, J.: La Zamenhofa tabelo [2]. (Daŭrigo kaj fino.)
*tabelvorto*
Lingva Kritiko 1933:1:18/19 (jul. — aŭg.), p. [5]

La Colla, Stefano: Zamenhof kaj la neologismoj
*neologismo; Zamenhof, L.L.; Waringhien, G.*
Lingva Kritiko 1933:1:18/19 (jul. – aŭg.), p. [5–6]
*Reago al G. Waringhien, "Majstroadmiro aŭ idolkulto" en Literatura Mondo, nov. 1932: "Prof. W. volas, evidente, per la ekzemplo de Z., pravigi sin, Kalocsay kaj la skolon de 'Literatura Mondo'; sed al mi ŝajnas, ke lia argumentado ne estas pruvanta. ... Z. estis tre singarda ĉe la alpreno de novaj vortoj en la lastaj jaroj, kiam la Esperanta vortprovizo fariĝis sufiĉe riĉa. ..."*

Takahaŝi, Meguru: Pri la refleksiva pronomo
*pronomo; refleksivo*
Lingva Kritiko 1933:1:18/19 (jul. – aŭg.), p. [6–7]

Bauman, J.E.: Uzo de infinitivo post prepozicio
*infinitivo; prepozicio*
Lingva Kritiko 1933:1:18/19 (jul. – aŭg.), p. [7–8]
*Ĉu 'inter plani kaj fari estas granda diferenco' anstataŭ 'inter planado kaj farado estas granda diferenco' eblas? Proponas, ke jes.*

Roemer, Hans: "Batita ŝoseo"
*leksikologio; termino*
Lingva Kritiko 1933:1:18/19 (jul. – aŭg.), p. [8]
*Oni ne uzu 'batita ŝoseo' en la senco 'ŝoseo multe uzita kaj irebla', kvankam latinidaj lingvoj havas tiun sencon, ekz. Fr. un chemin battu, ktp.*

Boucon, H.: Pri la prepozicio 'je'
*'je'; prepozicio*
Lingva Kritiko 1933:1:18/19 (jul. – aŭg.), p. [8]

Penndorf, J.: Pra-Esperanto. (Respondo al la artikoleto de Oscar Bünemann en Lingva Kritiko I/17)
*pra-Esperanto*
Lingva Kritiko 1933:1:18/19 (jul. – aŭg.), p. [8]

Jung, Teo: Survoje al Konsilanta Gramatiko [6]. [Demandoj 60–70]
*'po'; vortordo; neado; 'je'; prepozicio*
Lingva Kritiko 1933:1:20 (okt.), p. [1]

Penndorf, J.: La konstruo de la lingva sistemo
*lingvo-historio; etimologio; 'laŭ'*
Lingva Kritiko 1933:1:20 (okt.), p. [2–3]
*Etimologiete pri -a, -aĉ, -ad, aĵ, -al, -am, an, -ant, -ar, -as, -at, bo-, -ĉj, dis-, ktp. ĝis -u, -uj, -ul, -um, -us.*

[Haberler]: Sciencaj verkoj en Esperanto. Pensoj al mia traduko de la artikolo pri klakŝtonoj en Heroldo n-ro 41 (746)
*terminologio; neologismo; terminiko; termin-farado; geologio*
Lingva Kritiko 1933:1:20 (okt.), p. [4]
*Ĉu Latin-grekaj fakesprimoj aŭ terminoj el simplaj Eo-vortoj? Tendencas al la dua solvo, do 'rul-ŝtonarbulo' anstataŭ 'konglomerato', glaciegotempo anstataŭ diluvio.*

Bauman, J.E.: Grado de verba forto en "-anto" kaj "-ado"
*gerundio; -ant; -ad*
Lingva Kritiko 1933:1:20 (okt.), p. [4]

Jung, Teo: Survoje al Konsilanta Gramatiko [7]. [Demandoj 71–77]
*'po'; trans; laŭ; 'milion'; 'miliard'; pluralo*
Lingva Kritiko 1933:1:21 (dec.), p. [1]

Hartog, Joh.: Bibliaj esprimoj en Esperanto [1]
*Biblio; etimologio*
Lingva Kritiko 1933:1:21 (dec.), p. [2]

Waringhien, G[aston]: Kritika 'aparato' de la Zamenhofa Hamleto
*Zamenhof, L.L.; tradukado; Hamleto; Beaufront, L.*
Lingva Kritiko 1933:1:21 (dec.), p. [2–3]
*Komparo de la 1-a eld. Nurnbergo: W. Tümmel 1894 kaj de la 2-a Parizo: Hachette 1902, senŝanĝe repr. 5-a Parizo: Hachette 1909. La Hachette-eldonojn Beaufront rajtis "laŭplaĉe korekti ĉian verkon de la 'Aprobita Kolekto' ".*

Migliorini, B[runo]: Konvinki — persvadi
*termino*
Lingva Kritiko 1933:1:21 (dec.), p. [3]
*Ĉu necesas 'persvadi' apud 'konvinki'? "Kaj mi persone kredas, ke la nuanco inter la du konceptosferoj estas tro malfacile difinebla, por ke ĝi pravigu la ĝeneralan enkondukon de 'persvadi'. ..."*

Kawasaki, Naokazu: Enmeto de vokalo pro bonsoneco kaj neenmeto. Zamenhofaj ekzemploj
*prononcado; belsoneco; ligo-vokalo*
Lingva Kritiko 1933:1:21 (dec.), p. [4]
*Fontoj por ekz. 'skribotablo' — 'skribtablo', mondolingva — mondlingva, ktp.*

Price-Heywood, Brian: La konstruo de la lingva sistemo
*etimologio; aŭ, almenaŭ, -il, -um, -eg*
Lingva Kritiko 1933:1:21 (dec.), p. [4]
*Reago al Penndorf, kelkaj korektoj pri la etimologio de aŭ, almenaŭ, -il, -um, -eg.*

Krikke, W.: Pri metaforoj
*metaforo*
Lingva Kritiko 1933:1:21 (dec.), p. [4]
*Reago al Collinson en Lingva Kritiko 1933:1:18/19, p. [3–5], kelkaj korektoj pri la deveno de Biblia citaĵo.*

Osmond, Emma L.: Esperanto restu facila
*neologismo*
Lingva Kritiko 1933:1:21 (dec.), p. [4]
*Konsentas kun Dratwer en Lingva Kritiko. Kun listo de 'neologismoj' el 'Tra sovaĝa Kamĉatko'. Kun Rim. de red. (T.J. = Teo Jung): "... la listo el 'Tra sovaĝa Kamĉatko' preskaŭ ne enhavas neologismojn [sekvas klarigoj pri la fontoj]".*

## *1934*

Wüster, E[ugen]: Post la morto de Grosjean-Maupin
*biografio; nekrologo; Grosjean-Maupin, E.; Cart, T.*

Lingva Kritiko 1934:1:22 (jan.), p. [1–2]
*La disputo inter Grosjean-Maupin unuflanke kaj la skolo de Cart kaj ties "natura evolucio" [tiel] aliflanke "ĉiam restos aktualegaj". La detala k profunda analizo de la lingva evoluo en la antaŭparolo al lia vortaro Eo-Franca de 1910 (2-a eld. 1921) estis grava paŝo antaŭen. Cart pri la 1-a eld.: "Tia vortaro estas ne nur malbona vortaro, sed ankaŭ malbona ago".*

Hartog, Joh.:
Bibliaj esprimoj en Esperanto [2]
*Biblio; etimologio*
Lingva Kritiko 1934:1:22 (jan.), p. [2–4]

H.N.: Benzeno
*termino; etimologio*
Lingva Kritiko 1934:1:22 (jan.), p. [4]

A.B.: Ĉu povas ekzisti 'geedzecoj'?
*-ec; pluralo*
Lingva Kritiko 1934:1:22 (jan.), p. [4]
*Ĉu 'multaj feliĉaj geedzecoj' laŭ la Germana 'viele glückliche Ehen'? Ne: "... kiel afikso la 'eco' ŝajnas iel rigidigi la ĉefan vorton ..."*

Penndorf, J.: Prilingva babilaĵo. Granato
*termino; etimologio*
Lingva Kritiko 1934:1:22 (jan.), p. [4]

Jung, Teo: Survoje al Konsilanta Gramatiko [8]. [Demandoj 78–85]
*apozicio; 'ties', fraŭlino; 'ol'*
Lingva Kritiko 1934:1:23 (feb.), p. [1]

Bauman, John E.: Transitiveco aŭ netransitiveco
*transitiveco*
Lingva Kritiko 1933:1:23 (feb.), p. [2–3]

Hartog, Joh.: Bibliaj esprimoj en Esperanto [3]
*Biblio; etimologio*
Lingva Kritiko 1934:1:23 (feb.), p. [3–4]

Penndorf, J.: Latinaj vortoj en Esperanto [1]
*Latina; etimologio*
Lingva Kritiko 1934:1:24 (apr.), p. [1–2]

Sirk, H[ugo]: Ĉu aŭtonoma, ĉu greko-latina scienca terminaro?
*terminologio; termin-farado*
Lingva Kritiko 1934:1:24 (apr.), p. [2]
*Resp. al Haberler, Lingva Kritiko 1933 (okt.).*

Takahaŝi, Meguru: Alkompletigo al 'Pri la refleksiva pronomo'
*refleksivo; pronomo; Lippmann, W.*
Lingva Kritiko 1934:1:24 (apr.), p. [3]

Hartog, Joh.: Bibliaj esprimoj en Esperanto [4]
*Biblio; etimologio*
Lingva Kritiko 1934:1:24 (apr.), p. [3–4]

Banham, R.: Pri radikoj unuseksaj
*-in*
Lingva Kritiko 1934:1:24 (apr.), p. [4]
*"Ekzistas en Eo certaj radikoj, kiuj povas esti aplikataj nur al in-seksuloj. Inter ili troviĝas graved', matron', nimf'. ..." Ĉu gravedulino aŭ ĉu gravedulo sufiĉas?*

Banham, R.: "Pasaĝero"
*termino*
Lingva Kritiko 1934:1:24 (apr.), p. [4]
*Pri difino de 'pasaĝero' en La Rabistoj en la trad. de Z. kaj en div. vortaroj.*

Kalocsay, K[álmán]: Konvinki — persvadi
*neologismoj*
Lingva Kritiko 1934:1:24 (apr.), p. [4]
*Resp. al Bruno Migliorini en Lingva Kritiko n-ro 21: Sencoj de 'konvinki' kaj 'persvadi' en la Hungara.*

Badash, G.: Naciaj lingvoj kaj neologismoj
*neologismoj*
Lingva Kritiko 1934:1:24 (apr.), p. [4]
*Pri uson-devenaj neologismoj en la Angla de Britujo.*

Boucon, H.: Pri teknikaj gramatikaj vortoj
*neologismoj*
Lingva Kritiko 1934:1:24 (apr.), p. [4]
*Resp. al H-s K. en Lingva Kritiko 1933:1:17 (jun.).*

Drezen, E[rnest]: Perspektivoj en la kampo de internacia normigo de scienc-teknikaj terminoj kaj simboloj [1]. [Kun enkonduko de E. Wüster]
*termino; terminologio; normigo*
Lingva Kritiko 1934:1:25 (jun.), p. [1–2]
*Eo-trad. de Drezen el lia Rusa orig.*

Penndorf, J.: Latinaj vortoj en Esperanto [2]
*Latina; etimologio*
Lingva Kritiko 1934:1:25 (jun.), p. [2–4]

Jung, Teo: La Esperanta Gramatiko. (Antaŭe: Survoje al Konsilanta Gramatiko) [demandoj

86–90]
*'ajn'; 'onia'*
Lingva Kritiko 1934:1:25 (jun.), p. [4]

J.D.L.: Pasaĝero
Lingva Kritiko 1934:1:25 (jun.), p. [4]
*Korekto de aserto de Banham en 1934:1:24 (apr.)*

Bauman, J.E.: "-ig", "-iĝ"
*'-ig'; '-iĝ'*
Lingva Kritiko 1934:1:25 (jun.), p. [4]

Banham, R.: "Tie aŭ alie"
Lingva Kritiko 1934:1:25 (jun.), p. [4]

Drezen, E[rnest]: Perspektivoj en la kampo de internacia normigo de scienc-teknikaj terminoj kaj simboloj [2]. (Fino.)
*termino; terminologio; normigo*
Lingva Kritiko 1934:1:26 (okt.), p. [1–2]
*Eo-trad. de Drezen el lia Rusa orig.*

Collinson, W[illiam] E.: La strukturo de Esperanto kompare kun tiu de kelkaj nordeŭropaj lingvoj [1]. Prelego farita okaze de la 26-a Universala Esperanto-Kongreso en Stokholmo
Lingva Kritiko 1934:1:26 (okt.), p. [2–3]

Migliorini, Br[uno]: La personaj nomoj [1]. Prelego farita okaze de la 26-a Universala Esperanto-Kongreso en Stokholmo
*propraj nomoj*
Lingva Kritiko 1934:1:26 (okt.), p. [3–4]

Jung, Teo: La Esperanta Gramatiko. (Antaŭe: Survoje al Konsilanta Gramatiko) [demandoj 91–95]
Lingva Kritiko 1934:1:26 (okt.), p. [4]

## *1935*

Collinson, W[illiam] E.: La strukturo de Esperanto kompare kun tiu de kelkaj nordeŭropaj lingvoj [2]. Prelego farita okaze de la 26-a Universala Esperanto-Kongreso en Stokholmo
Lingva Kritiko 1935:1:27 (jan.), p. [2–3]

Migliorini, Br[uno]: La personaj nomoj [2]. Prelego farita okaze de la 26-a Universala Esperanto-Kongreso en Stokholmo
*propraj nomoj*
Lingva Kritiko 1935:1:27 (jan.), p. [3–4]

Penndorf, [J.]: Mitologia esploro pri la Esperanta vortaro [1]
*etimologio*
Lingva Kritiko 1935:1:27 (jan.), p. [4]

Oeste, W. A.: Ĉu Esperanto estas vivanta lingvo? [1]. Prelego farita okaze de la 26-a Universala Esperanto-Kongreso en Stokholmo
*propraj nomoj*
Lingva Kritiko 1935:1:28 (mar.), p. [1–2]

Penndorf, [J.]: Mitologia esploro pri la Esperanta vortaro [2]
*etimologio*
Lingva Kritiko 1935:1:28 (mar.), p. [2–3]

Collinson, W[illiam] E.: La strukturo de Esperanto kompare kun tiu de kelkaj nordeŭropaj lingvoj [3 – fino]. Prelego farita okaze de la 26-a Universala Esperanto-Kongreso en Stokholmo
Lingva Kritiko 1935:1:28 (mar.), p. [3–4]

Ejuna: Vetero rosa kaj pluva
*termino; meteologio*
Lingva Kritiko 1935:1:28 (mar.), p. [4]

Rebiĉek, J.: Poste — Ajn.
*'ajn'*
Lingva Kritiko 1935:1:28 (mar.), p. [4]
*Resp. al Lingva Kritiko n-ro 26 (okt. 1934).*

## Konsiloj al aŭtoroj

Manuskriptojn verkitajn cele al publikigo en EES oni sendu al la redaktoro per komputilreta poŝto, prefere kiel TEX-dosieron, ĉe `kiselman@math.uu.se`

Se tio ne eblas, sendu la tekston kiel ordinaran retpoŝtan leteron. Se ankaŭ tio ne eblas, tiam surpapere al


Christer Kiselman
Upsala universitato
Poŝtkesto 480
SE-751 06 Uppsala, Svedio.


Ĉiu artikolo estos submetita al juĝado de du spertuloj, kiuj restos nekonataj de la verkinto.

La bibliografio estu je la fino, kaj entekstaj referencoj al ĝi laŭ nomo, jaro kaj paĝnumero: Zamenhof (1929:365) aŭ (Zamenhof 1929:365) depende de la kunteksto. La donitaĵoj aperu en la bibliografio tiel:

Wüster, Eugen 1955. La terminoj "esperantologio" kaj "interlingvistiko". En: *Esperantologio* **1**, 209–214.

Zamenhof, L. L. 1929. *Originala verkaro. Antaŭparoloj — Gazetartikoloj — Traktaĵoj — Paroladoj — Leteroj — Poemoj*. Lepsiko: Ferdinand Hirt & Sohn.

## Guidelines for authors

Manuscripts intended for publication in EES should be sent to the editor by e-mail, preferably as a TEX file, at `kiselman@math.uu.se`

If TEX is not available to the author, then please send the text as a regular e-mail letter. If this is not technically possible, send the manuscript on paper to


Christer Kiselman
Uppsala University
P. O. Box 480
SE-751 06 Uppsala, Sweden.


The journal applies a strict refereeing system: every contribution is sent to two referees, whose identity will remain unknown to the author.

Put the bibliography at the end and refer to it in the text by name, year, and page number: Zamenhof (1929:365) or (Zamenhof 1929:365) depending on the context. Please give bibliographical details according to the following models:

Wüster, Eugen 1955. La terminoj "esperantologio" kaj "interlingvistiko". In: *Esperantologio* **1**, 209–214.

Zamenhof, L. L. 1929. *Originala verkaro. Antaŭparoloj — Gazetartikoloj — Traktaĵoj — Paroladoj — Leteroj — Poemoj*. Leipzig: Ferdinand Hirt & Sohn.

KAVA-PECH

Anglická 878, CZ-25229 Dobřichovice (Praha)

ISSN 1311-3496 (p), 1404-4709 (e)
ISBN 80-85853-83-3 (p)

Produktita en Ĉeĥio / Produced in Czechia
2005